

# **LA ALARMSONORIOLO**

**Historia romano**

**de**

**Aster Berkhof**

**Tradukita el la nederlanda**

**de**

**Pieter Jan Doumen**

Pieter Jan Doumen  
Peerderbaan 81  
B-3940 Hechtel-Eksel  
[pieter-jan.doumen@telenet.be](mailto:pieter-jan.doumen@telenet.be)

**Originala titolo:**

**De Alarmklok**

## Enkonduko

La historiaj Nederlandoj<sup>1</sup> aŭ Malaltaj Landoj aŭ la Dek Sep Provincoj ampleksis en la 15-a jarcento pli-malpli la teritorion de Benelukso. Filipo la Bona (1396-1467), duko de Burgundio kaj grafo de Flandrio, sukcesis akiri ĉiujn provincojn. Lia posteulo, Karlo la V-a, imperiestro de la Sankta Romia Imperio Germanio, naskiĝinta en Gento en 1500, unuigis ilin en 1549 en 'unu nedivideblan kaj nedisigeblan tuton' sub unu grandparte memstara registaro kaj faris la novan ŝtaton heredebla per la privilegio de la vira unuenaskiĝinto. Li donis al la Nederlandoj politikan organizon, kiu preskaŭ neŝanĝeble plu ekzistis ĝis la Franca Revolucio de 1789. Karlo la V-a, kiu plej ofte restadis eksterlande, estis reprezentata en la Nederlandoj de sia filino, la ĝenerala guberniestrino Margareta de Parma, kiu estis asistata de tri diversaj konsilantaroj: la Ŝtata Konsilantaro, kiu okupiĝis pri la ĝenerala politiko kaj la nomumado de la superaj oficistoj; la Sekreta Konsilantaro, kies tereno estis justico kaj leĝfarado; kaj la Financa Konsilantaro, kiu regis la financojn kaj la ŝtatkason.

Same kiel la najbaraj landoj la Nederlandoj, en la 16-a jarcento multe suferis pro religiaj tumultoj, kiuj akompanis la estiĝon de protestantismo. Post la morto de imperiestro Karlo la V-a, kiu estis ankaŭ reĝo de Hispanio, lia filo Filipo heredis Hispanion kaj la Nederlandojn. Kun pli da severeco ol lia patro, reĝo Filipo la II-a agadis por bridi ilin. Antaŭ ol foriri por ĉiam al Hispanio, li donis novan registaron al la Nederlandoj. Tial li persone kunmetis la Ŝtatan Konsilantaron, kies ses membroj estis: kardinalo Granvelle, episkopo de Artezio, kiu estis parto de la Nederlandoj; Viglius, prudenta juristo kaj prezidanto de la Sekreta Konsilantaro; la grafo de Berlaymont, prezidanto de la Financa Konsilantaro; la grafo de Egmont, la grafo de Hoorn kaj Villhelmo, princo de Oranje-Nassaŭ.

Sed ĉiuj aranĝoj faritaj de la reĝo efikis nur kiel oleo verŝita sur fajron. Precipe la restado de hispanaj trupoj kaj la nomumo de neamata fremdulo, kardinalo Granvelle, kiel prezidanto de la Ŝtata Konsilantaro, igis la malkontentecon en la Nederlandoj atingi la supron. Ĉar pacamaj rimedoj ne utilis,

Filipo la II-a decidis uzi perfortecon kaj sendis la dukon de Alva kun 20.000 hispanaj soldatoj al la Nederlandoj. Antaŭ lia alveno ĉirkaŭ 100.000 personoj, ofte la plej riĉaj kaj instruitaj homoj, forlasis la sudajn provincojn, precipe Brabanton, kaj fuĝis al Germanio kaj Holando. La princo de Oranje fuĝis al sia dukejo Nassaŭ en Germanio.

En aŭgusto don Fernando Álvarez de Toledo, duko de Alva, alvenis en Bruselo por subpremi la ribelon en la Nederlandoj kaj puni la protestantaj bildodetruantojn, kiuj detruis preĝejojn, kapelojn kaj monaĥejojn. Malgraŭ la malnovaj konstituciaj rajtoj, kiujn ĝuis la Nederlandoj, la duko de Alva estigis en Bruselo tribunalon, la Konsilantaron de la Tumulto, kun la celo juĝi kaj kondamni ĉiujn, kiuj ne nur partoprenis en la tumultoj, sed ankaŭ la respondeculojn, kiuj faris nenion por malebligi ilin. Miloj da metiistoj kaj poste ankaŭ pluraj nobeloj aperis antaŭ la nova tribunalo, kiun, pro la grandnombraj kondamnoj al morto, la popolo baldaŭ nomis la 'sangokonsilantaro'.

La plej renomaj viktimoj sendube estis la grafoj de Egmont kaj de Hoorn. Ili estis arestitaj tuj post ia kunveno de la Ŝtata Konsilantaro. Oranje avertis ilin ne iri al tiu kunveno, ĉar li malfidis la dukon de Alva. Tiel li eskapis al la sorto de Egmont kaj Hoorn. Post dekmonata mallibereco ili estis kondamnitaj al morto pro ŝtata perfido kaj publike ekzekutitaj sur la Granda Vendoplaco en Bruselo la 5-an de junio 1568.

Tiu maljusta kondamno estis la signalo por ĝenerala kaj aperta insurekcio. Vilhelmo de Oranje-Nassaŭ venis nun al Bruselo ĉekape de armeo de 20.000 soldatoj. Komenciĝis la longa kaj obstina Okdekjara Milito, kiun malgajnis la hispanoj kaj kiu fine kondukis al la disdivido de la Nederlandoj en 1648 kaj la sendependiĝo de la nordaj provincoj, kiuj nuntempe nomiĝas Nederlando. La sudaj provincoj (nun Belgio) restis sub Hispanio..

En 1573 Filipo la II-a, komprenante, ke tiu metodo repacigi la Nederlandojn estis pli ol neadekvata, revokis la dukon de Alva kaj anstataŭigis lin per la pacama Requesens. Elrevigite kaj perdinte la favoron de la reĝo, Alva reiris al Hispanio kun la malbena de la tuta nederlanda popolo, kiun li dum ses jaroj kruelege turmentadis.

En aprilo 1568 – ni revenas al la romano – la duko de Alva retiriĝis en la monaĥejon Ter Kameren apud Bruselo por fari religiajn ekzercojn. Ĉe tiu okazo konspiro estis entreprenita kontraŭ li kun la celo liberigi Egmont kaj Hoorn. Sed la plano estis perfidita kaj fiaskis.

<sup>1</sup> Oni rimarku, ke konforme al la tiama politika situacio ne temas pri unu Nederlando, sed pri pluraj, nome dek sep; per la nocio 'lando' oni indikis tiutempe ĉiun el la kvar dukejoj, ses grafejoj kaj sep senjorbienoj.

## UNUA ĈAPITRO

*El psiĥologia vidpunkto ni estas konfrontataj kun la drameca angoro, kiun spertis la duko de Alva dum siaj lastaj vivjaroj, precipe pro sia sangeca agado en la Nederlandoj. El kelkaj liaj leteroj kaj el la skribaĵoj de lia konfesprenanto evidentiĝas, ke Alva estis turmentata de konstantaj konscienc-riproĉoj. Ĉion kion li faris, ordonis al li la reĝo, sed forta dubo vivis en li, ĉu li rajtas kiel homo plenumi tiajn ordonojn. Dum sia militiro en Portugalio, nelonge antaŭ sia morto en 1582, li plendis al la reĝo pri siaj daŭraj timsentoj, kaj Filipo la II-a skribis al li: "Ne timu. Mi, kiel reĝo, respondecas antaŭ Dio pri ĉio, kion mi igis vin plenumi." Sed tio ne povis liberigi lin de liaj timoj.*

*Ĉu tiu timo jam vivis en Alva, kiam li estis ankoraŭ en la Nederlandoj, ne estas certe, sed ŝajnas esti tiel. En la jaro de la ekzekuto de Egmont kaj Hoorn, Alva jam havis pli ol sesdek jarojn, tiutempe alta aĝo, kiu certe igis lin ofte pensi pri sia propra morto. Ĉe tio li estis malsana. Ni scias, ke li ploris, kiam Egmont kaj Hoorn estis senkapigitaj. Hipokritaj larmoj, diras kelkaj historiistoj, sed tio ŝajnas tre neprobabla. Alva estis maljuna generalo, duriĝinta dum multaj jaroj en la servo de la imperiestro kaj la reĝo. Sed mortigi civitanojn kaj eĉ fame konatajn kolegojn, kies kulpo certe ne meritis morton, estas tute alia afero ol mortigi armitajn malamikojn, kiuj volas mortigi vin.*

*Cetere – kaj kio estas pli grava – Alva opiniis, ke oni ĉiam devas obei al sia superulo – por li la reĝo de Hispanio –, kaj ke tio "kion mi pensas persone, ne havas gravecon (vidu p. 22)."*

*Ĉu oni devas obei al sia superulo, kion ajn li ordonas, aŭ ĉu oni ĉiam devas agi laŭ sia konscienco? Precipe dum militoj, sed ankaŭ en la ĉiutaga vivo, tio estas grava demando. Alva kredis devi elekti la unuan eblecon: obei al sia reĝo en ĉiuj cirkonstancoj. Sed homo neniam povas liberigi sin de sia propra respondeco. Alva pagis tiun eraron per daŭraj konscienc-riproĉoj, kiujn li povis silentigi per nenia rimedo kaj kiuj persekutis lin dum la resto de sia vivo.*

*La riproĉo, brile farita al li de lia amiko, la abato de Ter Kameren, levas tiun verkon super la nivelon de ordinara historia romano kaj donas al ĝi modernan kaj aktualan karakteron. La minaco de la konspiro, la soleco de la turmentata Alva, la profeteca ago de la abato, la regata emocieco de Sabina, la edzino de Egmont, ĉion tion la aŭtoro scipovis mastre kunigi en vere absorba romano.*

Pieter Jan Doumen

Kiam per mesaĝo el la palaco de Bruselo estis konfirmite, ke la spirita retiriĝo de la duko de Alva vere okazos, kaj ke li alvenos ankoraŭ la saman vesperon kun malgranda sekvantaro en nia abatejo, mi estis tiel ekscitita, ke mi ne plu povis labori.

Antaŭe mi penadis per ĉiuj miaj fortoj esti atenta, dum la abato diktis al mi la leterojn al la duko, kaj ankoraŭ pli forte, kiam poste mi kaligrafiis ilin en mia ĉelo. Post la skribado de la leteroj, mi fakte devis iri al la biblioteko por transskribi por la juna Bredrode la poemojn de Petrarko, kiujn li volis donaci al sia edzino. Fratulo Mendel jam antaŭ semajno finpretigis la miniaturojn, sed mi diris al mi mem, ke estas pli bone ankoraŭ iom atendi, ĉar mi timis, ke, pro mia distriteco, mi faros nur erarojn kaj certe devos rekomenci. Estis preteksto, mi ja scias, sed mi ne povis malhelpi min kuri eksteren kaj provi malkovri de la parapeto super la granda pordego de la abatejo, ĉu en la malproksimeco apud la urbomuregoj jam videblas ia moviĝo.

Kompreneble estis ankoraŭ tro frue. Mi estis certa, ke la duko venos nur post la mallumiĝo, kaj la suno ankoraŭ staris super la tegmentoj de la urbo. Sed mi bezonis vidi en la malproksimo la fortresmuregojn kaj, inter la preĝejo kaj la murdentoj de la pordego de Halle, la tegmentojn, inter kiuj ie staris la gildodomoj kaj la duka palaco.

Vidante la vojon, kiu ekde la urbomuregoj kondukis tra la valo al Ter Kameren kaj poste denove per Boetendaal suprenserpentumis al la monto Groezel, mi pensis, ke ie sur tiu vojo li alrajdos sur sia ĉevalo.

Jam de pluraj tagoj, de kiam estis dirite, ke la duko verŝajne venos, la vivo en la abatejo estis malregulita. La laborfratuloj jam estis purigintaj la korton kaj blankigintaj per kalko la murojn de la staloj kaj de la pilgrimantejo, kaj ili estus farintaj la samon al la tuta interna flanko de la ĉirkaŭa murego, se la abato ne estus forsendinta ilin ree al la laborejo.

Daŭre oni vidis grupetojn da monaĥoj starrantaj unuj ĉe la aliaj en la granda koridoro kun la pentraĵoj, kie troviĝas la biblioteko, aŭ inter la kolonetoj de la eta korto aŭ en la ĝardeno apud la fontano. Kompreneble ili flustre parolis pri Egmont, pri la ĉelo en kiu li estis enŝlosita – bildo al kiu ni ne povis kutimiĝi – kaj pri la terura verdikto de la tribunalo, kiu tenis nin kaptitaj en timego, de kiam ĝi estis prononcita, kaj je kiu ni eĉ tiam en la lasta vespero ankoraŭ ne povis aŭ ne volis kredi, ke ĝi estos plenumita.

Por mi estis certege, ke estas en rilato kun tiu verdikto, ke Alva venos al nia abatejo, ne por retiriĝi, kiel skribis en sia letero lia sekretario Alborno, sed por ne esti en Bruselo en la momento, kiam Egmont estis senkapigota. Unuj diris, ke li volas nur eskapi al la multaj homoj, kiuj amasiĝis antaŭ la pordo de sia palaco kun pardonpetegoj. Aliaj pensis, ke li ne volos aŭdi la ĉarpentadon de la eŝafodo, kaj ankoraŭ aliaj opiniis, ke estas pro la tamburado, kiu frumatene antaŭiros la ekzekuton. Ili diris, ke li ne volos aspekti nervoza en publiko en la ĉeesto de Vargas.

Mia koro bategis ĉe la lasta penso. Mi sciis, dum mi rigardis ekde la parapeto al la urbo kaj la valo en la malproksimo, ke oni jam antaŭe, tie ĉi en la abatejo Ter Kameren kaj aliloke, parolis pri tiu stranga 'maltrankvileco de Alva', kiu plenigis min per timo, sed ankaŭ per espero.

Post pluraj jaroj da granda konfuzo, en kiu ni vivis, de kiam oni persekutis la novan religion, multaj, ankaŭ en nia abatejo, konsideris kiel savon la alvenon de Alva en la Malaltaj Landoj. Ili denove scios, kio estas vera kaj nevera, ili diris. Tie ĉi la ortodoksa kredanto, tie for la herezulo; tie ĉi la lojala subulo, tie for la perfidanto.

Sed por mi persone la afero ne estis tiel simpla. Mi ja neniam amis Luteron. Mi opiniis, ke li estas aroganta kaj neekvilibra, kaj mi kredis, ke li diris pli multe, ol li devus esti dirinta. Sed mi ne povis konsideri lin kiel diablon. Mi ofte pensis pri Lutero kiel pri iu, kiu malkonvene diris konvenaĵojn, kaj mi ne ŝatis la afiŝproklamojn, per kiuj la imperiestro faris friponojn el alipensuloj. Mi estis konvinkita – Vives instruis tion al mi –, ke oni devus paroli kun ili, ke oni devus aŭskulti, kion ili deziras kaj kio estas grava por ili. Mi ankaŭ ne ŝatis la manieron, en kiu kleraj teologoj, kvankam primokataj de Erasmo je la ĝenerala ĝojo de ĉiuj, tiel malmilde traktis la herezulojn.

Necerteco estis doloro por mi, sed tute ne peko. Estis malforto, kontraŭ kiu mi batalis per ĉiuj fortoj, sed mi pensis, ke homo ne devus esti kondamnita pro tio. Ofte ŝajnis, ke eĉ nia patro abato mem opinias tion, kaj ke li malaprobis unuavice sin mem pro tio. Sed mi ne estis certa pri tio.

Ni ektimegis, kiam ni aŭdis, ke Alva venos al nia lando. Ni aŭdis la rakonton pri lia sovaĝa furiozeco pro la detruado de preĝejstatuoj kaj altaroj, kaj sekvis kun timo la progreson de lia armeo tra Burgundio kaj Luksemburgo. Ni ne nur timis liajn punojn, pri kiuj ni povis supozi, ke ili estos teruraj, sed ankaŭ lian nefleksigemon, la severan

linion de liaj rezonadoj kaj lian kutimon nomi ĉion nigra aŭ blanka, lian inklinon fari krimon el ĉio, kio ne estas virto. Mi timis, ke per tiu sinteno li eble faros pli da malbono ol da bono en tempo, kiu postulas nuancon, kaj apud popolo, kiu ŝatas toleremon kaj bonkorecon.

Mi ne vidis lin, kiam li enrajdis Bruselon ĉe la kapo de la armeo, per kiu li akiris grandan gloron kiel armeestro. Sed multaj aliaj iris rigardi kaj rakontis, kiel alta, maldika kaj malluma li estas, kiel pala kaj streĉita lia vizaĝo, kaj kun kia malaprobado li rigardis preter tiuj, kiuj provis saluti aŭ honori lin. Ni aŭdis, kiel malvarmeta estis lia interparolo kun guberniestrino Margareta de Parma, kaj kiel dure li forrifuzis la urĝan petegon de Margareta por ĝenerala pardonado, dirante, ke li tute ne interesiĝas pri 'repacigo', sed pri ekstermo de la 'venenaj fiherboj'. Kaj tiam, tagon post tago kaj kun kreskanta konsterneco, ni aŭdis paroli pri la malbonfama Sangokonsilantaro, kiu subite tegmentis ĉiujn aliajn tribunalojn, pri la listoj kun nomoj de akuzatoj, kiuj ĉie estis redaktataj, la centoj da juĝoj, kiuj baldaŭ estis farigontaj miloj, la konfiskoj kaj ĉie kaj ĉiutage la ekzekutoj.

La lando kuŝis sub la teroro kvazaŭ malvarmiĝinta, ne nur pro la konsterna, ĉiam kreskanta nombro da ekzekutoj, sed precipe pro la neperturbbla reguleco, kun kiu ili sekvis unuj la aliajn, kaj la glacia kvieteco, kun kiu ili estis plenumataj.

Alva estis ofendita, ĉar 'fremduloj' lezis lian reĝon, kaj li kredis ankaŭ devi venĝi la Sanktan Rom-Katolikan Eklezion, kontraŭ kiu oni ribeladis. Li nek hezitis nek dubis. Lia decidemo ŝajnis absoluta, same kiel lia malamo, lia certeco same tiel perfekta kiel lia plenpotenco. Ni vidis altan, malhelan viron kun brilaj nigraj okuloj, kiu agis, kvazaŭ li estus Dio mem. Tio estis konsterna spektaklo, kiu paralizis min pro timo.

Sed tiam penetris ĝis ĉe ni strangaj famoj pri vortoj, kiujn oni atribuis al Alva, kaj kiuj konfuzis nin, sed kiuj ŝajnis ne konveni al lia karaktero, aferoj, kiujn li estus farinta kaj pri kiuj ŝajnis, ke li ne povas esti farinta ilin.

Mi pensas, ke ĝis antaŭ la vespero, kiam Alva venis al nia abatejo, kaj la sovaĝa timiga nokto kiu sekvis, la abato estis unu el la malmultaj, kiuj vere sciis, kio el tiuj rakontoj estas vera kaj nevera. Alva kaj la abato konis unu la alian. Ili estis amikoj. Ili interkonatiĝis en Salamanko, kiam ambaŭ estis studentaj tie, kaj poste ili restis en kontakto unu kun la alia per leteroj. Tiujn leterojn la abato neniam diktis al mi. Li mem skribis kaj sigelis ilin, sed kiam li estis

skribinta ilin aŭ leginta iliajn respondojn, mi ofte vidis, ke li estas fortege emociita, kelkfoje ĉagrenita kaj iam kaj iam eĉ kolera.

La morgaŭon de la aresto de Egmont, la abato ankaŭ iris al Alva en ties palacon en Bruselo kaj revenis hejmen ruĝe ekscitita kaj tiel nervoza, ke li ne estis alparolebla la tutan vesperon.

Malmultan tempon poste cirkuladis la famo, ke nia abato insultis la dukon en Meĥlino post la kunsido de la Tribunalo, kaj unu semajnon antaŭ ol Alva estis prononconta la verdikton kontraŭ Egmont, la abato, en la ĉeesto de episkopoj kaj magistratoj, nomis tiun juĝon 'la testŝtono', per kiu oni povas mezuri, ĉu li estas vera kristano aŭ katolika barbaro. La esprimo 'katolika barbaro' flugis de buŝo al buŝo, kaj ni timis, ke la abato estos arestita, sed nenio tia okazis.

## DUA ĈAPITRO

La suno jam estis subiranta kaj komencis mallumiĝi en la valo, kiam de maldekstre el la direkto de Berkendaal mi vidis alproksimiĝi rajdiston. Li rajdis plengalope, daŭre rigardante malantaŭ si, kvazaŭ li estus fuĝanta. Mi demandis min, ĉu li iros al la urbo aŭ turnos sin dekstren al Langeveld, sed li faris nek unu nek la alian. Li galope saltis trans la barilon de niaj herbejoj kaj rajdis en la direkto de la abatejo.

Mi ne povis bone vidi, kia viro li estas, ĉar li surhavis kapuĉmantelon, en kiu li estis tute kaŝita. Sed li rajdis sur tre bona ĉevalo, el kio mi konkludis, ke li estas nobelo, kvankam kapuĉmantelo estas tre stranga vestaĵo en tiu ĉi kazo, precipe en varma vespero, kiel tiu ĉi, ĉar estis la komenco de junio. Ŝajnis estis maskovestaĵo. La rajdisto estis do en danĝero!

Tiaj pensoj facile estiĝis en iu ajn dum tiuj tagoj, kiam ĉie eraradis ĉasatoj kaj ĉiunmomente, ankaŭ dum la nokto, oni devis atendi frapadon sur la pordon kaj hispanajn soldatojn, krientajn ekstere, ke oni malfermu kaj ke ili frakasos la vitrojn, se oni ne multe rapidos.

Mi malsupreniris kaj malfermis la spionfenestreton en la pordego. De tie mi ne povis vidi la rajdanton, nur la malluman, preskaŭ nigran silueton de la urbo sur la vesperĉielo. Sed mi aŭdis la tamburadon de la hufoj sur la herbejo, baldaŭ ankaŭ la kriojn, per kiuj la rajdanto instigis sian ĉevalon. Kaj tiam, dum la hufoj subite ekklaketis sur la vojŝtonoj, la ĉevalo malmergiĝis

antaŭ la pordego kaj baŭmis, dum la rajdanto kun flirtanta mantelo saltis teren. Li venis piede ĝis antaŭ la pordego, kondukante la ĉevalon per la brido post si, kaj diris ekscitita.

"Lasu min eniri, mi petas."

La kapuĉo ĵetis ombron sur lian vizaĝon, tiel ke mi ne povis distingi liajn trajtojn. Ankaŭ la vestaĵojn, kiujn li surhavis sub la mantelo, mi ne povis vidi, ĉar zono en la talio tenis la mantelon fermita. Sed la spronoj perfidis, ke li estas nobelo. Mi atendis, ke li retroĵetos la kapuĉon kaj montrus sian vizaĝon, sed li ne faris tion. Li staris malantaŭ la kapego de sia ĉevalo, tiel ke mi apenaŭ vidis lin, kaj li ripetis:

"Rapide, lasu min eniri. Mi estas en danĝero."

"Kiu vi estas?" mi demandis hezite.

"Lasu mi eniri."

"Vi devas diri, kiu vi estas, kaj montri vin."

"Kian diferencon tio farus? Kiam mi diras al vi, ke mi estas en danĝero."

"Mi ne komprenas, kial vi devas kaŝi vian vizaĝon al mi," mi rimarkis.

"Lasu min paroli kun la abato."

"Tio ne estas ebla, kiam vi ne diras, kiu vi estas."

"Estas afero de vivo aŭ morto."

"Ĉiu povas diri tion."

"Vi estas monaĥo! Tio ĉi estas monaĥejo! Vi devas helpi fuĝantojn!"

"La patro abato devas pensi pri la sekureco de la monaĥejo. Neniu estas helpata, kiam tio endanĝerigas la monaĥejon. Diru do, kiu vi estas, mi petas."

"Ne, mi devas paroli al la abato, ne al vi."

"Sed estas la abato, kiu volas, ke vi konatigu vin."

"Iru al li," la viro diris rapide kaj mallaŭte.

"Diru al li, ke mi ne povas konatigi min, sed ke mi estas fuĝanta antaŭ Alva kaj ke mi petas loĝejon."

Konsternita, mi rigardis la viron, tiam al la urbo en la proksimeco

"Vi diras, ke vi estas fuĝanta antaŭ Alva?" mi demandis, mirigita.

"Jes, iru do! Iru al la abato."

Mi ne bone sciis, kion mi devas fari. Mi ne povis diri al la viro, ke Alva venos al la abatejo tiun ĉi vesperon. Ni ricevis striktan ordonon ne paroli pri tio al iu ajn.

"Vi ne volas diri, kiu vi estas?"

"Ne!"

Dume la pordegisto estis alproksimiĝinta.

"En la nomo de la ĉielo, rapidu!" diris la viro, senpacienca.

Mi fermis la spionfenestreton.

"Kiu li estas?" flustris la pordegisto.

"Li ne volas diri tion."

“Tiam ni ne rajtas malfermi. Tio povas nur signifi, ke li volas trompi nin. Ni ne rajtas doni al li tiun okazon.”

“Eble ni devus demandi la opinion de la abato malgraŭ ĉio. Mi iros.”

Mi kuris trans la grandan korton al malgranda, bela pordo, enkadrigita per brunaj sabloŝtonoj en la granda fasado, tra kiu mi povis iri rekte en la laborĉambron de la abato. Trapasinte la etan koridoron, mi frapis sur la pordon kovritan per ledo, atendis, ĝis mi aŭdis la konsentan murmuradon, kiu estis tiel familiara al mi, kaj mi eniris la grandan, blankan ĉambron.

Mi ankoraŭ detale memoras, kiel la abato estis skribanta sur sia longa kverka skribtablo. Mi ankoraŭ ĉiam vidas lian grandan, maldelikatan kapon, lian sulketozan manon, lian imponan kvietecon, kiu similis al neper-turbebleco, sed kiu kaŝis violentecon, antaŭ kiu ni tremblis, kiam ĝi elrompis. Mi ankoraŭ scias, ke li okupiĝis pri letero al la episkopo de Meĥlino, al kiu li preferis skribi propramane, kiel ĉiujn kolerajn leterojn, kaj kion ĝi enhavis. Mi memoras, ke unu el liaj grize blondaj harfasketoj pendis sur lia frunto kaj ke oblikve antaŭ li staris blua-kaj-blanka telero, en kiu kuŝis la pomoj, la unuaj de la jaro, kiujn fratulo Lukas alportis al li la matenon.

Mi konservas tiun bildon en mi, kune kun kelkaj aliaj, kiel la lastan el antaŭa parto de nia vivo, antaŭ ol Alva tuŝis ĝin. Mi scias, ke nia vivo ŝanĝiĝis esence pro tio, eble ne ekstere, sed certe interne. Eble dum tiu nokto ni diris kaj faris aferojn, kiujn ni neniam antaŭe faris aŭ diris. Sed iujn aferojn oni nur vere scias, kiam oni laŭte elparolas ilin kaj oni ‘vidas’ ilin. Oni vidas, kion oni ĝis tiam nur sentis. Momenton oni staras senmove, kaj poste oni ne plu estas la sama. Almenaŭ tion mi pensas.

Tiun vesperon timo venis en nian vivon, ne timo pro iu alia, sed pro ni mem, kaj la bildo de la abato skribanta leteron al la episkopo ŝajnas esti al mi io bela kaj paca el pasinta tempo. Mi jam ne povas pensi pri io ajn sen vidi mian propran timon kuŝanta kiel ombro sur ĉio.

“Patro, ĉu ni povas ankoraŭ akcepti gaston ĉi-vespere?” mi demandis. “Antaŭ la pordego staras viro, kiu diras, ke lia vivo estas en danĝero.”

Sen rigardi supren la abato demandis:

“Kaj kiu fordrinkaĉis sian monon?”

“Ne.”

“Aŭ kiun oni batis blua kaj bunta en diboĉo?”

“Ne, patro.”

“Tiam li havas hejme edzinon, kiun li timas.”

Mi komprenis, ke li estas bonhumora pro la letero al la episkopo kaj la maniero en kiu li denove rakontis al li la veron.

“La viro diris, ke li estas fuĝanta antaŭ Alva.”

“Ĉu Alva?”

“Jes.”

“Kiu li estas?”

“Li ne volis diri tion.”

“Ĉu vi jam vidis lin antaŭe?”

“Li havas tre bonan ĉevalon kaj portas arĝentajn spronojn. La mantelo estas vila, sed ĝi povas esti ne la lia.”

Li leĝere kapjesis. Tiam li daŭrigis sian skriblaboron kaj ŝajnis forgesi, pri kio ni parolas. Sen halti li demandis min post iom da tempo:

“Ĉu la ĉelo estas preta?”

Estis facile diveni, pri kiu ĉelo li aludis.

“Jes, patro, tute kiel vi ordonis.”

“Kaj la kandeloj?”

“Ili estas tie.”

“La hispana preĝolibro?”

“Kuŝas sur la preĝoseĝo.”

Subite mi jam ne povis retenigi min kaj paŝis ĝis antaŭ la tablo.

“Patro,” mi diris insiste.

La abato ne rigardis supren. Li ĉesis skribi kaj demandis:

“Kio estas?”

“Kial la duko de Alva venas al nia abatejo? Kion li venas fari ĉi tie?”

“Kion signifas tiu demando?”

Mi sentis mian koron bategi, dum mi demandis:

“Ĉu estas vere, ke...?”

Mi hezitis kaj glutis.

“... ke li perdis sian memfidon?”

“Kiu diras tion?”

Li parolis bruske, kiel preskaŭ ĉiam, sed ne kolere, ĉar li estis trankvila. La demando nek surprizis nek iritis lin. Tio donis al mi kuraĝon.

“Oni diras, ke li estas ofte distrita.”

“Kaj kion plu?”

“Ke li ne aŭdas, kion oni diras al li.”

“Kaj plu?”

“Ĉu estas vere? Mi petas, patro, diru al mi, ĉu estas vere.”

La abato rigardis min kaj diris malmilde:

“Tio ĉi estas loko de pieco. La duko venas ĉi tien por fari, kion ĉiuj estas supozataj fari ĉi tie. Preĝi. Kiu ajn venas ĉi tien por preĝi, estas bonvena.”

“Oni diras, ke li vidas ion.”

“Sulketoj aperis sub liaj okuloj.

... vidas ion?”

“Jes. Monstron.”

“Kian monstron?”

“Monstron kiu neniam eĉ unu futon cedas de li.”

Kiam mi vidis lian vizaĝon subite ruĝiĝi, mi haste diris:

“Tion oni diras. Mi aŭdis tion. La du junaj teologoj, kiuj estis ĉi tie antaŭ nelonge, rakontis tion.”

“Ne ekzistas monstroj, kiuj eĉ ne unu futon cedas de iu,” kolerete diris la abato.

Mi volis diri ion, sed li preskaŭ kriis:

“Superstiĉo por bigotuloj!”

“La junaj teologoj diris...”

“Ili kluvas kiel kokinoj. Tion mi jam aŭdis fari multajn teologojn en mia vivo. Kluki kiel kokinoj. Kanti kiel virkoko, jes, ekzistas ankaŭ tiuj, kaj ili ankaŭ faras, kion faras virkoko. Kio estas al vi, Camillus? Ĉu mi devas fari vin konfesprenanto ĉe la beginoj?”

Oni jam ne povis paroli kun li. Estis klare, ke li scias, pri kio mi parolas. Li probable konis la rakonton pri la monstro pli longe ol la junaj teologoj. Ili aŭdis ĝin de patro dominikano, frato de la kortega predikisto de Alva.

Li finis la leteron, subskribis ĝin kaj disŝutis sablon sur ĝin. Tiam li faldis, sigelis kaj etendis ĝin al mi.

“Por la episkopo. Morgaŭ frumatene.”

“Ĉu estas la letero pri la mono?”

“Jes.”

“Ĉu vi jam transportigis la monon al la episkopo? Eble per iu alia?”

“Ne.”

“Ĉu vi do donos ĝin al mi morgaŭ?”

“Li ne ricevos ĝin.”

Temis pri la farmbieno, kiujn ni havis en uzo, sed kiuj apartenis al la episkopo. Sed estis ankoraŭ aliaj farmbieno, pri kiuj ekzistis malkonkordo: la episkopo asertis, ke ili apartenas al li, sed ni opiniis, ke ili estas niaj. Sed ne temis pri tiuj. Mi singarde provis diri tion, sed la abato ekkriis:

“Li ne ricevos ĝin! Li ne plu ricevos ĝin, se li ne forlasos mian farmdomon sur la monto Groeze!”

Estis do tio. La kazo treniĝis ekde la morto de la maljuna grafino de Erenhout. Ŝi diris tion sur sia mortlito, sed la episkopo asertis, ke ŝi donacis la farmbienon ‘al la Eklezio’ kaj ke ŝia konfesprenanto, kiu staris en angulo de la ĉambro antaŭ ol ŝi forpasis, aŭdis, ke ŝi diris tion. La abato diris, ke li estis sidanta ĉe la lito de la mortanta la tutan tempon, kaj ke do li devus esti aŭdinta tion. Sed ne estis farita dokumento. Nek la abato nek la episkopo cedis, kaj tiam, unutage, ni aŭdis, ke la farmistoj,

kiuj loĝis en la farmdomo, foriris kaj ke alia familio enloĝiĝis kun du pastroj, ‘kiuj bezonis ripozon kaj bonan aeron’. Ĝis tiam la unua familio pagis la farmon al la abato, sed la dua pagis al la episkopo.

La abato transdonis al li la dokumenton kaj diris:

“Alportu tiun dokumenton al farmisto Bergman. Li loĝas en la farmdomo malantaŭ la muelejo. Ĉu vi scias, kie ĝi troviĝas?”

“Jes, mi konas la lokon.”

“Alva konfiskis lian kampon. Mi donas al li alian kampon kaj farmdomon kune kun herbejo en la valo de la rivero Zeno. Senpage dum la kvin unuaj jaroj. Tio estas skribita ĉi tie, sed ankaŭ diru tion al li. Nur lia filo scipovas legi, sed tiu troviĝas en la malliberejo.”

Post tio li donis al mi papereton kun tri nomoj kaj diris:

“Tiuj ankaŭ sidas en la malliberejo. Ili ne devas pagi decimon al mi ĉi-jare. Sendu iun al iliaj familioj por diri tion.”

“Tuj?”

“Jes.”

“Ĉu tio estas bona?”

“Kial?”

“Kiam iu estas punita, Alva igas observi lian domon por vidi, kiu en- kaj eliras. Nia fratulo povus havi malfacilaĵojn, almenaŭ nun. Post kelkaj semajnoj eble ne plu.”

“Ne estas Alva, kiu faras la leĝojn en Ter Kameren. Ni iras, kien ni volas, ne kien li volas.”

Sed kiam mi volis meti la paperon en mian poŝon, li grumbliis:

“Redonu ĝin. Mi mem alportos ĝin al la familioj.”

“Kaj la vizitanto, patro? La viro ĉe la pordego?”

“Venigu lin.”

## TRIA ĈAPITRO

Kiam mi malfermis la pordegon, la viro diris al mi kolere:

“Ĉu tio devis daŭri tiel longe? Mi kredas, ke mi staris tie tutan horon!”

“Vi povas paroli kun la patro abato.”

La viro eniris. Dum li ligis sian ĉevalon al unu el la ringoj en la muro flanke de la pordego, li jam ne penis kaŝi sian vizaĝon. Mi ne konis lin. Li deĵetis la kapuĉmantelon kaj metis ĝin sur la selon de la ĉevalo. Tiam, laŭ la belaj vestaĵoj, kiujn li surhavis, kaj lia blazonŝildo, mi vidis, ke li estas nobelo. Li estis juna kaj eleganta. Mi antaŭiris lin al la laborĉambro de la abato, kaj

post kiam mi enirigis lin, li paŝis ĝis antaŭ la abato, kiu iris renkonte al li, falis sur la genuoj kaj kisis lian dekstran manon.

“Vian benon, patro,” li diris humile, “kaj helpon por viro en danĝero.”

“Stariĝu!” replikis la abato afable. “Kaj retroiru iomete.”

Li inspektis la junulon kaj diris:

“Vi similas al Willem van der Noot kaj vi portas lian blazonŝildon. Ĉu vi estas filo lia?”

“Jes, patro.”

“Ĉu Jakob?”

“Ne, Jesper, senjoro de Maarlo.”

“Ha, la flirtemulo!”

“Patro, mi petas vin!”

“La drinkemulo! La neniofaranto! La herezulo!”

La junulo fariĝis nervoza. Honteme ride-tante li diris:

“Mi ne sciis, ke la granda abato de Ter Kameren konas tiel bone la malgrandajn nobelojn el la arbarego Zonio. Sed tio, kion vi diras, estas troigita, kaj la lastan, kion vi diris, estas eĉ malvera, almenaŭ tio, kion vi volas diri.”

“Kaj kion mi volas diri?”

La junulo hezitis iomete kaj diris:

“Mi pensas, ke vi volas diri, ke tiu, kiu estas amiko de alipensuloj, ne povas esti amiko de Dio. Laŭ mi li povas.”

“Jen, jen! Sed ni sidiĝu!”

Ili sidiĝis unu kontraŭ la alia en fotelojn kun kusenoj. Fervore la junulo plu parolis:

“Dio estas pli granda ol ni ĉiuj, kaj mi ne povas senti malamikecon por homoj, kiuj nur servas Lin alimaniere ol mi.”

“En via vivo mi ne vidas, ke vi multe servas Dion.”

“Mi ne estas bona ekzemplo, mi scias, sed...”

“Ĉu vi estas dironta al mi, ke en la Evangelio Kristo ĉiam defendis la pekintojn kaj ke li estis bona amiko de Maria Magdalena?”

“Mi ne havas la rajton diri multe pri tio, sed mi kredas, ke viro povas bonfide stari en spuro, kiu ŝajnas al mi malbona, kaj ke tial mi ne devas ĉesi esti amiko lia. Plue...”

Li denove hezitis.

“Kio plue?” demandis la abato kviete.

Maarlo vidis, ke la abato rigardis lin ekzamenante.

“Plue mi ofte demandas min, ĉu ni ĉiuj ne estas serĉantaj ion kaj ĉu estas necese, ke ni ĉiuj trovu la saman solvon por povi senti nin ligitaj unuj kun la aliaj.”

“Vi estas maltaŭgulo,” diris la abato malafable.

“Mi kredas, kion mi diras.”

“Vi kredas, kion diris *mi*,” diris la abato pli laŭte.

“Kion vi volas diri, patro?”

“Ĉu vi mem elpensis tion?”

“Kion?”

“Kion vi diris pri tiu serĉado kaj trovado.”

“Tiel mi sentas tion.”

“Ne, tiel sentas tion *mi*. Vi estas diranta, kion proklamas *mi*. Vi provas flati min. Sendube por persvadi min fari ion. Iu plano, por kiu vi bezonas min. Ĉu ne?”

La junulo konfuziĝis. Tiam denove li ner-voze ridetis kaj diris:

“Mia patro parolis pri vi hieraŭ vespere. Li diris: ‘Patro Albertus, la abato de Ter Kameren, manĝas pulvon sur sia pano. Tuŝu lin, kaj li muĝas kiel kanono. Sed li havas koron el spickuko.’ Tion diris mia patro,” li diris haste.

Mi ŝatis la junulon, kaj la abato ŝatis lin ankaŭ. Mi almenaŭ rimarkis tion je lia voĉo, kiu ne estis vere kolera.

“Kial vi ne volis diri ĉe la pordego, kiu vi estas?”

“Mi pensis...”

“... ke la abato ne malfermus la pordegon, se li sciis, kia pendumindulo staras antaŭ ĝi...”

“Mi estis iomete maltrankvila pri tio, jes.”

“Kion vi volas? Kia estas tiu plano, por kiu vi bezonas min?”

La junulo insiste demandis:

“Donu al mi frokon, patro, kaj lasu min restadi ĉi tie kelkan tempon.”

“Kial?”

“Alva serĉas min.”

“Antaŭ ol Alva serĉis vin, la ĉefjuĝisto serĉis vin. Aŭ la patro de la knabino, kiun vi malvirgigis la antaŭan semajnon. Ĉiam estas iu, kiu serĉas vin.”

“Se Alva trovos min, mi estos senkapi-gita.”

“Kial?”

La junulo impete respondis:

“Kvazaŭ Alva bezonus specialan kialon por senkaptigi nobelon en la Nederlandoj. Ĉu vi ne scias, kio okazos morgaŭ frumate.”

La abato skuis la kapon kaj ordonis:

“Respondu al mia demando!”

“Mi helpis luteranan predikiston,” mallaŭte diris la junulo.

“Kiun luteranan predikiston?”

“Hendrik Pelzer el Dendermonde.”

“Tiun stratkriegulon!”

“Mi ne konas lin persone. Mi volas diri, ke mi konas lian nomon kaj ke mi scias, kion li faras, sed mi neniam aŭdis lin prediki ie sur



herbejo. Mi ne scias, kia viro li estas. Mi nur helpis lin, ĉar mi opiniis..., ĉar mi trovis, ke homo ne devas esti ĉasata pro tiaj aferoj, ne tial ke li..."

Sed la abato interrompis lin kaj ordonis:

"Rakontu, kio okazis."

"La plej multaj predikistoj de la nova doktrino forfuĝis el la lando, kiam ili aŭdis, ke Alva estas venonta. Sed ne Hendrik Pelzer. Li restis kaj provis sekrete plu prediki. Sed tio evidentiĝis neebla. Tiam li kaŝis sin, sed oni ĉaspelis lin kaj fine li decidis fuĝi. Sed jam estis tro malfrue. Hieraŭ oni malkovris lin en barako."

"Per kio tio koncernas vin?"

"La barako staras sur kampo mia."

"Ho! Vi sciis, ke li estas tie!"

"Tio estas la samo por Alva. Li decidis, ĉu oni scias tion aŭ ne."

"Ĉu vi sciis?"

"Jes."

"Ĉu li estis sola en la barako?"

"Ne."

"Kiu aliaj estis ankaŭ tie?"

"Kelkaj el liaj adeptoj."

"Kiom?"

La junulo levis la ŝultrojn.

"Dudek... tridek..."

"Kvardek... kvindek?"

"Mi ne scias ĝuste," diris la junulo.

Subite li eksplodis:

"Vi pridemandas min, kvazaŭ vi volus mezuri, kiel granda estas mia kulpo, sed vi ne povas deziri, ke mi vendu tiujn homojn al la Sangokonsilantaro. Ne vi!"

Denove la abato atente rigardis lin tiel longe, ke la junulo fariĝis nervoza.

"Kial vi rigardas min, patro?" li demandis plendante.

"Estas strange," diris la abato.

"Kio estas stranga, patro?"

"Ĉasaĵo, kiu fuĝas rekte al la restadejo de la ĉasisto."

"Ĉasaĵo, kiu... Mi timas, ke mi ne bone komprenas tiujn vortojn."

"Ĉu vi estas certa, ke vi fuĝis al bona loko?"

"Tion mi ja pensas."

"Kial vi absolute volas kaŝi vin en tiu ĉi monaĥejo?"

"Ĉar mi estos sekura ĉi tie. Ter Kameren estas potenca abatejo kun muregoj kaj fortigitaj pordegoj. Kaj vi estas influriĉa viro. Alva ne kuraĝus entrepreni ion ajn kontraŭ vi. Vi ankaŭ konas mian patron... Vi estas amiko lia."

"Kie estas Alva nun?" demandis la abato.

Li volis elprovi la junulon. Li ne kredis lian rakonton kaj volis aŭdi la veron.

"Ĉu Alva?" la junulo necerte demandis.

"Jes, Alva. Kie li estas nun?"

"Kial vi demandas tion al mi, patro? Ĉu vi havas kialon por supozi, ke mi scias tion?"

"Mi kredas, ke jes. Mi kredas, ke vi scias, kie Alva estas nun kaj ankaŭ kie li estos post nelonge. Ĉu mi pravas?"

La junulo ruĝiĝis.

"Alva nun estas en sia palaco," diris la abato, "kaj post nelonge li estos en tiu ĉi monaĥejo. Mi kredas, ke vi scias tion kaj ke pro tio vi estas nun ĉi tie. Ne pro tiu kriaĉemulo el Dendermonde."

Li rigardis la junulon.

"Ĉu vi sciis tion aŭ ne?"

"Jes, mi sciis tion," konfesis la junulo. "Mi aŭdis tion. Tial mi venis ĉi tien. Vi bone komprenis tion. Kiu do serĉus min tuj en la proksimeco de Alva? Se mi povos havi frokon kaj esti rigardata kiel monaĥo, mi estos pli sekura ĉi tie ol ie ajn. Oni serĉos min ĉie escepte tie ĉi. Hodiaŭ kaj morgaŭ almenaŭ. Poste mi vidos."

"Ĉu vi kredas, ke vi povos mistifi prudentan homon per viaj babilaĵoj?"

La junulo ne ŝajnis multe impresita per la lastaj vortoj kaj protestis:

"Sed patro, kion vi pensas pri mi?"

Tiam li proksimiĝis al la abato kaj demandis, mirigita:

"Ĉu Alva venos ĉi tie? Ĉu li vere venos?"

"Li venos."

"Ĉi-vespere?"

"Jes."

La vizaĝo de la junulo estis tordita.

"Ĉar morgaŭ li senkapigos Egmont."

"Vi ne scias, kial venos la duko," impete diris la abato. "Vi scias nenion pri tio."

"Li volas kaŝi sian nigran animon en unu el viaj ĉeloj! Same kiel la vesperon antaŭ ol li murdis la senjoron de Straelen."

"La duko estas pia viro."

"La duko estas pia fripono," ekkriis la junulo.

"Li venos preĝi. Estas pro tio, ke li venos al Ter Kameren. Por preĝi. Kaj la grafo de Egmont estas malfortulo, kiu ŝanceliĝas de tie ĉi al tie for, kiu hodiaŭ diras tion ĉi kaj morgaŭ tion for kaj kiu ne posedas la forton teni Dion tuj antaŭ si!"

Kvazaŭ batita la junulo staris antaŭ la abato.

"Mi ne komprenas vin, patro," li diris. "Se mi mem ne aŭdus tion el via buŝo, mi neniam kredus tion. Vi staras ĉe nia flanko. Ni scias tion. Kial do vi diras ion tian pri Egmont?"

"Mi ne parolas pri Egmont."

"Jes ja. Vi diris..."

“Vi nur mensogadas!”  
 La junulo ektimis. Li residiĝis, volante impete defendi sin. Sed la abato ekkriis:  
 “Vi diras, ke vi venis por demandi protekton.”  
 “Tio estas vera.”  
 “Tio ne estas vera. Vi ne havas la okulojn de viro, kiu estas en danĝero.”  
 “Mi vere venis por peti vian helpon, patro.”  
 “Ho jes! Mian helpon, sed por kio?”  
 “Por mia sekureco. Neniu rajtas perturbi la trankvilecon de monaĥejo. Soldatoj ne rajtas eniri ĉi tien, se vi ne enlasas ilin. Eĉ ne juĝisto.”  
 “Kaj la senjoro de Maarlo?”  
 “Kion vi volas diri?”  
 “Ĉu la senjoro de Maarlo rajtas profani la trankvilecon de tiu ĉi monaĥeja komunumo?”  
 Mi vidis, kiel la junulo denove ekruĝiĝis. Li ne sciis, kion diri.  
 Tiam haste envenis nia fratulo pordegisto. Anhelante li anoncis:  
 “La duko estas venanta. Li jam elrajdis la urbopordegon. Post kvaronhoro li estos ĉi tie.”  
 La senjoro de Maarlo rapide turnis sin al la pordegisto kaj demandis:  
 “Ĉu li kunhavas sian gvardion, fratulo?”  
 “Jes, mi kredas.”  
 “Ĉu sian tutan gvardion?”  
 “Mi ne scias, kiel granda estas la gvardio de la duko, sed estas proksimume dudeko da soldatoj kun li kaj plue deko da aliaj personoj.”  
 La pordegisto nervoze demandis al la abato:  
 “Patro, ĉu vi mem venos bonvenigi la dukon ĉe la pordego?”  
 Malbonhumore la abato svingis la manon.  
 “Jes, jes, estas ankoraŭ tempo por tio. Iru!”  
 Kiam la pordegisto estis foririnta, la abato direktis sin al Maarlo, kiu akompanis la pordegiston kelkajn paŝojn, evidente por demandi ion, kaj pro tio la abato devis ripeti la demandon.  
 “Kial vi venis al Ter Kameren?”  
 La junulo rigardis lin.  
 “Mi jam diris tion al vi.”  
 Sed la abato ignoris tiun respondon.  
 “Kial vi venis ĝuste la vesperon, en kiu ni atendas Alva.”  
 “Tial ke...”  
 “Kial vi demandis min tiel nervoze, ĉu la duko certe venos?”  
 “Tio rilatas al...”  
 “Kial vi demandis al la pordegisto, kiom da soldatoj Alva kunhavas?”

Kaj tiam, antaŭ ol Maarlo povis respondi ion:

“Kial vi rakontis tiun fabelon pri luteranoj fuĝintaj en barakon?”

“Oni vere trovis tiujn fuĝintojn en barako, kiel mi diris.”

“Sed ne sur kampo via!”

Konsternita la juna nobelo rigardis la abaton, kiu plu paroladis:

“La luteranoj, pri kiuj vi parolis, estis kaptitaj en barako sur kampo de Jan de Hinckaert. Via bieno eĉ ne limtuŝas tiun de Hinckaert. Vi do ne povas esti persekutata de Alva pro tiuj homoj. Verŝajne vi ne estas fuĝanta, kaj se vi ne estas fuĝanta, vi ne bezonas protekton. Vi tamen estas ĉi tie kaj demandas, ĉu vi povas porti frokon. Kial? Ek, diru al mi la veron!”

Li gajnis! Li ĉiam gajnas tiuspecajn batalojn! Neniu povis rezisti liajn esplorantajn okulojn kaj akran menson. Venkita, la junulo sinkigis la brakojn kaj rigardis momenton la plankon.

“Bone,” li diris rezignacie. “Tiam mi diros ĉion, esperante per ĉiuj miaj fortoj, ke vi tamen helpos nin,” li diris. “Oni jam avertis min, ke neniu povas mistifi la abaton de Ter Kameren. Mi provis, sed mi malsukcesis.”

Li surgenuiĝis antaŭ la abato kaj pasie petegis:

“Patro, bona, kara patro, kiu muĝas kiel leono, sed neniam lasas alian en embaraso, aŭskultu, kion mi devas demandi al vi, kaj helpu nin.”

## KVARA ĈAPITRO

Mi havis la strangan antaŭsenton, ke neordinara danĝero pretiĝas en nia monaĥejo, kiam la junulo komencis paroli. Mi ne sciis, ĉu estas pro la pasia tono de la juna nobelo aŭ pro la impreso, ke li estas iu, por kiu idealo estas pli grava ol la propra vivo. Ankaŭ la abato havis tiun senton – almenaŭ mi kredas tion. Nur tio eksplikis lian fortan volon, malkovri la sekreton de la junulo. Alie la abato jam de longe estus ĵetinta lin eksteren. Sed li ne faris tion. Anstataŭe li rigardis kun malluma mieno la surgenuantan nobelon, kiu en tiu pozicio ŝajnis ankoraŭ pli impona.

“Ĉu vi estis en la urbo la lastajn tagojn, patro?” li demandis. “Ekde kiam la novaĵo konatiĝis, ke Egmont estos senkapigita, regas konsterneco, timo kaj kolero. La preĝejoj estas plenaj, kaj ĉie oni vidas homojn kunstarantajn en grupoj. Soldatoj daŭre marŝadas tien kaj reen por dispeli ilin, sed tio ne utilas. De kiam la soldatoj estas

foririntaj, la grupoj denove kunfluas kiel la ondoj de rivero disigitaj per remilo. La homoj estas senkonsilaj. Ili sentas sin minacataj. Ili estas en danĝero.

“Ili ne estas en danĝero. En danĝero estas nur viro kun malpura konscienco,” murmuris la abato.

Maarlo ne komprenis, ĉu tiu viro estas li aŭ iu alia. Li levis la kapon kaj daŭrigis sian pledon.

“Tiu ĉi lando ĉiam estis libera. Tion ni havas en ni. Nu, neniu defendis tiun liberecon, kiun ni amas kaj bezonas por vivi, tiel fervore kiel la grafo de Egmont.”

“La grafo de Egmont, kiel ĉiuj aliaj nobeloj, unuavice plenigis siajn poŝojn kaj, kiel ĉe ĉiuj aliaj, lia popolo devis helpi lin fari tion, ĉar li certe ne povis fari tion sola. Ne inverse!”

Sed la junulo impete defendis Egmont.

“Ne, patro, ne! Tio ne estas vera! Egmont estas preskaŭ princo. Sed li estas ankaŭ nia kamarado. Oni ne devas timi lin, kiam oni estas en embaraso. Oni ne serĉu lin en la pompecaj salonoj de lia kastelo! Li havas belan kastelon, sed kiam oni deziras paroli al li, oni devas serĉi lin en trinkejo. Tie oni trovas lin, kaj oni rajtas sidiĝi flanken de li. Ĉu vi scias, kion li ŝatas plej multe? Deĵeti sian mantelon dum kermeso kaj meze de bruanta kaj krianta homamaso mezuri siajn fortojn kun tiuj de luktisto. Mi jam vidis lin partopreni en arkpafista konkurso. Li venkis, sed fordonis la premion al malriĉulino, kaj ĝis malfruege en la nokton li festenis kun la tuta bando de la pafistoj. Tiajn festenojn vi ne multe ŝatas, patro. Mi scias. Sed kion mi ŝatas, estas, ke li faras tion ne nur kun ni, malgrandaj nobeloj, kiuj liveras soldatojn al li kaj batalas sub lia komando, sed ankaŭ kun la soldatoj mem, kun metistoj, kun farmistoj kaj eĉ kun taglaboristoj.”

La okuloj de la juna viro brilis pro entuziasmo.

“Oni diras, ke li similas iom al nia karmemora imperiestro Karlo, kiu naskiĝis en Gento kaj parolis flandre. Ne al tiu altnaza en enviema bubo, kiu preferas loĝi en Hispanio kaj nomas sin ‘Felipe’ laŭ la hispana maniero. Karlon oni vidis ĉe la popolo.”

“Jes, oni ankoraŭ ĉiam vidas la spurojn, kiujn li postlasis,” mokis la abato, “en formo de bastardoj.”

La senjoro de Maarlo nervoze ridetis.

“Jes, ankaŭ tio,” li koncedis, farante senhelpan geston. “Sed Egmont estas la subteno de la Nederlandoj, ilia forto, ilia animo. Tiel mi sentas tion. Tiel estas. Kaj nun li estas en malliberejo, jam de dek monatoj.”

La abato senpacience intervenis:

“Jes, ni scias, kie li estas nun.”

“En kelo inter la ratoj,” Maarlo amare daŭrigis sian penson. Tiam li faldis la manojn, kvazaŭ li volus preĝi.

“Mi parolis kun iu, kiu vidis lin antaŭ kelkaj tagoj.”

La abato refariĝis atenta.

“Kiel li fartas?”

“Malbone. Li estas pala kaj maldika. Lia rigardo estas malbrila. Li estas ombro de si mem. La morto jam ŝvebas ĉirkaŭ li. Kaj morgaŭ...”

“Jes, jes, jes!” ekkriis la abato. “Ni scias: morgaŭ falos la hakilo por meti finon al lia vivo.”

“Ne!” diris la junulo mallaŭte, sed firme.

“Kiel do: ne?”

“La hakilo ne falos morgaŭ.”

Maarlo suspiris: finfine la vero estis dirita, sed ankaŭ la plano perfidita. Ne komprenante, la abato fikse rigardis lin.

“Kion vi diris?”

La juna nobelo fervore kaj fiere anoncis:

“Sescent kavalerianoj kaj du mil infanterianoj estas pretaj verŝi sian sangon por malebligi tion.”

“Ĉu vi estas elpensanta tion?” demandis la abaton, ekzamenante lian vizaĝon.

“Tute ne, patro, estas la vero.”

“Ĉu sescent kavalerianoj, vi diris?”

“Jes, kaj du mil infanterianoj.”

“Hmm, nun mi komprenas ĉion. Kie ili troviĝas?”

“En Ohain.”

“Tie loĝas senjoro Jan de Hinckaert. Ĉu li komandas la trupojn?”

“Ne tion faras mia frato, Jakob.”

“Kiu ankoraŭ estas kun li?”

“Filip van der Meeren, la senjoro de Zaventem.”

“Kaj Jan van Hinckaert?”

“Li organizis ĉion.”

“Hinckaert estas kviettemperamenta viro,” objetis la abato. “Li ne faras nekonsideritaĵojn. Kial li subite deziras batali?”

“Ne tiel subite.”

“Kio okazis?”

“Li vojaĝis al Hispanio kun amiko por petegi pardonon por Egmont de la reĝo.”

“Mi scias nenion pri tiu vojaĝo.”

“Ĝi tamen okazis, kaj li havis leteron de la grafino de Egmont por la reĝo.”

“Ĉu tio estas vera?”

“Mi scias, ke tio estas vera. Estas ankoraŭ aliaj, kiuj scias tion, sed ne multaj. Ni tenis la vojaĝon sekreta, ĉar ni timis, ke Alva povus kaŭzi problemojn, kiam li aŭdos, ke ni iras al la reĝo post lia dorso.”

“Kiel la afero fartis ĉe la reĝo?”

“Nebone. Ni eble ne sufiĉe atentis pri tio, ke la reĝo povus koleriĝi, ĉar ni faris tion sen la aprobo de Alva.”

“Kaj li koleriĝis?”

“Jes. Hinckaert transdonis la leteron de la grafino kiel enkondukon al la ĉambelano de la reĝo. Li pensis, kiel ni, ke Filipino ne povas esti forgesinta, ke oni dankas la venkon apud Saint-Quentin grandparte al Egmont, kaj ke la venko apud Grevelingen estas tute lia laboro. Hinckaert pensis, ke Filipino ne rifuzos akcepti lin, kiam li vidos la leteron de la grafino de Egmont.”

“Sed li tamen rifuzis?”

“Jes. La reĝo diris, ke la letero devus esti donita al Alva. Li redonis la leteron al la ĉambelano, ne leginte ĝin, kaj lasis Hinckaert stari antaŭ sia pordo.”

“Se estas vere, tio estas neaŭdita ofendo. Ĉu vi estas certa, ke tio ne estas fabelo?”

“Tre certa, patro. Mi mem akompanis Hinckaert ĝis Orleano. Tie francaj amikoj atendis lin por vojaĝi kun li al Hispanio. Hinckaert koleris. Li estis ofendita, ne pro tio, kion oni faris al li, sed pro tio, kion oni faris al la grafino. Lia plano estis preta, kiam li alvenis hejme.”

“Lia plano? Kion vi volas fari?”

“Kapti la dukon.”

La abato rigardis lin, konsternita.

“Ĉu vi frenezas?”

“Tute ne, patro. Ni ellaboris planon ĝis en la plej malgrandaj detaloj. Ĝi ne povas malsukcesi.”

“Do vi volas kapti Alva: ĉu vi sola?”

“Ne. Estas mia tasko, peti de vi loĝejon, malfermi nokte la pordegon, enlasi la trupon de miaj viroj kaj kapti kun ili Alva.”

“Ĉu kapti aŭ mortigi?”

“Kapti.”

Maarlo rimarkis, ke la abato ne kredas lin kaj certe tial rifuzos sian helpon. Tial, post iom da hezito, li sincere aldonis:

“Se tio estos ebla.”

“Kaj se tio ne estos ebla?”

“Ni mortigos lin!” respondis la junulo, ekscitita.

“La abato diris nenion kaj mallevis siajn brovojn. Konante la abaton, Maarlo sentis, ke tiu neniam permesos tion, sed li havis la firman intencon plenumi sian taskon.

“Ni scias, ke stranga amikeco ligas vin kun Alva. Vi malaprobos ĉion, kion li faras. Vi havas violentajn kverelojn kun li. Sed li restas amiko via. Tial mi promesas al vi, ke ni ne mortigos Alva, se estos nur eble.”

“Kion vi intencas fari? Ĉu teni lin kaptita, ĝis Egmont estos liberigita?”

“Jes, tiam li povos libere foriri. Li vere

povos. Ni ne intencas mortigi lin. Ni kaptos lin kaj tenos lin kiel ostaĝon ĝis la liberigo de Egmont.”

Tiam la pordegisto denove haste eniris kaj diris sen atendi la permeson paroli:

“Patro abato, la duko jam trairis la arbaron Ter Kameren. Li alvenos ĉe la pordego post kelkaj minutoj. Urĝas, ke vi pretigu vin por bona vorto.”

“Lasu min trankvila,” diris la abato malbonhumore.

Sed la pordegisto, tre maltrankviligita, insistis:

“Vi ne povas deziri, ke mi faru tion, patro, ĉu? Mi ne scius, kion diri!”

“Mi venos! Mi venos!”

Li pelis la pordegiston eksteren per kole-reta mangesto kaj malkontenta diris al Maarlo:

“Ne tiel surgenuu, kvazaŭ vi volus ricevi la Sanktan Komunio. Sidiĝu!”

Ĝoja kaj esperplena la junulo eksidis kaj demandis:

“Ĉu vi helpos nin, patro? Komence mi ne kuraĝis diri al vi ĉion ĉi, ĉar mi ĉiam devis pensi pri via amikeco kun Alva, kaj ankaŭ ĉar eble vi trovus nian planon nekonsiderita kaj absurda. Pardonu min. Mi elpensis rakonteton por ne fiaskigi nian planon. Cetere laŭ mi estus pli bone, se vi ne konus nian planon. Por via sekureco kaj tiu de la monaĥejo. Sed mi ne volas vivi en lando, kie la grafo de Egmont estas senkapigita! Mi ne volas vivi en mondo, kie viro aganta laŭ sia konscienco devas morti kiel fripono.”

“Ne tiel ekscitiĝu!” diris la abato. “Kie estas viaj viroj nun?”

“En mia kastelo. Tujkiam estos mal-lumiĝinte, ili venos en grupetoj al la arbaro Ter Kameren, kie ili kuniĝos kaj kaŝos sin. Proksimume meznokte ili venos ĉi tien. Estas grave por nia plano, ke mi povos enirigi ĉi tien miajn virojn je la interkonsentita horo.”

“La arbaro troviĝas proksime al la urbo. La noktaj patroloj trauros ĝin.”

“Ni scias tion. Ne maltrankviliĝu: kiam la patroloj venos, miaj viroj estos nevideblaj.”

Maltrankvile li rigardis la abaton, kiu ĉiam estis klare sendecida.

“Ni scias, patro,” li daŭrigis, “ke vi estas turmentata. Vi diris iam antaŭe: ‘Alva pravas. Li servas la reĝon. Estas lia devo, do lia rajto, persekuti la herezulojn, puni la ribelulojn, eĉ dure puni, ĉar majestofendo estas grava delikto’. Tion vi diris. Sed ŝajnas al mi, ke vi ne vere kredas tion. Ne plu. Vi ne amas reĝon Filipino. Vi nomis lin inkvizitoro, kaj vi diris, ke la inkvizitoroj

estas la lastaj farizeoj. Mi do kredas, ke ne estas vi, kiu diris tion pri Alva, sed via ofico.”

“Kion vi scias pri mia ofico?” demandis la abato, iritita.

Hezite la junulo respondis:

“Vi diras, ke paco kaj libereco estas io bona, sed ke oni ne devas deziri ilin, se la Eklezio suferas pro tio. Vi diras, ke la Eklezio estas pli grava ol paco kaj libereco, ĉar ĝi reprezentas Dion kaj predikas Lian vorton. Ne libereco kaj paco estas la plej gravaj bonoj, sed fideleco al la vortoj de Dio. Tion vi diris.”

“Jes, kaj estas vere.”

“Sed vi diris ankaŭ, ke ĉiu homo devas decidi mem, kion li faros. Vi nomas tiun liberecon lia sanktejo, kiun neniu rajtas profani. Vi diris, ke Kristo neniam uzis eĉ la plej leĝeran perforton por igi la homojn akcepti Lian doktrinon, kaj ke Li certe malaprobis, ke oni mortigu herezulojn. Vi diris tion en via prediko la antaŭan palmodimanĉon ĉi tie en la kapelo de la monaĥejo. Mia patro ĉeestis la meson kaj rakontis al ni vian tutan predikon.”

La abato sentis sin kaptita kaj klinis la kapon, sed li estis ankoraŭ ne venkita. Tiam li leviĝis kaj diris, malkontenta:

“Mi ne deziras diskuti pri tiuj problemoj kun vi, senjoro.”

Ankaŭ Maarlo leviĝis, kredante, ke li jam perdis la batalon kontraŭ la abaton, sed li ne volis kaj ne povis cedi. Tro multe estis dependonta de la sukceso de lia misio.

“Unu vorto de vi kaj ankoraŭ tiun ĉi nokton Egmont estos libera,” li diris kun insisto. “Ĉu vi konsideras, kion tio kaŭzos en la tuta lando? Ĉiuj sonoriloj sonoros, la festo-sonoriloj! La homoj dancos sur la stratoj kaj ĉirkaŭbrakos unuj la aliajn. Pro ĝojo junaj patrinoj levos siajn bebojn super la kapon kaj diros: ‘Nur pli malfrue vi komprenos, kiel mi tiel ĝojas, etulo!’”

“Vi estas danĝera revulo,” grumblis la abato, kiu volis eliri.

La junulo sekvis lin kaj prenis lian dekstran manon per ambaŭ siaj manoj kaj haltigis lin.

“Mi revas pri libereco, patro. Lasu min fari tion, mi petas. Diru, ke mi povos.”

“Mi ne scias. Mi portas la tutan respondecon pri tiu ĉi monaĥejo. Mi ne povas endanĝerigi ĝin, miksanter min en tiajn danĝerajn aventurojn. Ĉu vi komprenas?”

“Sed tion vi ne faros! Ĉiun nokton vi gastigas homojn: pilgrimantojn kaj aliajn. Ili venas kaj foriras. Vi plej ofte ne konas ilin, kaj vi ankoraŭ ne scias, kio fariĝas en ili aŭ kion ili intencas fari. Se iu el ili faras ion

malbonan, vin ne trafos kulpo. Ne la monaĥoj estas punitaj, kiam gasto malobservas la leĝojn de la lando kaj la regulojn de la gastamo.”

“Ĵuru al mi, ke vi ne mortigos Alva,” diris la abato.

“Mi jam diris, ke ni kaptos lin kaj ellasos lin interŝanĝe por Egmont.”

“Ĵuru!”

“Jes, mi ĵuras.”

“Sur la biblio.”

La abato prenis libregon de sia skribtablo kaj tenis ĝin antaŭ Maarlo.

“Ĉu tio estas vere necesa?” demandis la nobelo, iom iritita. “Alva ne tiom valoras laŭ mi.”

“Ĵuru sur la biblio!”

Maarlo metis la dekstran manon sur la biblion kaj ĵuris.

“Oni diras, ke Alva vidas monstron,” li diris poste.

La abato skuis la kapon.

“Li ne vidas monstron, li estas monstro.”

“Precize,” diris la nobelo. “Sed kiam oni diras tion sur la strato, oni estas konsiderata kiel herezulo.”

La sola diferenco inter li kaj la kutimaj monstroj estas, ke li mem deziras esti monstro. Li ne estis misformita kontraŭ sia volo. Li volas esti monstro, kaj li eĉ kredas, ke Nia Sinjoro donis al li la taskon esti monstro.”

“Ĉu li frenezas?”

“Ne, li timas.”

“Mirigita Maarlo rigardis la abaton.

“Ne estas eble. Kion povus timi viro kiel Alva? Ne morton. Li estas kuraĝa soldato.”

“Jes, sed tie ĉi ne estas batalkampo. Mortigi homojn dum pactempo estas multe pli malfacile ol dum batalo. Tiam oni luktas por savi sian vivon, ĉar ankaŭ la malamiko estas armita kaj volas mortigi vin. Ne. Alva timas solecon.”

“Solecon? Ĉu li estas soleca?”

“Li estas ĉirkaŭita per kadavroj, kiuj atakas lin, kiam li estas sola.”

“Ha, mi komprenas. Kaj tial li venas ĉi tien por provi malpezigi sian konsciencon.”

“Jes, mi pensas.”

Tiam la abato turnis sin al mi.

“Camillus.”

“Jes, patro?” mi diris, antaŭenirante.

“Donu frokon kaj ĉelon al la senjoro de Maarlo. Avertu la aliajn, ke li devas esti rigardata kiel membro de nia komunumo. Sed nenia vorto pri nia interparolado, ĉu vi komprenas?”

“Jes, patro. Bonvolu sekvi min, senjoro.”

“Dankon, patro!” diris la junulo pasie, denove surgenuiĝante kaj provante kisi la

dekstran manon de la abato, kiu rapide retiris ĝin kaj forlasis la ĉambron.

## KVINA ĈAPITRO

Post kiam mi donis frokon al la junulo el la kofro de la vestoĉambro kaj kondukis lin al ia ĉelo, mi rapidis eksteren. La monaĥoj kaj la laborfratuloj jam kolektiĝis ĉe la pordego, kaj la servistoj kaj taglaboristoj staris kune ĉe angulo de la staloj.

La pordego estis malfermita. Mi aŭdis huffrapetadon sur la vojo, kaj kiam mi alvenis ĉe la pordego, mi vidis, kiel proksimume tridek rajdistoj alproksimiĝis je ducentmetra distanco. Kvar soldatoj rajdis ĉirkaŭ dekon da metroj antaŭ la aliaj. Tiam sekvis la aliaj. Kiam la grupeto estis proksime, mi vidis antaŭe grandan figuron, kiun mi rekonis danke al la multaj priskriboj, kiujn mi aŭdis. Kun bateganta koro mi vidis, kiel alta kaj malluma li estas, kaj kiel serioza, eĉ sombra ŝajnas lia vizaĝo. Li parolis al la rajdistoj flanke de si, dum liaj manoj ripozis sur la selbutono. En iu momento mi vidis lin rideti, nur tre mallonge, kvazaŭ sulketo glitus sur akvo. Tiam li denove fariĝis serioza. Lia vizaĝo estis tiel grize blanka, kaj liaj okuloj estis tiel kavaj, ke li ŝajnis malsana. Oni jam antaŭe parolis pri tio, dirante, ke li suferas de artrito kaj konstante sentas doloron en la artikoj.

Subite mi vidis lin indiki nin per la mano, kaj tiam li ekrajdis en troto, sola antaŭ la aliaj, en nia direkto. Li haltis ĉe la abato, kiu staris je deko da metroj antaŭ la pordego meze de la vojo, kaj mallaŭte kaj ridetante diris:

“Bonan vesperon, patro abato. Mi estas feliĉa, ke vi povas gastigi min.”

“Estu bonvena en nia monaĥejo, don Fernando,” resalutis lin la abato.

“Mi ne scias, kiel danki vin,” Alva diris. “Sed se mi estus en via loko, mi misuzus tiun ĉi okazon por rakonti al mia gasto, ke la monaĥejo urĝe bezonas novajn mesvestaĵojn.”

Kiel fremda estis la brilo en liaj okuloj! Kun granda peno kaj pro doloro tordita vizaĝo, li deĉevaliĝis, kaj tiam la rajdisto, kun kiu li parolis survoje, aliĝis al li.

“Patro, mi kredas, ke vi jam konas mian filon Fadrique,” diris Alva.

“Jes, mi havas tiun honoron,” respondis la abato, klinante la kapon en signo de saluto.

“Hmm,” rimarkis Alva, “el la tono, en kiu vi diras tion, mi povus konkludi, ke vi vere konas lin. Fadrique, filo, vi ne ŝajnas havi

bonan reputacion ĉi tie.”

Ni ĉiuj konis don Fadrique, kvankam ankoraŭ ne lian malaltan staturon, kiun ni nur tiam vidis unuafoje, sed jes la brutalecon kaj kruelecon, kun kiuj li agis kiel oficiro.

Post la trupeto da soldatoj sekvis ankoraŭ kelkaj aliaj rajdistoj, kiuj ne estis en uniformo. Kiam la abato eniris kun Alva, mi vidis, ke la grafo de Mansfeld kaj Viglius akompanas lin.

Antaŭ la alveno de Alva, la grafo de Mansfeld eble estis la plej fidela kunlaboranto de la guberniestrino. Ankoraŭ ĉiam li penis per ĉiuj siaj fortoj akceptigi al Alva la vidpunkton de Margareta de Parma – repaciĝi, ne puni. Li estis nobela, honesta kaj digna viro.

Viglius estis la prezidanto de la Konsilantaro de Justico, malalta, sendube lerta viro, kapabla intertraktanto, sed iomete fihumila, ĉiam preta rondigi la anguletojn kaj laŭ tio, kion mi aŭdis, sufiĉe havema.

Ankaŭ Berlaymont, la estro de la financoj, estis tie ĉi kaj kelkaj aliaj nobeloj el la ĉirkaŭaĵo de la guberniestrino.

Aperis, ke ili ĉiuj provis, dum la posttagmezo, paroli al Alva, kiu komence ne volis akcepti ilin, sed fine promesis, danke al la interveno de la grafo de Aerschot, doni al ili la okazon paroli kun li dum la malfrua vespero en la monaĥejo.

Dum ili iris al la gastoĉambroj kaj la soldatoj prizorgis la ĉevalojn en la staloj, la abato kondukis Alva kaj Fadrique al sia laborĉambro.

“Bone,” diris la duko, kiam li vidis la fajron, kiun fratulo Andreas bruligis en la fajrejo. “Mi ŝatas tion.”

Kun suspiro li sinkis en unu el la foteloj apud la fajro.

“En kia malbenita lando do vi loĝas!” li plendis. “Junio indikas la kalendaro, sed la tutan tagon oni kuras tra pluvo, kaj nokte oni malvarmiĝas en sia lito. Kaj ĉiam tiu malvarmeta vento. Kia ĝi povus esti krom malvarmeta, kiam oni konas la Nordan Maron, de kie ĝi alblovas. Maro kvazaŭ koŝmaro: griza kaj muĝanta, kaj ĉiam tiuj mevoj, kriantaj kiel fantomoj.”

Li demetis sian kaskon, forĵetis siajn gantojn, metis siajn piedojn sur la fajroŝtonon kaj frotis siajn longajn, palajn manojn.

“Granda ĉielo! Kiel mi sopiras esti en Toledo!” li suspiris. “Mankas al mi ĝiaj altaj muregoj, ĝiaj placetoj kun platanoj, daktilujoj kaj figuoj, ĝiaj azenetoj, kaj ĉie, kien oni rigardas, en ĉiuj stratoj kaj stratetoj, tiuj

blankaj, varmaj muroj, kontraŭ kiuj oni povas vespere premi sin kun disetenditaj brakoj kaj kruroj en formo de stelo, kaj senti la varmon penetri en la korpon. Ĉu vi konas la murojn de Toledo, patro?”

“Jes, mi vidis ilin.”

“Sed vi neniam staris kontraŭ ili. Vizitantoj ne faras tion. Cetere la muroj ne estas ĉie blankaj, sed ankaŭ flavaj, grizaj kaj tie kaj tie ĉi okra- aŭ oranĝakoloraj, tiel konsistigante la tipe multkoloran riĉecon, kiun nur la suno, la polvo kaj la varma vento de Hispanio povas formi.”

Li turnis sin al sia filo kaj diris:

“Fadrique, kion vi donus por esti tie for, en Toledo, kaj povi rajdi tra la montoj, niaj montoj, kaj ripozi posttagmeze en la *posada*<sup>2</sup> de Enrique, trinkante el ŝtona kruĉo lian nekompareblan vinon?”

Malkontenta, ŝanĝante la temon, Fadrique replikis:

“Sed kial vi absolute volas, ke mi restu ĉi-nokte ĉe vi? Cetere mi ne komprenas, kiam vi ĉiam iras al monaĥejo.”

Kviete la patro petis:

“Restu ĉe mi. Por unu fojo.”

Lia dolĉa insista voĉo sonis strange en miaj oreloj kaj mirigis min.

“Kial do?” demandis la filo. “Ĉio estas denove kvieta en la urbo. Tio kostis al mi penegon, sed mi sukcesis. La stratoj estas mal-plenaj jam unu horon. La pordegoj estas fermitaj kaj la enirejoj al la Granda Ven-doplaco barita per ĉenoj. La ĉarpentado de la eŝafodo komenciĝis, kaj ĉie patroladas miaj soldatoj. Kiu eliras sur la straton, estas enfermita. Komence la loĝantoj ne kredis tion, sed ili rapide ŝanĝis sian opinion. Ne faru do al vi zorgojn.”

“Mi ne faras al mi zorgojn,” replikis Alva, “almenaŭ ne pri tio.”

“Pri kio do?”

“Pri nenio. Mi estas nur iom laca. Restu ĉe mi ĉi-nokte, Fadrique.”

“Se vi estas laca, ripozu do. Por tio vi ne bezonas min.”

“Mi ne estas laca fizike, sed mense.”

“Kiel do? La leteroj estas skribitaj kaj subskribitaj. La kuriero estas foririnta al Hispanio. Ĉio estas farita! En la nomo de la ĉielo, kio do estas al vi? Antaŭe vi ne estis tia. Nun vi nur cerbumas, pensaĉas... kaj vi almozpetas amikecon! Deskuu tiujn nigrajn pensojn de vi kaj festenu foje bone! Tio faras la vivon pli malpeza.”

“Ne parolu tiumaniere, filo. Vi ŝatas moki kaj paroli prave-malprave, sed homo, ĉiu

homo bezonas retiriĝi iam kaj iam por esti sola kun si mem kaj Dio. Tion vi scias.”

“Scias... scias...” murmuris Fadrique. “Mi scias, ke vi estas granda admiranto de Erasmo, kvankam ne sur la strato. Vi diras, ke la biblio tre urĝe devas esti science ekzamenita kaj senerare tradukita, ke pluraj naivaj rakontoj devas esti forstrekita el ĝi kaj ke iuj ekleziaj lokoj nepre devas esti purigitaj.”

“Silentu!” diris Alva kolere.

“Tion vi diris: iuj ekleziaj lokoj devas esti purigitaj.”

“Silentu do, mi diras!”

“Sed kiam prezentiĝas al vi la okazo fari tion, vi ne purigas la monaĥejojn. Vi eĉ iras al ili kaj enfermas vin en ili.”

Alva suspiris, skuante la kapon.

“Patro, vi maljuniĝas,” diris la filo mokante. Tiam li deklaris tre energie:

“Mi ne faros tion. Se vi absolute deziras resti ĉi tie ĉi-nokte, mi konsentas, patro, sed mi ne restos. Vi ne devas postuli de mi neeblecon.”

Li volis foriri, sed Alva kviete diris, ne turnante sin:

“Mi petas vin resti ĉe mi tiun ĉi nokton.”

“Jes, mi aŭdis tion, sed mi ne faros tion.”

“Jes ja, vi faros tion.”

Oni aŭdis ŝanĝon en lia voĉo. Fadrique haltis kaj hezite rigardis la kliniĝintan dorson de sia patro.

“Mi bedaŭras, sed mi devas insisti,” plu diris la duko.

“Ĉu vi vere ...?” komencis Fadrique.

“Sidiĝu tie,” ordonis la patro, indikante fotelon ĉe la fajro.

“En la nomo de la ĉielo, patro...”

Tiam Alva rektiĝis kaj kolere ekkriis:

“Ne plu malfermu vian impertinentan buŝegon kontraŭ mi! Se en tiu momento vi estas ankoraŭ libera viro kaj ne enfermita fripono, vi dankas tion al mi! La reĝo intencis ekzili vin al Oran pro via malmorala konduto, sed mi petegis lin sendi vin tien ĉi al mi, kaj li permesis tion.”

Fadrique sidiĝis sur la indikitan sidejon, sed ne silentis.

“Bone... Estas ja bone. Se vi trovas necese ĉiam rememorigi tion al mi... Kvankam oni tre rapide parolas pri malmorala konduto, kiam la patro de la knabino havas iom da influo.”

Tiam li turnis sin al sia patro.

“Mi ankaŭ povus rememorigi al vi kelkajn aferojn, laboretojn de ne tre propra speco, kiujn mi faris por vi, ĉar vi mem ne ŝatis plenumi ilin, sed tamen preferis ‘teni ene de la familio’.”

---

<sup>2</sup> Hispana gastejo.

Ankoraŭ iom nervoza, sed jam denove bonkora, Alva diris:

“Mi scias tion, filo. Vi estas bonega leŭtenanto. Mi malofte havis pli bonan. Pri tio mi jam dufoje skribis leteron al la reĝo. Cetere ne estas nur por havi vin ĉe mi, ke mi venigis vin al la Nederlandoj. Kiam mi foriros de ĉi tie, mi volas, ke vi sukcedos min en tiu ĉi posteno. Mi faras, kion mi povas por atingi tion.”

“Mi dankas vin pro tio, patro. Sed intertempe mi devos sidi la tutan nokton en tiu ĉi monaĥejo kiel punita bubo,” protestis la filo.

Sed Alva jam ne aŭdis lin. Li fikse rigardis la fajron, dirante:

“Tiu ĉi estas stranga momento.”

La brileto de la fajro prilumis lian vizaĝon.

“Morgaŭ frumatene la grafo de Egmont estos ekzekutita,” li diris. “Mi subskribis lian kondamnon al morto kaj tiel ekfunkciigis la ekzekuton. Mi bedaŭras, ke mi devis fari tion, sed mi ne povas agi alimaniere. La reĝo atendas tion de mi. Mi ne povas senluziigi lin.”

Tremo kuris laŭ mia dorso, kaj la abato, kiu estis elverŝanta vinon en glasojn, kiujn mi prenis el ŝranko, haltis kaj rigardis lin.

Mi aŭdis, kiel ankaŭ Fadrique suspiris.

“Jen li rekomencas,” li diris.

“Estas terura respondeco,” diris Alva, ne atentante pri sia filo. “Ĉi-vespere oni provos igi min ŝanĝi la verdikton. Kiu scias, kio okazos, kiam mi rifuzos? Kaj ili scias, ke mi rifuzos. Eble oni provos murdi min por preventi la ekzekuton. Mi havas la impreson, ke io pretiĝas, ia malespera ago. Feliĉe mi troviĝas en monaĥejo. Nenio povas okazi al mi ĉi tie.”

La abato staris senmove kun la kruĉo en la mano kaj fikse rigardis lin

Post mallonga paŭzo, Alva diris:

“Ŝajnis al mi, ke hodiaŭ nokte okazos io grandioza, okazos splito de la tempo, per kiu ĉio antaŭa estos malnova, kaj tio kio sekvos, nova.”

Mi aŭdis tremon en lia voĉo, kiam li diris:

“Kaj mia mano estos la hakilo, kiu plenumos tiun teruran spliton.”

“Ho, kiel sekuraj ni sentas nin, starante per la dorso kontraŭ muro en Toledo,” diris Alva, “sed kia timego, se la muro renverŝiĝus,” diris Alva.

Mi aŭdis, kiel ankaŭ Fadrique suspiris.

“Jen, li rekomencas,” li diris.

Timo... La abato estis dirinta, ke Alva havas timon...

“Patro, ne diru sensencaĵojn,” diris Fadrique. “Jam la tutan tagon vi agis strange. En la kortumo vi jam estis tiel distrita, ke Vargas daŭre devis frapeti vin sur la brakon.”

La abato proksimiĝis kun la vinkruĉo en la mano kaj demandis al Alva:

“Vi parolis pri muro. Kia muro?”

“Mi estas hispano, patro. Karlo konis la Nederlandojn kaj Hispanion tre bone kaj ne kondutis, kvazaŭ ne estus diferenco inter hispanoj kaj nederlandanoj. Sed reĝo Filipo estas malsama. Li estas hispano kiel mi. Por li ekzistas nur subuloj. Ĉu vi vidas la diferencojn inter ili, patro?”

“Mi supozas, ke jes,” respondis la abato.

“Mi nek amas nek komprenas tiun ĉi landon, patro. Ĝi estas malseka kaj malvarma, ĝi havas grizan ĉielon kaj ĉie estas kornikoj, kiuj flugas malrapide kaj grakas malagrabla aŭ sidas senmove sur la arbopintoj kvazaŭ nigraj makuloj. Mi ankaŭ ne amas la popolon. Mi ne scias, kio fariĝas en la kapoj de la homoj. Ili multe manĝas, drinkaĉas, brudas kaj laŭte ridegas, kaj ilia plej ŝatata okupo estas negocado – aĉetado kaj vendado. Kiam mi pensas pri tio, mi kompatas ilin. Sed oni ne povas vere kompati ilin, ĉar se oni renkontas ilin, ili staras rekte antaŭ oni, rigardas onin per impertinentaj okuloj kaj ridas.”

Tiam oficiro eniris kaj diris:

“Via Duka Moŝto, la grafo de Mansfeld igas demandi al vi, ĉu la aŭdienco povas nun okazi.”

Dum kelka tempo Alva plu rigardis en la fajron.

“Mi unuafoje konatiĝis kun ili, kiam antaŭ tre longe mi venis ĉi tien al la kortego de Karlo, kaj pli malfrue, kiam Filipo fariĝis mia lernanto kaj mi devis vojaĝi kun li de unu urbo al la alia por montri lin ĉie al la popolo kiel estontan reĝon. Tiam mi multe indigniĝis pro la malbongusta montro de ilia entuziasmo. Nenie sinregado, nenie sobreco, nenie severa, simpla devoplenumado. Tiuj homoj havas en si io, kion ni ne konas en Kastilio: ia gajeco, pri kiu oni kredas, ke ĝi povus konduki al stultaĵo, sed malantaŭ kiu troviĝas stranga kvieteco, ia neordinara memfido. Komence oni povus timi tiun kvietecon, tiun memfidon, sed iun tagon, kiam oni havos ilin tute en la manoj, oni ekhavas la senton, ke tiu kvieteco estas nur ŝajno, nur ludo. Sed oni rigardas tra tiu ŝelo kaj vidas kiel rompebla ĝi estas. Tion mi scias, sed ne ili, ĉar ili daŭre diras al si, ke ili estas el ŝtalo.”

Tiam la abato prezentis vinon al li kaj al Fadrique kaj, post kiam ili trinkis, li demandis:

“Ĉu vi volas akcepti la grafon de Mansfeld ĉi tie aŭ ĉu vi preferas esti ie kun li sen atestantoj?”

Malkontenta, Alva respondis:



“Mi volas esti nenie kun la grafo de Mansfeld sen aŭ kun atestantoj.”

“Sed vi lasis lin veni kun vi al la monaĥejo kiel la aliajn. Vi ne intencas forsendi lin sen aŭskulti lin, mi supozas.”

“Mi tute ne deziras renkonti la grafon de Mansfeld.”

“Mi kredis, ke li estas amiko via.”

“Tion kredis ankaŭ mi. Kaj mi pensis la samon pri la aliaj.”

“Sed Mansfeld estas via amiko,” insistis la abato.

“Neniu el la ribelaj nobeloj en la Malaltaj Landoj estas amiko mia,” kolere ekkriis Alva.

“Ĉu Mansfeld estas ribela?” demandis la abato, mirigita.

“Jes, patro, tion ankaŭ mi demandas al mi,” diris Fadrique. “Se vi povas akcepti iun, tiu certe estas Mansfeld. Ankaŭ Aerschot, sed tiu ne estas ĉi tie. Kune kun li Mansfeld estas pli-malpli la sola, kiu neniam petis amnestion por la herezuloj, neniam subskribis peticiojn kontraŭ ni kaj neniam kalumniis la inkvizicion. Post la bildodetruado li protektis la guberniestrion kaj li ne amas Egmont.”

Iritita, Alva turnis sin al sia filo.

“Kion vi pensas, ke li volas de mi? Kial li volas paroli kun mi?”

“Vi ja ĉiam faras nur vian propran volon.”

“Li ne povas toleri, ke mi arestis Egmont!” diris Alva. “Ke mi, fremdlandano, aŭdacis etendi la manon al la plej alta nederlanda nobelaro. Li estas ofendita.”

“La grafo de Mansfeld ne nur estas nobela. Li ankaŭ estas vere nobla. La plej multaj de la aliaj portas nobelecon nur kiel mantelon ĉirkaŭ si. Ne nur en la Nederlandoj.”

“Bone, mi konsentas akcepti lin,” diris Alva, malkontenta. “Li eniru.”

Li donis signon al la oficiro kaj grumblis:

“Jam monatojn mia pordo estas sturmata. Ĉiu venas peti pardonon por Egmont. Kaj kiu ne povas fari la vojaĝon, sendas leterojn. Mia tablo estas tute kovrita per petleteroj: de germanaj princoj, de francaj nobeloj, de la angla kortego, eĉ de la imperiestro. Tio estas komprenebla flanke de la germanaj princoj, ĉar ili estas ja preskaŭ ĉiuj protestantoj! Kompreneble ankaŭ flanke de la francaj nobeloj, ĉar ili timas la novan doktrinon! Kompreneble ankaŭ de la angla kortego, kiu starigis sian propran Eklezion! Ĉiuj volas, ke mi liberigu Egmont. ‘Pardonu al li liajn erarojn! Pensu pri Grevelingen! Pri lia kuraĝo! Li intencis fari nenion malbonan. Li estis nur kuntrenita

en ciklono.’ Mi jam konas parkere tiujn kanzonetojn, kaj ili mul-te tedeas min!”

## SESA ĈAPITRO

Kiam la abato kaj mi volis retiriĝi, Alva malpermesis tion:

“Neniu foriras. Ankaŭ vi ne,” diris Alva kun mangesto en mia direkto. “Ju pli da moviĝo, des malpli granda estos la ŝanco, ke li falos sur la genuoj kaj plorpetos.”

Intertempe la grafo de Mansfeld estis enirinta. Mi pensas, ke li aŭdis la lastajn vortojn. Sed li ne ŝajngis tion kaj envenis la ĉambron, altstatura kaj kvieta, kia li estis. Liaj trankvilaj, moderaj vortoj, liaj mildaj, grizaj okuloj kaj lia pintbarbo ĉiam restis por mi simboloj de saĝeco kaj simpla memfido, al kiuj mi sopiris mian tutan vivon, kaj kiuj estus savintaj min el la konfuzeco, en kiu daŭre troviĝis miaj pensoj kaj sentoj.

Mansfeld paŝis ĝis antaŭ Alva kaj gentile salutis lin.ĝ “Pardonu min, ke mi tiel insistis por povi paroli al vi,” li diris.

Ŝajnis momenton, ke Alva ne volis levi sin por saluti lin, sed li tamen faris tion.

“La verdikto pri la grafo de Egmont estas prononcita,” li diris milde.

“Jes,” respondis Alva, “de mi.”

“Ĉu la definitiva juĝo?”

“Jes, la definitiva juĝo.”

Mansfeld silentis dum kelkaj momentoj. Tiam li diris, petegante:

“Ne plenumu ĝin, mi petas.”

“Vi almozpetas,” diris Alva, iritita.

“Jes,” respondis la grafo de Mansfeld, mallevinte la rigardon. “Mi almozpetas... Mi volas almozpeti ...”

“Tio fariĝis modo, de kiam la nederlandaj nobeloj ornamas sin per la atributoj propraj al tiu okupo<sup>3</sup>”

“Ne la nederlandaj nobeloj. Nur parto da ili, post kiam ili malprave estis insultitaj kiel almozpetuloj, ili uzis tiun insultnomon kiel honoran titolon.”

“Ankoraŭ io?” demandis Alva, deturnante la rigardon de Mansfeld.

“Egmont ne plenumis perfidon.”

Alva returnis sin.

“Kion vi diris?” li demandis, kvazaŭ li estis aŭdinta ian neimageblan malveron.

<sup>3</sup> Aludo al la franca vorto ‘gueux’ (almozulo, ĉifonulo). Kiam la membroj de la Ligo de la Nobeloj prezentis peticion al Margareta de Parma, la grafo de Berlaymont diris al ŝi: “Ce ne sont que des gueux” (ili estas nur almozuloj). Tiu insultnomo estis transprenita kiel honora titolo de la holandaj ribeluloj (geŭzoj).

“Egmont ne plenumis perfidon.”

“Ĉu li ne plenumis perfidon?”

“Ne en sia koro.”

“Regno ne estas konstruita sur koroj.”

“Sed ĝi floras en ili.”

Alva fikse rigardis Mansfeld.

“Ĉu ĝi floras en via koro, Mansfeld?” tiam li demandis.

“Jes,” respondis Mansfeld kun konvinkiteco, “tie ĝi floras.”

Momenton regis silento. Tiam Alva faris nervozan geston per la mano.

“Parolu plu,” li ordonis.

“Provu kompreni Egmont,” diris Mansfeld kun insisto. “Ne demandu vin, ĉu vi povos pardoni lin aŭ ne. Demandu vin, ĉu vi povos kompreni lin. Ni ĉiuj havis kialojn por esti malkontentaj. Tion vi mem ja scias. Mi petas vin koncedi tion. Antaŭ sia foriro al Hispanio la reĝo promesis retiri ĉiujn hispanajn trupojn el niaj landoj.”

“Mi ne komprenis la necesecon de tiu ago, kaj mi ne estus aginta sammaniere.”

“Sed la reĝo promesis tion.”

“Kaj li *retiris* ĉiujn hispanajn trupojn.”

“Ho jes, sed tre malfrue,” replikis Mansfeld. “Intertempe kreskis amareco. Amareco kiu ne trovas elirejon, acidiĝas kaj fariĝas veneno. Ankaŭ reĝo Filipo ĵuris respekti niajn malnovajn politikajn rajtojn, sed li restis en Madrido, kaj kardinalo Granvelle ĉiam neglektis plenumi tiun promeson.”

“Tiu popolo insurekciis armata kontraŭ sia legitima reĝo,” diris Alva. “Pro tio ĝi perdis ĉiujn siajn rajtojn.”

“Sur iuj lokoj la ribelo alprenis formojn, kiuj vekis aversion ĉe mi. La profanado de la preĝejoj estis abomeninda. La maniero en kiu sovaĝaj bandoj detruis la statuojn de sanktuloj frapis min per konsterno. La reĝo koleriĝis. Vi ankaŭ, kaj tute prave. Sed koncerne niajn rajtojn tio ne okazis kiel vi diras, sed inverse. Ne okazis tiamaniere, ke unue parto de la Nederlandoj ekribelis, kaj poste la reĝo forprenis niajn rajtojn por puni nin. Kiu diras tion, inversigas la aferon. Unue la reĝo ofendis niajn rajtojn, kaj poste kaj nur tial ekestis la ribelo. Fakte estis Granvelle kiu faris ĉion, kaj tial mi provas konvinki min, ke la reĝo eble ne bone konis la situacion. Li estis tro malproksime de tie ĉi.”

“La reĝo *ne* petis min restaŭri viajn tiel nomatajn rajtojn. Li petis min puni viajn landojn kaj ekstermi la malbonon kun radiko kaj branĉoj.”

“Se vi mortigos Egmont, vi mortigos iomete nin ĉiujn,” kviete diris Mansfeld.

Fadrique, kiu aŭskultis la tutan tempon, kun la mentono sur la brusto, grumblis:

“Tio ne estus malbona ideo.”

“Vi seniluziigas nin, senjoro de Mansfeld,” diris Alva. “Ni pensis, ke vi estas amiko de la reĝo. Ni ne atendis ĉiujn tiujn babilajojn de vi.”

“Egmont restis fidela al la reĝo,” diris Mansfeld. “Oranje daŭre provis ribeligi lin kontraŭ la reĝo, sed Egmont rifuzis.”

“Jaron post jaro Egmont estis intriganta kun la herezuloj kaj igis ilin fari la subfosadon, kion li timis mem fari.”

“Ne,” diris Mansfeld forte, “tio ne estas vera.”

“Li sciis, kion li faras.”

“Jes, li sciis, sed li nek igis ilin fari tion, nek aprobis iliajn agojn. Li estis ĉirkaŭita de homoj, kiuj kredis devi defendi kontraŭ la Eklezio kaj la reĝo antaŭ ĉio la liberecon de pensado kaj de kredo. Li iom nesingarde interrilatis kun ili, sed li ne estis ilia aliancano, nur ilia amiko. Li estis amiko de ĉiuj. Sed kiam tiu blindigita, agitita homamaso komencis bati ĉion en pecojn, li ektimis.”

Alva volis respondi, sed Mansfeld rapide aldonis:

“Mi scias, ke estas tiel! Mi ne aŭdis tion de aliaj, sed de Egmont mem. Mi estis ĉe li, kiam alvenis la novaĵo de la bildodetruado. Li fariĝis pala kaj diris, ke oni ne povas indulgi tion. Li reprenis sin kaj fariĝis unu el miaj plej fervoraj helpantoj en la reestablo de la ordo.”

“Li faris tion, ĉar li povis fari nenion alian,” mokante rimarkis Fadrique. “Al li restis nenio plu ol ŝanĝi la direkton aŭ iri en ekzilon.”

“Tio ne estas vera,” protestis Mansfeld.

“Li ne povas iri en ekzilon,” aldonis Fadrique. “Oranje povas iri en ekzilon, ĉar li havas grandajn bienojn en Germanio kaj Fancio. Li povas iri ien ajn. Sed Egmont posedas nenion ekstere de la Nederlandoj. Tie ĉi li estas princo, sed se li forlasus la landon, li estus malriĉulo. Tion li tre bone scias.”

Mansfeld nee skius la kapon kaj diris:

“Vi ne povas suspekti Egmont esti tiuspeca kalkulanto. Li ne estas tial! Li estas impulsiva, senpripensa, entuziasma, kolere, sed ne kalkulema. Nenio estas pli facile ol entuziasmigi lin por io. Sed kiam tio malbone finiĝas, kiel perpleksa li tiam povas aspekti! Ho, mi petas vin, ne diru, ke tiu granda viro plenumis perfidon. Li estis jes iritita, ofendita. Preskaŭ ne sciante, kontraŭ sia volo li estis implicita en la fatalan konfuzecon, kiun ni konas.”

Kolere Alva frapis per la pugno sur sian alian manplaton.

“Jen tio denove,” li riproĉis al Fadrique, severe rigardante lin. “*Caramba*, ĉu vi neniam lernos klare pensi?”

Li ree turnis sin al Mansfeld kaj demandis:

“Respondu min: ĉu Egmont estis guberniestro de Flandrio kaj Artezio?”

“Jes, li estis.”

“Kaj ĉu li havis sidejon en la Ŝtata Konsilantaro?”

“Jes, li havis.”

“Ĉu bonan sidejon?”

“Jes, bonan.”

“Ĉu la guberniestrino konsultis lin en ĉiuj gravaj aferoj?”

“Jes, ĉiam.”

“Kio okazis, kiam la opinioj diferencis? Ĉu tiam la juĝo de iu alia pezis pli ol tiu de Egmont, aŭ inverse?”

“Jes, jes, la guberniestrino atribuis multan valoron al la opinio de Egmont.”

“Kiel granda estis lia influo en la Ŝtata Delegitaro?”

“Granda,” respondis Mansfeld.

“Ĉu ne pli ol tio?”

“Grandega.”

“Ĉu tiam oni rajtis nomi lin ‘postkuranto’? Ofendita povas esti ĉiu, eĉ iritita. Sed ĉu *kuntrenita*? Li, politikisto, guberniestro, la plej granda en la Nederlandoj, lasis sin kuntreni? Se tio estas vera, nur pro tio li jam meritas la mortpunon.”

Li estis tiel ekscitita, ke ĉiuj aŭdis lian spiradon, kiam li haltis momenton.

“Politikisto ne estas kuniranto, senjoro! Li antaŭiras! Li kondukas! Se li ne kapablas fari tion, li petu rajti iri hejmen varti la infanojn.”

Mansfeld mallevis la okulojn.

“Kaj ne diru, ke vi estas tiel granda admiranto de Egmont. Vi trovas, ke li ne kondukas kiel nobelo. Vi trovas lin leĝermensa, nefidinda, nerespondeca, kaj lian familieran interrilaton kun la popolo vi nomas vulgara. Vi plurfoje diris tion al li, kaj dum la pasintaj jaroj vi estis unu el la malmultaj, kiuj montris al li liajn erarojn. Ĉu estis eraroj pro singardemo? Povas esti, sed tamen eraroj! Ne, vi ne defendas Egmont, tial ke vi ŝatus lin aŭ rigardus lin senkulpa. Vi ne konsideras lin senkulpa. Sed io alia tedas vin. Estas tute alia kaŭzo, pro kiu vi intervenas ĉi tie por Egmont. Egmont apartenas al la plej alta nederlanda nobelaro, kiel vi. Vi ne volas, ke membro de la alta nederlanda nobelaro estu publike ekzekutita kiel fripono. Vi kredas, ke nobelo estas la protektanto de sia popolo, ke la popolo estas senhelpa sen li. Vi komparas ĝin kun infanoj, kiuj bezonas patron, kaj vi diras, ke ne estas bone por infanoj, ke la patro estu

humiligita en ilia ĉeesto. Tial vi volas, ke mi savu lian vivon kaj kaŝas liajn erarojn. Por lia popolo. Tio estas bona poento por vi. Vi ne pledas por Egmont, tial ke vi iel profitus farante tion, aŭ ĉar vi estus sentimental aŭ simple stulta. Sed koncerne la tiel nomatan altan mision de la nobelaro, vi apartenas al la maljuna skolo. La homoj jam bone povas malhavi la nobelojn, kaj ili povos fari tion ĉiam pli bone. La estonteco ne kuŝas en la maljunaj dukejoj kaj grafejoj, sed en reĝejo. Tion la reĝo scias, kaj en tio li antaŭas vin!”

Tiam li grumblis:

“Sed vi estas bona viro, Mansfeld. Se mi povos fari al vi ian servon en aliaj cirkonstancoj, mi volonte faros ĝin. Sed mi ne reprenos mian decidon koncerne Egmont. Foriru nun, mi petas.”

Kiam Mansfeld hezitis, Alva diris senpacience:

“Foriru! Foriru, mi diras!”

## SEPA ĈAPITRO

La ekscitiĝo verŝajne kaŭzis doloron en la artikoj de Alva. Li staris momenton antaŭ la fajro, dum li movis kun peno brakojn kaj ŝultrojn. Tiam li denove sidiĝis kun tordita vizaĝo.

“Malbenitaj ostoj,” li grumblis, “kaj malbenita lando, kie la aero estas kiel en kelo. Mi ne scias, kiu prapatro alvenis la unua ĉe la Norda Maro kaj kontenta diris: ‘Jes, ĉi tie en tiu malvarma kaj malseka grizeco, mi konstruos mian domon kaj edukos miajn infanojn.’ Geniulo li certe ne estis. Ne mirige, ke liaj posteuloj drinkaĉas!”

Li prenis la vinpokalon, trinkis gluton kaj diris:

“Estas la unika afero kiun prudenta viro povas fari ĉi tie.”

Fadrique levis sin kaj diris petegante:

“Patro, lasu min...”

Sed Alva kolere ordonis:

“Vi restos!”

La oficiro denove eniris kaj demandis al Alva, ĉu li volas akcepti nun ankaŭ Viglius kaj la aliajn.

“Ĉu Viglius?” demandis Alva. “Ĉu ankaŭ Viglius estas ĉi tie?”

“Jes, Via Duka Moŝto.”

“Tiu plumknaristo,” grumblis Alva, mal-kontenta. “Mi ne amas tiun kaŝmalican burĝon. Mi vetas, ke li alrampos sur manoj kaj piedoj. Ne, ne estas eble. Li ne plu povas rampi sur manoj kaj piedoj. Ili estas ankoraŭ pli ridigaj ol la miaj. Envenigu lin!”

lom poste envenis Viglius, malgranda, timideta kiel ĉiam, kun ĉirkaŭspionantaj

okuletoj. Li ŝajnis pli malgranda, ol li fakte estis pro la dika, vasta mantelo, en kiu li estis vestita, kaj pro la granda ĉapo, kiun li havis sur la kapo. Oni diris, ke li penis aspekti kiel Erasmo, Erasmo transformita en muson, diris liaj malamikoj.

“Magistro Viglius,” diris Alva, “mi aŭdis, ke la Konsilantaro, kies prezidanto vi estas, donis juran konsilon favore al nova ponto ie apud Gento.”

“Jes, Via Duka Moŝto,” diris Viglius, klinante sin.

“Aperas nun el dokumentoj, ke la ponto estos konstruita ĝuste sur loko, kie la terenoj, ambaŭflanke de la rivero, apartenas al vi. Ĉu tio ne estas eksterordinare agrabla hazardo?”

Viglius ruĝiĝis.

“Ĉu vi jam sciis tion?” demandis Alva. “Se ne, vi ja povas danki min, tial ke mi transmetas al vi tiun bonan novaĵon.”

“Via Duka Moŝto,” diris Viglius, “se vi permesas min, mi volonte...”

Alva kapjesis kun emfazo.

“Ni permesas, kara magistro, ni permesas. En kies nomo aŭ surbaze de kiu principo vi pledos por la bona kaj fidela Egmont?”

“Vi divenis, kial mi venis ĉi tien paroli kun vi, kvankam la vojoj ne estas sekuraj por malforta viro kiel mi.”

“He, vi timas ion.”

“Mi estas maljuna, Via Duka Moŝto, kaj la tagoj, kiuj ankoraŭ restas al mi, certe ne plu estos tiel grandnombraj, ke mi devus atribui grandan valoron al ili. Mi ne timas pro mi mem, sed pro mia lando.”

“Kial?” demandis Alva. “Estos konstruita nova ponto sur via lando<sup>4</sup>. Pensu do pri tio: oni certe devos konstrui tie gastejon, velfarejon kaj butikon por la ŝipistoj. Oni ankaŭ faros tie legomĝardenojn, kaj kun iom da bonŝanco vi certe povos aranĝi, ke tie regule estos okazigataj foiroj. Tiu lando liveros al vi trezoron!”

“Mi ne volis diri tion,” diris Viglius, iomete nervoza. “Via Duka Moŝto scias, ke mi faros al mi zorgojn pro mia patrio.”

Nur nun Alva turnis sin al li, laŭte dirante:

“Sed nun finfine via patrio troviĝas en bonaj manoj, magistro.”

“Eble ni estis tro neagemaj de tempo al tempo. Iuj decidoj ankaŭ foje estis dusencaj.”

“Se vi lasas maltaŭgulojn libere agi, vi ne devas miri poste, ke ili misuzas tiun liberecon.”

“La guberniestrino deziris, ke regu paco en nia lando,” pluigis Viglius neŝanceble. “Antaŭ ĉio paco. Pro tiu paco ŝi permesis, ke la protestantoj plu prediku en lokoj, kie ili faris tion jam antaŭe. Ŝi insiste petis, ke ili faru tion kviete kaj diskrete. Sed subite ni aŭdis, ke ili postulas templon meze de la urbo, kaj oni vidis ilin levi la pugnon kontraŭ niaj preĝejoj. Kiu do estus povinta antaŭvidi tion?”

“Ĉiu kiu havas granon da prudento en sia kapo,” respondis Alva.

“La guberniestrino estis tro bona,” diris Viglius, “kaj ni...”

“... tro senenergiaj. Sed tiun lecionon vi lernis de mi.”

“Ĉar la afero aperas jure finaranĝita, kaj interparolado pri la proceduro ŝajnas esti rigardata neoportuna...”

“Ne parolu kiel leĝolibro!” interrompis lin Alva, senpacienca. “Ĉu vi ne povas paroli kiel ordinara homo?”

“Se estas permesite al mi, mi volus humile peti...”

“Kial? Kial? Kio, en la nomo de la ĉielo, faras tiun Egmont tiel grandvalora? Se vi plu parolos tiamaniere, mi devos pensi, ke vi bezonas Egmont por io, ia obskura plano, kiun vi ne povas plenumi, ĉar li estas en malliberejo.”

“Kune kun Egmont vi surgenuiĝis antaŭ la trono por ricevi la Oran Lanfelon<sup>5</sup>.”

“Mi portas la Oran Lanfelon jam dudek jarojn kun honoro kaj fiereco. Diru al mi, kiel portas ĝin Egmont!”

“Vi militis kune kun Egmont, mi povas preskaŭ diri, kiel fidelaj, amikaj komandantoj. En gloraj momentoj vi ambaŭ staris flanke de la reĝo, kiam li akceptis la grandulojn de la regno, privilegio, kiun li donacis nur al siaj plej meritplenaj kunlaborantoj.”

“Tiun ĉi mian lokon ĝis hodiaŭ neniu kontestis,” diris Alva. “Diru al mi, ĉu la samo validas por Egmont!”

“Ĉu Egmont ne estas tro granda? Neniu krom Oranje povas egali lin en riĉeco kaj influo. La popolo veneras kaj amas lin.”

Plena je malŝato Alva mokis:

<sup>4</sup> En la nederlanda tiu vorto signifas ankaŭ ‘tereno’, de kie la netradukebla vortludo.

<sup>5</sup> La plej malnova sekulara kavalirordeno en la mondo, fondita en 1430 de Filipo la Bona, duko de Burgondio kaj grafo de Flandrio, prapatro de Karlo la V-a kaj Filipo la II-a. Per tre lerta politiko li sukcesis akiri la posedon de preskaŭ ĉiuj Nederlandoj. En la greka mitologio temas pri la ora felo de virŝafo kiu savis la du reĝajn infanojn Frikso kaj Hella de sia vicpatrino, kiu volis mortigi ilin. La posedo de tiu felo alportus feliĉecon. Tial Jasono devis serĉi tiun felon kun la Argonaŭtoj por sia onklo, la reĝo de Jolko.

“La amo de popolo estas kiel la favoro de kapricema, malmorala virino.”

Neperturbeble la maljuna sciencisto plu parolis:

“Eble estas aŭdace diri tion, sed mi kredas, ke ankaŭ vi iam amis Egmont, kaj ke verŝajne vi amas lin ankoraŭ nun. Ĉu vi ne estas profunde ligita al Egmont? Li triumfis apud Grevelingen, vi apud Mühlberg. Post la triumfo vi ambaŭ oferis viajn spadojn al Dio por danki Lin pro tio, ke Li donis al vi ambaŭ la venkon, kaj vi ricevis la dankon de nia reĝo, kiun vi sammaniere servadis. Vi havis la honoron kontrakti, en la nomo de la reĝo, lian edziĝon kun princino Elisabeta de Francio. En Londono Egmont ricevis por la reĝo la jesan parolon de princino Maria Tudoro.”

Moke Fadrique demandis:

“Kio estas al vi, *hombre*? Ĉu vi timas, ke vi havos malpli da profitoj sub alia guberniestro? Aŭ ke oni traserĉos viajn paperojn? Egmont ne amis paperojn. Li do verŝajne ne rigardis ilin tre atente.”

Alva rigardis Viglius, ekzamenante lin.

“Kial vi venis? Kion precize vi deziras?”

Fadrique aliĝis al sia patro.

“Jes, diru do, kion vi volas. Ĉiuj scias, ke Egmont estas tute indiferenta al vi. Kio estas do? Kial vi estas ĉi tie?”

“Ĉu estas saĝe?” demandis Viglius.

“Ho,” diris Alva, “ĉu estas saĝe, kio?”

“Mi aŭdacas demandi min, *kial* vi igos ekzekuti Egmont.”

“Se vi ne povas respondi al tiu demando, vi estas povra pensulo, magistro Viglius. Mi igos ekzekuti Egmont, ĉar li plenumis ŝtatperfidon.”

“Aŭ ĉar vi volas meti ekzemplon,” singarde diris Viglius.

“Ne!” ekkriis Alva.

Sed Viglius pluigis:

“Meti ekzemplon, kaj per tiu unika, abomena, neaŭdita faro fortimigi ĉiujn aliajn, mortigi en ili por ĉiam ĉiun ĝermon de ribelo. Ĉu tiu konsidero ne superregis fakte en vi ĉiujn aliajn? Ekzekuti grafon, princon, kavaliron de la Ora Felo, intiman amikon de reĝoj, kiuj ĉeestis kiel gastoj lian edziĝon...”

Iritita, Alva diris:

“Ni jam aŭdis tion ĉi-matene, magistro, kaj hieraŭ, kaj antaŭhieraŭ, kaj la tutan pasintan semajnon. Ni jam tiel ofte aŭdis tion dum la pasintaj monatoj, ke niaj oreloj zumas pro tio.”

Sed Viglius pluigis:

“Fortimiga ekzemplo povas iufoje helpi reestabli ordon en lando. Estas ekzemploj pri tio en la historio. Sed kelkafoje tio estas oleo verŝita sur fajron. Tiam tio incitas la

koleron de la popolo anstataŭ timo kaj revenas kiel armilo kontraŭ tiun kiu ĵetis ĝin. Tial mi venis, kaj mi demandas al vi : ĉu ne estus *politike* pli saĝe, ĉu ne estus pli *praktike*, ŝpari la vivon de la grafo de Egmont...”

Alva turnis sin for de li kaj diris :

“Vi metis la demandon, Magistro, kaj la respondo estas: ne!”

“La urbo grumblas,” pluigis Viglius.

“Tion faras ankaŭ bestoj,” diris Alva, “sed plej ofte pro timo.”

“La gildoj sekrete kunvenas.”

“Kion neordinaran havas tio? La gildoj sekrete kunvenas jam dum jarcentoj.”

“La malgrandaj nobeloj kolektas armilojn kaj farmistojn.”

“Kiel jam ĉiam! Sen trupoj ili ne estas bonvenaj en la kasteloj de la granduloj.”

“Sed kun tiuj trupoj ili estas bonvenaj, kaj kiam ili revenas de tie, ili rakontas, kion ili aŭdis ĉe la tablo. Tiel estas dissemataj singardaj kaj ofte violentaj vortoj, kaj ĉiutage pli da soldatoj aliĝas al la armeo de la princo de Oranje.”

Kiam Alva perforte rektigis sin, Viglius, timigita, aldonis:

“Almenaŭ estas tio kion mi aŭdas! Mi ne certe scias tion.”

Malŝate Alva diris:

“La tiel nomatan armeon de Oranje mi malsategigos en kelkaj monatoj, sen unu sola spadbato, simple per pacienco, tiel ke ĝi baldaŭ estos nura hordo de nepagataj ribelantoj! Ne provu timigi min per tiu kanajlaro!”

Viglius klinis sin kaj diris:

“Mi faris, kion mi kredis devi fari. Ne estas permesite al mi, iri plu, ĉar la tuta aŭtoritato estas en viaj manoj.”

“Tiel estas, magistro, tiel estas,” diris Alva. “Bonan nokton.”

## OKA ĈAPITRO

Mi kondukis Viglius eksteren kaj vidis, ke Mansfeld ankoraŭ ĉiam estas en la korto. Li estis parolanta kun aliaj nobeloj. Viglius iris al ili kaj suspiris:

“Tio estas abomena situacio.”

“Mi pensas, ke estus bone resti ĉi tie,” diris Mansfeld.

“Kial?”

“Li hezitas.”

Viglius kapneis, dirante:

“Mi ne rimarkis tion.”

Sed Mansfeld insistis:

“Ŝajnas, ke ekzistas interkonsento.”

“Kia interkonsento?”

“Mi aŭdis el relative fidinda fonto, ke ĉio ankoraŭ ne estas decidita.”

“Kiel do, ne decidita?”

“Egmont nur tiam estos senkapigita, kiam kuriero transportos de ĉi tie la ordonon.”

Mirigita, Viglius rigardis Mansfeld.

“Kiel la aferoj statas nun, li ne estos senkapigita,” diris Mansfeld. “Kuriero devas foriri de ĉi tie kun la mesaĝo de Alva: jes, plenumu la verdikton. Ankoraŭ ne foriris mesaĝisto. Tio povas nur signifi, ke li hezitas.”

“Ĉu tio estas vera? Mi volas diri, la rakonto pri tiu kuriero kaj la cetero?”

“Mi kredas, ke jes.”

“Sed vi ne scias tion kun certeco.”

“Mi kredas, ke tio estas vera. Mi opinias, ke li volas pensadi, kaj ke tial li estas ĉi tie en la monaĥejo. Ĉar li ne estas certa. Ni denove provu konvinki lin. Post iom da tempo. Eble venos pli favora momento.”

“Sed ne,” Viglius diris amare. “Kontraŭ tiu viro utilas nenio. Li ruinigas nian landon, kaj ni povas fari nenion por malhelpi tion. Mi iras hejmen.”

Dum li iris al la staloj, mi vidis moviĝon ĉe la pordego. Ankaŭ nian fratulon pordegiston mi vidis haste alkuregi.

“La grafino de Egmont estas ĉi tie,” li diris anhelante kaj timeme. “Kion mi faru? Ĉu vi iros demandi tion al la abato? Mi supozas, ke mi devas tuj malfermi la pordegon. Mi ne povas lasi la grafion stari ekstere.”

Mansfeld aŭdis nin paroli.

“Ĉu la grafino de Egmont?” li demandis, konsternita. “Ĉu la grafino de Egmont staras antaŭ la pordego?”

“Jes, kaj kun ŝi kelkaj el ŝiaj servistoj. Unu el ili rajdis antaŭen kaj petis, ke ni malfermu la pordegon por la grafino de Egmont. Mi atendis iomete, ĉar mi ne fidis tion, sed tiam mi vidis la grafion alproksimiĝi. Mi tre klare rekonis ŝin. Ŝi plurfoje venis al nia kapelo. Nun ŝi devas esti ĉe la pordego.”

“Ni ne povas lasi ŝin paroli kun Alva,” diris Mansfeld, maltrankvila. “Li povas nur ofendi ŝin.”

Li iris al la nobeloj kaj parolis kun ili.

“Malfermu la pordegon,” mi diris al la pordegisto. “Vi devas enirigi la grafion ĉiakaze. Mi iras al la abato.”

Oni estis kovranta la tablo por Alva kaj Fadrique, kiam mi envenis. Mi sukcesis paroli al la abato kaj diri al li, kiu estas antaŭ la pordego. La abato ektimis.

“Ne,” li diris, maltrankvila. “En nenia kazo. Ni devas malebligi ŝin fari tion.”

“Ankaŭ Mansfeld diris tion.”

“Ĉu li estas ankoraŭ ĉi tie?”

“Jes.”

“Iru al li kaj diru, ke li parolu al grafino Sabina.”

“Ĉu grafino Sabina?” ni subite aŭdis Alva demandi. “Kiu parolis ĉi tie pri grafino Sabina?”

Ni vidis lin leviĝi el sia fotelo kaj proksimiĝi al ni.

“Sabina estas la antaŭnomo de la edzino de la grafo de Egmont,” li diris kun malfida rigardo en nia direkto. “Kial vi parolas pri la grafino.”

Sen respondi al Alva la abato eliris, sed tiam mi aŭdis voĉojn en la koridoro: tiun de Mansfeld kaj tiun de virino.

“Ne faru tion!” diris Mansfeld. “Mi petas, grafino, ne faru tion. Ŝparu al vi la doloron.”

“Lasu min pasi, mi petas,” mallaŭte diris la grafino. “Mi devas provi.”

Tiam la pordo malfermiĝis, kaj la grafino envenis. Ŝi iris rekte al Alva. Kiel lacega ŝi aspektis! Nenion plu ŝi havis de la bela, floranta virino, kiun ni plurfoje vidis en la monaĥejo kaj en la urbo, kiam ŝi ĉeestis festojn kun sia edzo, la grafo. Ŝi estis maldika, kaj ŝia vizaĝo estis kaviĝinta. Nervoza, Alva staris antaŭ ŝi. Li diris:

“Vi devas esti tre laca, grafino Sabina. Sidiĝu, mi petas.”

Sed la grafino restis staranta kaj rigardis lin rekte en la okulojn.

“Vi kondamnis mian edzon al morto malgraŭ ĉio,” ŝi murmuris.

“Mi bedaŭras,” diris Alva nevole, sed milde. “Mi provis savi lin.”

Denove li petis ŝin sidiĝi, sed la grafino ŝajnis ne aŭdi tion.

“Vi rakontis, ke vi kontraŭvole komencis la proceduron,” ŝi diris.

“Estas la vero.”

“Vi esperis, ke li kapablos provi sian senkulpecon. Tion vi diris al mi.”

“Mi gardis tion esperon ĝis la lasta momento.”

“Ŝajnis, kvazaŭ vi estus arestinta la grafon por fortimigi la popolon, sed ke vi ne intencis, ne vere intencis daŭrigi la proceson. Tio donis al ni esperon.”

“Dum monatoj la grafo povis labori pri sia defendo,” diris Alva. “Li povis disponi pri ĉiuj informoj de justicasisto. Juristoj ĉeestis la kunsidojn de la konsilantaro. Neniu el ili trovis eraron en la proceduro.”

La grafino sensprite rigardis lin.

“Vi do tamen intencis fari tion,” ŝi diris mallaŭte. “Vi intencis mortigi lin. La tutan tempon vi sciis tion. Mi ne povas kredi tion.”

“Mi volus, ke tiu konversacio ne devu okazi,” Alva diris malafable.

Li rigardis la abaton, kaj unu momenton ŝajnis, kvazaŭ li volus insulti lin, sed li returnis sin al la grafino kaj kviete diris kun stranga voĉo, kiu ŝajnis ne esti la lia:

“Sabina, tio estas pli granda ol vi aŭ mi, pli granda ol Egmont. La persono Egmont estas neesenca en tiu ĉi afero. Mi estas neesenca. Kiel amiko de vi ambaŭ mi esperis, ke la proceso finiĝos per absolvo. Mi ĵuras, ke mi esperis tion. Sed mi ne povis savi lin. Ĉi tie temas pri la reĝo! Pri la reĝo kaj pri la Eklezio! Ne pri Egmont! Ne pri mi! Ne pri vi!”

“Iam vi iris ĉasi aprojn en la Ardenoj kun Egmont, ĉu vi memoras?”

“Jes, mi memoras tion,” kontraŭvole respondis Alva.

“Vi ankoraŭ ne konis Egmont persone. Li estis ankoraŭ ‘multpromesa junulo’, kiun la imperiestro rekomendis al vi. Vi deziris scii, el kiu ligno li estas tranĉita. Tial vi invitis lin akompani vin dum la ĉaso.”

“Jes, mi memoras.”

“Dum la ĉaso okazis io grava.”

Alva deturnis sin de ŝi.

“Tio pri kio vi parolas, estis stulta malbonŝanco, grafino. Mia ĉevalo stumblis en fosafeto kiu troviĝis sub filikoj. Io tia povas okazi al iu ajn.”

“Vi kuŝis sur la dorso sub la filikoj, kiam emerĝis granda apro. Diru al mi, kion faris tiam Egmont.”

“Vi bone scias tion,” li diris, videble tedata de la afero.

“Li volis mortigi la apron, sed perdinte sian lancon inter la arbustoj, li eltiris sian ponardon kaj ĵetis sin sur la beston. Li luktis kun la besto, korpon kontraŭ korpo, kaj mortpikis ĝin per la ponardo. Mia edzo estis vundita. Kiam la morgaŭon la imperiestro demandis vian opinion pri la junulo, vi diris: ‘Donu al mi dudekon da tiaj junuloj kaj mi metos la mondon ĉe viajn piedojn.’ Tion vi diris. Kaj tiu junulo estis Egmont, mia edzo.”

Estis larmoj en ŝiaj okuloj.

“Li estas kuraĝa viro,” mallaŭte diris Alva, turnante sin al ŝi. “Tio estas sciata de ĉiuj.”

Sabina sekigis siajn larmojn kaj daŭrigis:

“Dum la batalo apud Grevelingen li ekvidis meze de la tumulto iun el siaj soldatoj, kiu perdis siajn armilojn kaj troviĝis enfermita kun la dorso kontraŭ arbo. Mia edzo rajdis al li, ĵetis lancon al li, ĵetis sin sur la malamikon kaj liberigis lin. Kelkajn jarojn poste tiu sama viro venis al nia kastelo kun sia filo danki mian edzon kaj prezenti al ni sian trijaran filon, kiun li nomis Lamoralo laŭ la antaŭnomo de mia edzo.”

Alva returnis sin al ŝi kaj diris, emfazante ĉiun vorton:

“Sabina, mi venis al tiu ĉi lando por plenumi tri taskojn, kiujn donis al mi la reĝo: unue, subpremi la novan doktrinon, kiu estis kondamnita de la papo en Romo kiel herezo; due, reestabli la ordon; kaj trie, puni la ribelulojn. Sekve, kion mi pensas persone, ne havas gravecon. Mi estas militisto kaj mi obeas al la reĝo, kio ajn okazas, ĉar tio estas mia devo.”

Sed Sabina ankoraŭ ne cedis.

“Iu iam diris pri vi: ‘Dum sia vivo li senkaptigis aŭ pendigis jam tiom da homoj, ke li jam havas plu nenion homecan’. Sed mi scias, ke tio ne estas vera. Vi vizitis nin en nia kastelo de Gaasbeek, kaj mi vidis, ke vi amas kolombojn, kaj ke viaj okuloj brilas, kiam vi rigardas rozojn. Dum horoj vi povas aŭskulti muzikon. Vi parolis pri Platono, pri Mikelanĝelo, pri viaj infanoj, kiam ili estis malgrandaj, pri feliĉeco.”

“Nia feliceco ofte dependas de la malgrandaj momentoj en nia vivo, sed nia honoro dependas de la grandaj momentoj, kaj la plej granda leĝo de la vivo por Dio kaj la homoj estas la devo.”

Li denove senpacience deturnis sin de ŝi. Sed ŝi daŭrigis.

“Vi iam haltis en niaj staloj antaŭ la maljuno virĉevalo de Egmont, tiu griza kun nigraj kolharoj, sur kiu li rajdis dum la batalo apud Saint-Quentin en Francio. Vi karesis lin kaj mal-laŭte alparolis lin, dum ni promenis pluen. Kaj kiam ni retrorigardis, ridetante pro tio kion vi faris, vi timiĝis.”

Alva staris iom da tempo kun la dorso turnita al ŝi. Tiam li returnis sin al ŝi kaj diris:

“Sabina, mi devas rakonti ion al vi. Kiam mi militiris kontraŭ François de Guise, la reĝo estis tiel malriĉa, ke li ne povis pagi miajn soldatojn. La trupoj komencis ribeli. Tiam mi pagis la soldatojn per mia mono, kaj ĉar ĝi ne sufiĉis, mi lombardigis la juvelojn de mia edzino, inter kiuj estis ora rozario, sur kiu ankoraŭ preĝis mia bopatrino, kaj ambran krucon, kiun portis mia patro, kiam li mortis en la marbatalo kontraŭ la maŭroj<sup>6</sup>, kaj kiun mi retrovis kune kun lia spado en la fortreso post la okupacio de Tunizio. Tiu spado fariĝis mia plej valora posedaĵo, ne nur ĉar la tenilo estis kovrita per oro kaj la klingo garnita per arĝento.

<sup>6</sup> Nordafrika popolo, kiu invadis kaj konkeris Hispanion, importante en ĝin la islaman religion. Post pli ol kvar jarcentoj da okupacio ili estis forpelitaj de tie de reĝo Filipino la Bela, patro de imperiestro Karlo la V-a.

Ĉar mia reĝo estis en bezono, mi lombardis al uzuristo la krucon, la spadon kaj la rozarion kun la cetero kaj distribuis la enspezon inter la soldatoj. Per tio mi volas pruvi, ke sentoj estas subordigitaj al devo. Ho jes, mi scias: spadoj, krucoj kaj rozarioj estas senvivaj objektoj. Sed se ĉi-vespere mia filo, kiu staras ĉi tie, estus kulpa, mi senhezite sendus lin kiel la aliajn al la eŝafodo.”

Sed la grafino spasme skuis la kapon kaj diris:

“Pri tiuj aferoj vi scias nenion.”

“Mi parolas serioze.”

“Vi eĉ ne scias, pri kio vi parolas. Vi parolas pri la morto de via filo, kiel ĉiuj homoj kiuj neniam perdis infanon.”

“Mi tre frue perdis mian patron.”

“Tio estas tute alia afero. Patro restas kara fremdulo al infano. Sed infano estas parto de ies karno kaj esteco. Kiam ĝi estas forprenita, oni estas kripligita. Tion oni scias nur, kiam oni spertas tion. Vi estas armeestro, la plej granda kapitano de via tempo. Oni konfidis al vi la sekurecon de Hispanio. Vi venkis la maŭrojn, la francajn hugenotojn kaj la germanajn princojn. Vi malofte troviĝas en via bieno. Via edzino estas iu al kiu vi skribas leterojn. Viajn filojn vi de tempo al tempo vokas al vi kiel leŭtenantojn. Vi konas la gloron de la batal-kampo, sed kion alian vi konas?”

“Kion alian mi konas? Mi diras tion al vi. Mi estis for de mia hejmo – sur la batal-kampo, jes –, kiam naskiĝis mia unua filo. Mi estis en mia tendo, kiam Julian Romero alportis al mi la novaĵon. Alvaro Bracamonte kaj Sancho de Lodoño estis ĉe mi, ankaŭ Mondragón kaj Alborno. Mi forsendis ilin ĉiujn, eĉ Alborno, kiu ĉiam estas kun mi, kiam mi militas, kaj mi sidiĝis en angulo de la tendo kun la manoj antaŭ la vizaĝo kaj ploris. Kion alian mi konas? Dum la militiro en Hungario mi aŭdis, ke mia edzino malsaniĝis, ke ŝi suferas kaj demandas, kie mi estas. Tiam mi surĉevaliĝis kaj rajdis tra la duonan Eŭropon dum naŭ tagoj kaj naŭ noktoj por vidi ŝin. Ne, Sabina, vi ne devas diri, ke mi konas nur la batalkampon. Mi tre ofte estis sola dum mia vivo. La devo postulis tion de mi. Sed ke mi ne scius, kio signifas ami edzinon kaj filon, tion vi ne rajtas diri.”

La grafino levis al li siajn falditajn manojn.

“Du el miaj infanoj mortis. Ĉu vi scias ion pri la malpleneco, kiu restas?”

Alva deturnis sin de ŝi kaj diris:

“Kiam la homa menso ne plu povas regi la situacion, la kredo helpas.”

“Tion ĝi faras! Ho, tion ĝi faras! Mi scias, ke Dio estas nia rifuĝejo, sed...”

“Estas nenia ‘sed’, tuj kiam oni implicas Dion.”

Tiam kun nervoza mangesto li diris:

“Tiu ĉi interparolado daŭris sufiĉe longe.”

La grafino falis sur la genuoj kaj ekploris.

“Egmont vivas! Mi bezonas lian forton kaj varmon! Vi ne rajtas neniigi lin! Vi ne rajtas! Vi ne rajtas!”

Sed li interrompis ŝin.

“Mi volas aŭdi nenion plu pri tio. Foriru, Sabina. Mi petas vin foriri. Vi ne devus esti veninta. Tio estis doloriga, neutila interparolado. Fadrique, konduku la grafion eksteren.”

## NAŬA ĈAPITRO

Alva igis komuniki al la nobeloj, ke li akceptos nur tiujn, kiuj ne venos paroli pri Egmont. Estis du da ili. Li aŭskultis ilin, koncize pritraktis la aferojn kaj tiam ĉetabliĝis kun la abato kaj Fadrique.

Dum mi servis lin ĉe la tablo, mi vidis, kiel Alva penas resti trankvila. Li babilis kun Fadrique pri sia kastelo en Toledo, refreŝigis komikajn memoraĵojn kaj priskribis ridigajn personojn, kiujn li renkontis tie. Li klopodis venki la malafablecon de Fadrique, ignorante ties nevolan grumbladon kaj parolante ludeme, preskaŭ gaje, tiel ke tio dolorigis min post ĉio, kio okazis. Sed infano povis vidi, ke tio estas nur ŝajno, ke li serĉas protekton en gajeco.

La abato ne partoprenis en la konversacio. Li silente manĝis plu kaj iam kaj iam ĵetis rigardon al Alva, kiu rimarkis tion kaj nervezo evitis lian rigardon.

Tiam unu el miaj kunfratoj envenis por demandi ion al la abato. Konsternita, mi vidis, ke estas la senjoro de Maarlo. Li apenaŭ provis kaŝi sian vizaĝon en la kapuĉo de la froko. Li pasis proksime preter Alva kaj diris al la abato:

“Mi nun faros la rondiron por vidi, ĉu ĉiuj pordegoj estas bone fermitaj.”

La abato leviĝis kaj iris kun li al la angulo malantaŭ mia dorso, kie estis la pasejo al la kuirejo.

“Mi ne scias, ĉu ni jam devas fari tion,” mi aŭdis lin mallaŭte diri al Maarlo.

“Ni devas fari tion nun!” pasie flustris la junulo. “Miaj viroj nun estas en la arbaro. Ili baldaŭ venos al la monaĥejo. Mi devas envenigi ilin.”

“Ĉu vi ne povas atendi iomete pli longe?”



“Ne, ĉio estas interkonsentita tiel. Se mi ne envenigos ilin nun, la patroloj ekvidos ilin.”

Ankaŭ fratulo Nicolaus envenis kaj diris al la abato sufiĉe laŭte:

“Okazis io stranga. Antaŭ nelonge magistro Viglius rajdis for al la urbo, sed li revenis, ekscitita. Li diras, ke la vojo al la urbo estas barita de viroj.”

Fadrique proksimiĝis al ili kaj demandis, viŝante la buŝon per buŝtuko:

“Kion vi diras pri la vojo al la urbo?”

“Magistro Viglius diras, ke la vojo al la urbo estas barita de viroj,” ripetis fratulo Nicolaus. “Tial li revenis.”

Aŭdante tion, Fadrique eliris, kaj la abato donis al mi signon sekvi lin. En la korto mi vidis, en la lumo de la torĉoj, kiuj troviĝis ĉie en ringoj kontraŭ la muro, kiel Viglius, Mansfeld kaj aliaj nobeloj, kiuj ne estis foririntoj, interparolas.

“Kio okazas ĉi tie?” demandis Fadrique malbonhumore.

“Mi volis reiri hejmen,” nervoze rakontis Viglius, “sed tio estis neebla. La vojo estis barita de viroj. Mi provis preni flankvojon, sed tie mi trafis en embusko. Nur en la lasta momento mi povis refuĝi al la monaĥejo.”

Li ekzamine rigardis Mansfeld kaj la aliajn kaj diris:

“Mi ne scias, kion mi devas pensi pri tio.”

Ankaŭ Fadrique ekzamenis la vizaĝojn de la nobeloj, sed ĉie li vidis nur sinceran miron. Moke li demandis al Viglius:

“Ĉu vi estas certa, ke vi ne fuĝis antaŭ via propra ombro?”

Kelkaj ekridis. Viglius ruĝiĝis pro kolero.

“Mi estas tre certa pri tio, laŭ tio kion mi vidis, don Fadrique,” li respondis malrapide.

“Kiel aspektis la viroj, kiuj laŭ vi baris la vojon al la urbo?”

“Tion mi ne scias. Estis preskaŭ tute mallume en la arbaro.”

“Ĉu eble estis vojrabistoj?”

“Ne, estis soldatoj, mi pensas.”

Fadrique sulkigis la frunton.

“Ĉu soldatoj?”

“Jes, tiu impreson mi havis.”

“Kial?”

“Mi vidis lancon ie kaj tie, kaj ŝajnas al mi, ke mi vidis brileti kaskojn.”

Ni reeniris, kaj Fadrique rakontis al Alva, kion diris Viglius.

“Kion ni faru, patro?”

Alva suprentiris la ŝultrojn.

“Ne estas soldatoj miaj,” plu diris Fadrique. “Tiu ne kuŝas en embusko en arbaro.”

“Embusko! Embusko!... Ĉu tiu leporo ne uzas tro grandajn vortojn?”

“Ĉu vi pensas, ke estas rabistoj?”

“Jes.”

“Estas eble.”

“La tuta lando estas plena je ili. Oni ne povas meti piedon ekster la urbojn sen trafi iun bandon da rabistoj. Soldatoj kiuj ne ricevis sian soldon, servutuloj kiuj forkuris, rabistoj...”

“Eble vi pravas,” penseme diris Fadrique.

Sed estis klare, ke li ne estas trankvila. Alva vidis tion kaj senpacience demandis:

“Kio igas vin pensi, ke mi okupiĝos pri bandoj da ĉifonuloj?”

Fadrique tamen denove eliris. La abato flustre demandis al Maarlo:

“Ĉu estas viaj viroj?”

“Jes. Mi igis ilin surmeti hispanajn armilojn. Tiel ili malpli facile okulfrapas.”

Kolere li daŭrigis:

“Ĉu tiu angorema babilulo do ne povas silenti?”

Li rapide eliris. Kelkajn momentojn poste Fadrique revenis:

“Nu! Ĉu vi estas trankviligita?” demandis lin Alva.

“Ŝajnas esti, kiel vi diris. Tiu ulo ofte vidas fantomojn, oni diras.”

Mansfeld venis al mi en la kuirejo kaj demandis, ĉu mi povus venigi momenton la abaton. Li estis ekscitita. La abato venis.

“Patro,” li diris, “mi pensas, ke estus pli bone, se ni gardus la grafinon de Egmont ĉi tie.”

“Kial?”

“Ankoraŭ nenio estas decidita.”

La abato tuj komprenis lin, ĉar mi jam rakontis al li, kion Mansfeld diris al Viglius pri la venonta ekzekuto.

“Egmont estas kondamnita al morto,” diris la abato.

“Jes, sed la ordono plenumi la juĝon restas ankoraŭ donenda,” diris Mansfeld.

“Kio igas vin pensi tion?” demandis la abato nekredema.

“Mia filo ĵus revenis. Mi ordonis lin resti en la urbo kaj provi paroli kun la pastro de la malliberejo. Nu, la pastro estis formala. Ili devas atendi la ordonon de la ekzekuto. Normale ne necesas doni tiun ordonon. Sufiĉas la juĝo. La ekzekuto sekvas ene de la tempolimo fiksita en la juĝo. Sed nun estis donitaj instrukcioj, ke la estro de la malliberejo ne rajtos plenumi la juĝon, antaŭ ol Alva eksplicite donos la ordonon. Ĉu vi komprenas, kion tio signifas, patro?” ĝoje demandis Mansfeld. “Tio kion oni rakontas, estas vera: Alva hezitas. Li ne deziras fari tion.”

Esperplena li rigardis la abaton kaj tiam daŭrigis:

“Li estas ĉi tie por konsulti vin, ĉu ne? Ni scias, kiel alta li taksas vian opinion. Ho patro, vi estas sankta viro, sed vi estas ankaŭ homo! Helpu nin!”

Subite la pordo de la kuirejo malfermiĝis kaj Alva aperis en ĝia aperturo.

“Kion signifas tiu ĉi flustrado?” li demandis kolere. “Ĉu tio ĉi estas monaĥejo aŭ kokinejo? Oni devus trovi kvietecon en Ter Kameren, silenton, pripensemon, sed oni ne trovas ilin tie ĉi! Mi trovas nur malkvietecon, bruadon kaj babiladon kvazaŭ de pigoj.”

Tiam li klakfermis la pordon malantaŭ si.

“Ni devas gardi la grafinon ĉi tie,” kviete respondis la abato al Mansfeld. “Via konsilo estas bona.”

Oni trovis la grafinon kun kelkaj geservistoj en unu el la gasteĉambroj.

“Grafino,” diris la abato, “mi petas vin resti provizore en la monaĥejo.”

Ŝi rigardis lin per ruĝaj, sed esperplenaj okuloj.

“Ĉu vi kredas, ke tio povus helpi?”

“Tiel longe kiel la ordono ne estos donita, restos la ebleco savi vian edzon. Tiu ebleco ne estas granda, sed ĝi ekzistas.”

Mansfeld ekkaptis la manon de la mizera virino kaj fervore aldonis:

“Se la kuriero ne foriros, via edzo vivos!”

La abato petis Mansfeld resti ĉe la grafino. Post kiam ni eliris, Maarlo venis al ni kaj diris:

“Mi igos ĉiujn forlasi la korton kaj tiam enveni miajn virojn.”

Pensante la abato rigardis la prilumatajn fenestrojn de sia laborĉambro, kie troviĝis Alva, kaj murmuris:

“Li kredos, ke oni intencas mortigi lin.”

“Li baldaŭ scios, kion signifas morti,” diris Maarlo, “kaj li pripensos dufoje antaŭ ol mortigi iun.”

“Ne,” respondis la abato. “Tio faros nenian diferencon. Li ne timas morti. De mate-no ĝis vespero li vivas nur por plenumi sian devon. Li vivas nur por tio kiel sombra, malamata soleculo, sen ĝojo, sen feliĉo. Ĉiuj granduloj estas liaj malamikoj, ĉar li estas la plej granda el ĉiuj, kaj la malgranduloj tremas antaŭ li, kvazaŭ antaŭ monstro aŭ fantomo. Sed li estas tre ambicia! Li absolute *volas* esti la plej granda. Mi demandas min, kiun rezulton tio donos post nelonge.”

“Ĉu vi pensas pri la personoj en lia palaco?” demandis Maarlo, subite atenta.

“Jes, ili devos entrepreni ion, kiam ili ricevos la mesaĝon, ke Alva estas kaptita. La demando estas nur, kion ili faros.”

“Tio estas bona por ni,” diris Maarlo. “Se li ne fidus la homojn en sia palaco, li helpos nin. Ekzemple skribante mesaĝon, ke ili liberigu Egmont.”

Impete la abato diris:

“Kiam li farus tion, li estus la plej malestiminda persono, kiun mi konas.”

Maarlo estis konsternita.

“Sed vi volas, ke li savu Egmont, aŭ ne?” li demandis hezite.

“Jes, pro kompatemo kaj amo, kiel Jesuo, sed ne pro liaj rubandoj kaj sabroj!”

Li iris al la pordego kaj parolis al la pordegisto, montrante Maarlo. Tiam ni reeniris en lian laborĉambron.

Alva denove sidis ĉe la fajro kun pokalo da vino en sia mano. Fadrique ne estis kun li. Alva rigardis supren kaj demandis:

“Ĉu la grafino de Egmont jam foriris? Mi donos eskorton al ŝi.”

“Ne necesas,” respondis la abato. “La grafino restos ĉi tie.”

“Ne!” kriis Alva. “Eh... mi volas diri, ĉu tio estas necesa?”

Kiam la abato respondis nenion, Alva nervoze demandis:

“Kial? Kion la grafino volas ankoraŭ fari ĉi tie?”

La abato staris fronte al li ĉe la fajro.

“Ĉu vi demandas tion nun?” li demandis mallaŭte.

“Kion?” demandis Alva, maltrankvila.

“Kial vi venis al Ter Kameren?”

Kiam sekvis silento, la abato denove metis sian demandon:

“Kial vi venis?”

Intertempe mi finis la forigon de la manĝilaroj kaj volis foriri, sed Alva retenis min.

“Ne, ne foriru.”

Li rigardis la abaton kun vizaĝo tordita kvazaŭ per doloro.

“Mi hontas,” li diris, “sed ĉar ne estas bone kaŝi la aferojn, pri kiuj oni hontas, mi volas diri tion en la ĉeesto de tiu ĉi monaĥo.”

Li turnis sin al mi kaj diris:

“Petu ankaŭ la monaĥojn kiuj laboras en la kuirejo, ke ili venu ĉi tien.”

La abato volis interveni, sed Alva haltigis lin per mangesto.

“Mi insistas.”

Li donis al mi signon, kaj kiam mi revenis kun patro Bruno kaj fratulo Eduardus, Alva leviĝis. Li staris kun la dorso turnita al ni kaj la rigardo al la fajro.

“Estis stranga letero, kun vi skribis al mi,” diris la abato.

“Mi ne tre bone scias, kie mi staras,” diris Alva senkuraĝe.

Tiam, kvazaŭ iritita per liaj propraj vortoj, li korektis sin.

“Mi memkompreneble scias tion, sed...”  
 “Vi estis konfuzita dum la vizito de la grafino de Egmont.”  
 “Mi tro laboris la lastajn monatojn. Mi bezonas ripozon.”  
 “Vi havas timon,” diris la abato.  
 “Ne, mi ne havas timon. Mi estas nur iom laca.”  
 “Kio timigas vin?” daŭrigis la abato, neperturbegbla.  
 “Sed kio diras al vi, ke mi timas ion?”  
 “Ĉu estas pro tio? Ĉu vi venis pro tio? Ĉu vi timas ion?”  
 “Mi diras al vi, ke mi estas laca. Laca!”  
 “Kion vi volis diri per ‘tiu trankvileco’, ĉe kiu oni demandas sin, ĉu ne estas maltrankvileco?”  
 “Kiu diris tion?”  
 “Vi mem.”  
 “Forgesu do tion.”  
 “Vi krias, kiel faras infano en mallumo por eviti, ke klaku ĝiaj dentoj.”  
 Alva staris antaŭ la fajro kun pendantaj ŝultroj kaj klinita kapo. Kiel soleca kaj mizera li estis!  
 “Kial tiu ĉi nokto devas esti parto de mia vivo?” li demandis, senkonsila.  
 Tiam li turnis sin, sinkis sur la genuoj antaŭ la abato kaj petegis:  
 “Helpu min, patro, helpu min!”  
 Sekvis morta silento, kiu daŭris kelkajn momentojn. Tiam li kriis kvazaŭ en morta angoro:  
 “Helpu min!”

## DEKA ĈAPITRO

Tiam komenciĝis la stranga konfeso, kiun ni – patro Bruno, fratulo Eduardus kaj mi – konsternitaj kune aŭdis kaj pri kiu mi pensas, ke ĝi estis la komenco de tiu necerteco, ĉu timega, ĉu esperdona, kiu ekde tiam estis regonta la reston de nia vivo.  
 Alva surgenuis sur la planko, apogante sin sur la kubutoj kaj profunde klinante sin, kun la vizaĝo en la manplatoj.  
 “Mian tutan vivon mi tre nesufiĉe kulpigis min pri vanteco,” li diris. “Mi fariĝis fama armeestro kune kun la franca duko de Guise, la plej fama en Eŭropo. Sed tio ne sufiĉis al mi. Mi ankaŭ volis esti politikisto, ne ia politikisto, sed la plej granda. Fariĝi reĝo ne estis eble por mi, sed mi povus regi ie, kie mi havus neniun super mi ol la reĝon. Tial mi venis al la Nederlandoj, por regi, por esti ĉi tie, kio estas la reĝo en la sudo. Mi intence atendis, ĝis kiam ĉi tie ekfuriozis la ribelo, kaj nur tiam mi akceptis la taskon, kiam mi havis tiun certecon. Mi

tamen sciis, ke estas urĝe agi. En mia koro mi ankaŭ volis urĝe agi, sed mi atendis. Kiam mi poste akceptis la mision, mi ankoraŭ malrapidis, pretekstante, ke mi ne povas bone elteni la klimaton de tiuj ĉi regionoj, sed en realeco pro la korteganoj en Hispanio, precipe Medina Celi, kiuj kaŝe observis min kiel lupoj, esperante tagon post tago povi eligi min el la favoro de la reĝo. Eĉ nun, en tiu ĉi momento, mi timas, ke ĉe mia reveno ili havos pli da povo kaj influo ol mi. Dio pardonu al mi tiun frenezcon! Li pardonu al mi ankaŭ la venezonecon, kun kiu mi ofendas la homojn parolante kun ili, kaj la arogantecon, kiun mi malfacile povas kaŝi en tiu ĉi lando, kiun mi profunde malŝatas. Nur kun granda peno mi povas malhelpi, ke mia kolero fariĝu malamo. Mi volas, ke miaj juĝoj estu justaj, sed ĉiufoje kiam mi ne regas min, ili degeneras al venĝo. Ĉiajn malbonaĵojn mi plenumis. Mi pentas pri ili.”

“Kial?” demandis la abato.

Alva hezite levis la kapon.

“Kiel do, kial?”

“Pento povas origini el multaj fontoj,” respondis la abato. “Nur unu el ili estas bona, la aliaj estas sinamo.”

Senhelpe kaj timeme Alva rigardis lin.

“Patro, kio okazas al mi?” li demandis.

“Kelkafoje estas timo en via rigardo, kiam vi rigardas supren. Kial estas tiel?”

Alva rigardis la plankon kaj diris:

“Tiu ĉi lando ribelis. Ĝi senhonorigis Dion kaj ofendis la reĝan majeston. Kriante obscenajn vortojn, kanajlaro tretadis sur sanktajn hostiojn kaj dancadis sur pecetoj de sanktulfiguroj. Aŭdante, ke mi, Alva, estas venanta, ili fuĝis. Parton el ili mi ankoraŭ povis kapti. Mi kumpelis ilin kaj batadis sur ilin. Mi batadis kun forto, kiu ŝajnis ne havi limon. Kolero ardis kaj furiozis en mi. Sed nun... Mi ne scias, kiel, kie aŭ kiam tio komenciĝis, sed nun mi ne plu povas. Miaj brakoj estas lacaj...”

Li rigardis supren kaj necerte demandis:

“Ĉu estas vere, ke patrinaj diras al malbonkonduktaj infanoj: ‘Ni tuj venigos Alva por puni vin?’”

La abato respondis:

“Mi aŭdis, ke pro kontenteco vi interfrotis viajn manojn dirante: ‘Bonege!’ kiam oni unuafoje rakontis tion al vi. Ĉu estas vere?”

Alva rigardis la plankon.

“Tio estis parto de mia entuziasmo,” li diris. “Mi jam ne povis klare pensi.”

Denove li rigardis supren, demandante:

“Ĉu estas vere? Ĉu la patrinaj diras tion?”

“Jes, ili diras tion.”

“Mi tiom bedaŭras tion,” flustris Alva.

Tiam li pene starigis.

“Kie tio komenciĝis?” li demandis, reveme rigardante en la fajron. “Kie? Ĉu en Gento? Tie mi iam najlis apud la belfrido dekkvar teksistojn sur iliaj antaŭpordoj, ĉar ili kaŝis francajn predikistojn en siaj domoj. Unu el la teksistoj estas ankoraŭ juna. Ĉar ili ĉiuj kune kantis psalmojn, mi igis eltranĉi al ili unu post la alia la langon. La junulo estis la lasta. Kun tremanta voĉo li kantis: ‘Dio estas mia paŝtisto’. Tiam, antaŭ ol malfermi la buŝon por lasi eltranĉi la langon, li rigardis min kaj diris: ‘Se vi faras tion por Dio, vi estas mia frato.’”

Timeme li rigardis la abaton kaj insiste demandis:

“Ĉu tio estas ebla, patro? Ĉu mi povas esti frato de kalumnianto? Tio ne povas esti la volo de Kristo.”

“Por neniu Kristo estas pli milda ol por la pekuloj,” diris la abato.

“La pekuloj, jes, sed mi ne parolas pri ili. Kiu malobservas la Dek Komandojn de Dio povas esti savita per pento kaj pentofarado. Sed kalumniantoj kaj malamikoj, kiuj turnas la dorson al Dio kaj forlasas Lin, kiuj malpurigas Lian domon kaj tretas sur Lian dian Korpon, ĉu oni povas esti frato de tiaj kanajloj?”

“Ĉu tiaj kanajloj krucumis Kriston?”

“Jes.”

“Tiam vi scias, ke vi povas esti ilia amiko, ĉar Jesuo pardonis ilin.”

“La martirmorto de Jesuo estis necesa por liberigi la homojn. Tiu senmezura ago estas pli granda ol la homa komprenpovo. Sed kio venis poste – sekvi Lin, adori Lin kaj konservi pura Lian doktrinon – tio estas homa laboro. Ĉu ni ne povas, ne devas fari tion, kaj ankaŭ juĝi, laŭ homaj normoj?”

“Ĉu normoj kiel ekzemple malamo...?”

“Ne, ne malamo.”

“... aŭ egoismo, vanteco, malhumileco, venĝemo, fanfaroneco de la speco kiu krias: ‘Mi havas la tutan veron, kaj vi tute eraras.’”

Konsternita, Alva demandis:

“Ĉu estas fanfaronulo iu kiu predikas la parolon de Jesuo, iu, kiu diras: ‘Tiu parolo estas vera, tiu sola’? Ĉu Paŭlo estis fanfaronulo? Ĉu estis Jesuo?”

“Certe ne, sed ili ne mortigis aŭ eĉ punis kiel vi la homojn, kiuj ne pensis kiel ili.”

Alva silentis kaj rigardis la plankon

“Ĉu tio pezas sur vin?” demandis la abato.

“Kion vi volas diri?” Alva demandis hezite.

“Vi estas nek Paŭlo nek Jesuo. Vi estas mortema kaj pekanta homo, sed vi agadas

kvazaŭ vi estus Dio mem. Tio estas via timo.”

“Mi parolas kaj agas en la nomo de Dio, ne kvazaŭ mi estus Dio.”

“Tion ankaŭ mi diras al mi la tagojn, kiam ne estas bone al mi.”

“Antaŭ mi staras la vero, kvazaŭ brilanta stelo,” diris Alva kun forto.

Oni povas nur rigardi al la steloj ekde mallumo,” rimarkis la abato.

Alva rigardis lin malkonfide.

“Kia mallumo?”

“Pri kiu mi ĵus parolis: egoismo, vanteco, malhumileco, venĝemo, fanfaroneco, malamo, sed antaŭ ĉio...”

“Kio antaŭ ĉio?”

“Nescieco.”

La timo reaperis en la okuloj de la duko.

“Nescieco? Sed ĉu ne sufiĉas al ni tio kion instruas la Eklezio?”

Nun li staris tuj kontraŭ la abato kaj diris, kvazaŭ serĉante subtenon por sia pensmaniero.

“Ho patro! En kia stranga tempo ni vivas! Kio igis Kopernikon traserĉi la ĉielon kun tia sovaĝa fervoro? Kial li absolute volis mezuri la distancojn ĝis la steloj? Kio igas Dodo-neon tiel fikse rigardi la florojn? Kio persvadis Vesalius distranĉi homajn korpojn? Kial Merkator kaptis la teron en mapo? La granda mistero de la vivo fariĝas manlibro por studentoj. Kial, patro, por kio?”

Li montris pentraĵon super la fajrejo.

“Tio estas de Mikelanĝelo. Mi konas tiun viron. Mi renkontis lin en Florenco: li estis hakanta kiel giganto en marmorblokojn. Oni diras, ke li estas tre religiema viro. Mi volas kredi tion... Eble li estas... Sed kial tiu brilo? Tiuj belegaj ĝardenoj kaj palacoj? Tiu pentraĵo super la pordo estas titano, ĉu ne?”

“Jes.”

“Sed rigardu tiun blindigan kaskadon de grandaj, brilaj korpoj: kiuj ili estas? Ĉu ili estas homoj? Jes, se vi volas, sed ili estas belege vestitaj kiel dioj. Servistoj en reĝaj vestaĵoj. Nuntempe oni ĉiam aŭdas nur la vorton ‘homo’, kaj dum tagoj la vorto ‘Dio’ ne estas dirata. Kion tio signifas? Patro, pri kio temas sur la tero?”

La abato indikis seĝon ĉe la skribtablo apud la fenestro.

“Tie, sur tiu seĝo sidis iutage antaŭ kvardek jaroj la granda Erasmo. Mi tiutempe estis novico kaj alportis al li vinon kaj panon, kaj dum li manĝis, mi povis restadi kaj babili iomete kun li. Mi diris al li: ‘Mia spirita konsilanto riproĉas al mi, ke mia vojo al Dio ne estas la bona.’ Mirigite Erasmo respondis: ‘Ĉu via vojo al Dio? Sed kiel io,

kio kondukas al Dio, povas esti malbona? Kiam mi diris, ke ankaŭ mi respondis tion, li ridetis kaj rimarkis: 'Atentu! Vi fariĝos aŭ sanktulo aŭ herezulo!'

"Kial vi rakontas tion?" demandis Alva, suspekteme.

"Antaŭ multaj jaroj Dio revelaciis sin al la homoj, kaj nun la homo komencas serĉi Dion en la materioj. Ĉu tio ne estas bona ankaŭ?"

Kun rigida vizaĝo Alva respondis:

"Tio odoras je tiu ulo el Wittenberg<sup>7</sup>."

Kviete la abato respondis.

"Tiam tio pledas por li."

La dureco malaperis el la okuloj de Alva.

"Ĉirkaŭ ĉiu brilo estas mallumo, tio estas vera. Sed mi ne povas kompreni, kial estus utile nur ĉiam ĉirkaŭrigardi en mallumo. Ŝajnas al mi, ke tiuj kiuj nepre volas fari tion, eble serĉas ion alian ol Dion."

"Kial povus esti malagrabla al Dio, ke oni klopodas pli bone kompreni Liajn laborojn kaj vortojn kaj admiri ilin?"

Alva rektigis sin kaj diris malmilde:

"La vortoj de Dio estas gardataj nedifektitaj far la Eklezio."

"La vortoj de Dio ne troviĝas en la teologiaj traktatoj, sed en la Sankta Skribo. Kiam estas dusenco aŭ neklareco, ni devas reiri al la Sankta Skribo."

"Ĉu vi dubas pri la vortoj de la Eklezio?"

La abato koleriĝis kaj kriis:

"Jam de jarcentoj la Eklezio estas maljuna, ruĝvizaĝa, ŝvelinta dikulaĉo, kiu sin gultas pro la multa manĝo. Kaj la Sankta Skribo troviĝas en malnova, forgesita kelo sub polvo, araneaĵoj kaj ŝimaĵoj!"

Alva deziris furiozi kontraŭ la abato, sed tiu kriis:

"Ne ŝajnu, kvazaŭ vi mem tion ne sciis! La Eklezio atingis la plej malaltan pinton en sia ekzisto ĝis nun<sup>8</sup>! Vi mem diris tion. Kiel ofte vi primokis la pastrojn! Vi nomas ilin nesciaj, diboĉaj kaj avidaj. Kaj tiaj ili estas! Vi diris: 'La episkopo tronas sur kofro plena je mono, la abato vendas sian benon por mono kaj la papo matenmanĝas kun sia bastardfilo'<sup>9</sup>. Vi ŝajnis esti malsana, kiam vi

diris tiajn aferojn. Bone! Sed kiu indkas la vundojn, tiu devas ankaŭ helpi resanigi ilin!"

"Tio..."

"Tio ne rilatas al la fakto, ke oni estas katoliko aŭ protestanto," impete interrompis lin la abato. "Tio rilatas al pureco, amo kaj kuraĝo! La kuraĝo, se oni protestas kontraŭ tiu stato, komenci per si mem!"

Tiam, refariĝante trankvila kaj afereca, li demandis:

"Ĉu vi jam demandis vin, kia estus la vivo sen kontakto kun Dio?"

Alva terurigiĝis.

"Kion vi diris?" li demandis.

"Tio estas kio maltrankviligas vin, ĉu ne?"

"Patro, mi multe toleras de vi. Ĉe alia, tio sufiĉus por konduki lin al la eŝafodo!"

"Neniaj elturnoj!" diris la abato, farante geston, kvazaŭ li forŝovis obstaklojn. "Vi ja scias, ke vi ne povas timigi min tiamaniere."

Alva turnis sin al la fajro.

"Tiu ĉi lando estas tiel fremda al mi," li diris pensante. "Kie ajn oni troviĝas, oni estas ĉirkaŭita de vivamaj, preskaŭ gajaj homoj. Ili estas religiemaj kaj iras al la meso, sed ili faras komercon kun paganoj kaj invitas herezulojn al sia tablo. Ili pekas kaj pentas, sed ne pentofaras. Ili estas koleremaj kaj fervoraj, sed en sia interno ili restas kvietaj kaj ŝajnas feliĉaj. Ili klaraj, helaj okuloj faras min necerta. Mi timas ilian ridemon. Homo ne povas kalkuli je siaj propraj fortoj. Kion faras vitobranĉo en la spaco? Ĝi kliniĝas kaj moviĝas tien kaj reen, serĉante subtenon. Kiam ĝi ne povos trovi tiun, ĝi frue-malfrue falos malsupren."

La abato demandis.

"Ĉu vi iam iam sonĝis, ke vi metas la piedojn sur lokon, kie ne estas grundo?"

Sed Alva nee skuis la kapon.

"Mi ne volas esti necerta, patro! Mi ne volas havi timon! Kristano ne rajtas havi timon!"

"Sed vi havas timon. Ĉu pro tio vi ne plu kuraĝas tiel facile mortigi homojn?"

"Mi ankoraŭ kuraĝas! Mi devas kuraĝi."

"Ĉu vi devas?" la abato demandis milde.

Senkonsila, Alva tordis siajn manojn.

"Ĉu vi ne vidas, aŭdas kaj sentas per ĉiuj nervoj de via persono la neŝanceleblan veron, ke tiu, kiu ne servas Dion, damnas sian animon? Kaj ke oni ne povas duone servi Dion?"

"Se tio estas certa, kial do vi estas turmentata de via konscienco?"

"Mi ne estas turmentata de mia konscienco."

"Vi kaŝas vin en monaĥejoj."

"Kiu serĉas lokon tuj apud Dio, ĉu tiu ne serĉas la ĝustan lokon?"

<sup>7</sup> Aludo pri la aŭgustena monaĥo Lutero, kiu la 31-an de oktobro 1517 afiŝis kontraŭ la preĝejpordo de Wittenberg en Germanio la 95 tezojn, kiuj signis la komencon de protestantismo.

<sup>8</sup> Ekde jarcentoj la papo kaj episkopoj estis nobeloj, kiuj havis ankaŭ sekularan potencon. Ili vivis kiel princoj en lukso, ofte havis konkubinajn kaj oftege neglektis sian spiritan taskon.

<sup>9</sup> Aludo pri la malbonfama papo Aleksandro VI Borgia (1431-1503), kiu aĉetis la papecon, kaj lia egale malbonfama bastardfilo, Cesare.

“Sed vi volas, ke alia diru al vi, kio estas bona kaj kio estas malbona.”

“Kio estas pli saĝa ol peti la konsilon de saĝulo?”

“Honesteco!”

“Mi estas honesta!” ekkriis Alva.

“Esti honesta volas diri: fari kion oni honeste kredas devi fari.”

“Tion mi faras.”

“Sed farante tion, vi havas timon,” diris la abato.

Ne plu eltenante la rigardon de la abato, Alva denove deturnis sin de sia interparolanto.

La abato ne cedis.

“Vi asertas, ke vi devas mortigi Egmont kaj Hoorn, kaj multajn milojn da aliaj homoj. Miloj da sanktaj vivoj, kiujn kreis Dio kaj kiujn vi devas neniigi, ‘ĉar Dio ordonas tion al vi’.”

La abato skuis la kapon kaj daŭrigis :

“Ne, senjoro! La malbona de viaj vortoj estas, ke vi diras ilin tro laŭte kaj tro ofte, kaj ke vi diras ilin ne al mi, sed al vi mem. Por pravigi vin, por kuraĝigi vin, por konvinki vin. Se vi tiel daŭrigos, vi baldaŭ ne plu estos juĝisto, sed amasmurdisto, kaj vi plaŭdos en sango kiel buĉisto! Estas naŭzega spektaklo!”

Alva ne koleriĝis.

“Kial vi konstruigis kapelon en via palaco flanke de via dormoĉambro?” demandis la abato.

“Kiel vi scias tion?”

“Ne estas interkomunika pordo inter la kapelo kaj via ĉambro. Antaŭe estis unu, sed vi forigis ĝin kaj anstataŭigis ĝin per kurteno, ĉu ne?”

“Jes.”

“Kial?”

“Kial vi demandas tion?” demandis Alva siavice, nervoza. “Vi scias, ke mi amas preĝi de tempo al tempo inter la aliaj aferoj.”

“La tutan nokton bruladas kandeloj en via ĉambro.”

“Mi dormas nur malmulte. Kaj kandellumo helpas min enmemiĝi.”

“Enmemiĝi aŭ malpli timi?”

“Ne malpli timi! Ne diru tiujn aferojn!”

“En la kapelo flanke de via ĉambro ĉiam ĉeestas du monaĥoj, kiuj laŭ via ordono kantas antifonojn. Kandellumo, kantado de monaĥoj, certe fojfoje incenso... Kion vi volas pruvi al vi mem per tio?”

“Mi ne timas. Ne kiel vi diras.”

“Tiam *vivu do*, vivu en la lumo.”

“Oj, kiom da konkludoj vi tiras el negravaĵoj! Mia misio lacigas min. Mi estas maljuna kaj malsana. Ĉu estas tiel strange, ke

mi deziras iom da silento? Iom da ripozo? Iom da enmemiĝo?”

“La lastajn semajnojn vi igis senkapigi pli da homoj ol dum ĉiuj antaŭaj monatoj. Strange enmemiĝo. Ĝi similas pli al furiozeco laŭ mi. Sed kial? Kial vi tiel sovaĝe furiozas? Ĉu por konvinki vin, ke toleremo estas peko? Ĉu tial vi tiel terure punas? Por encerbigi al vi tagon post tago, ke vi ne rajtas esti milda?”

“Mi ne rajtas esti milda!”

“Sed Jesuo estis milda!” diris la abato. “Jesuo iris al la homoj por instrui al ili, kio estas amo. Jesuo estas bona, milda, delikata magistro, kiu amas siajn infanojn, kiu fidus ilin kaj kiu ridetas, kiam ili bruas kaj troigas. Sed vi estas avara, malmilda, maljuna kolereculo, kiu superrigardas la mondon kaj spionas, ĉu iu ie faras movon alian ol estas preskribita en viaj flaviĝintaj paperoj.”

“Mi ne komprenas vin, patro. Kion vi diras, estas bela, sed ĉu oni povas esti tolerema por homoj, kiuj tretas sur Dion? Ne diru, ke ili ne faris tion. Ili faris tion. Ili ĵetis la hostiojn sur la plankon kaj distretis ilin per la piedoj! Kiel do vi nun povas diri, ke oni devas esti milda por tiaspecaj homaĉoj?”

“Vi povas aŭskulti ilin!”

“Mi faras tion. Ĉiu kiu aperas antaŭ la tribunalo, rajtas defendi sin.”

“Vi aŭdas, kion ili diras, sed vi ne aŭskultas, kio estas en ilia koro.”

“Koroj de tia speco povas nur enteni malparaĵojn.”

“Benataj estas tiuj kiuj volas supreniri al Dio el tia marĉo! Helpu ilin!”

“Ne! Tion vi ne rajtas peti de mi. Mi ne povas! Mi ne povas!”

“Vi estas tro malforta por esti milda. Vi povos esti nur malmilda.”

“Vi pensas alie ol mi. Vi ĉiuj. Mia lando estas fiera kaj forta. Ĝia grundo estas bruldefektita de la suno: somere ĝi estas varmega kaj polvoza, sed vintre muĝas tie ŝtormoj, tiel furiozaj kaj glaciaj, kiel ili neniam okazas en via lando. Mia patro kaj mia avo batalis sian tutan vivon kontraŭ la maŭrojn. La maŭroj estas herezuloj, kaj tial estis iliaj malamikoj. Mia avo kaj mia patro nomis ilin ĉu herezuloj, ĉu malamikoj. Tiuj vortoj signifas do la samon. Nu, ili formis min. Eble tial la ĉi-tieaj herezuloj ne povas esti io alia por mi ol malamikoj.”

“Vi igas vin svenigi de antifonkantistoj en via kastelo, kaj nun vi rampas inter la brakojn de via patro. Inter liajn brakojn? Ne! Sur liajn genuojn! Estu viro kaj alfrontu mem vian timon!”

“Mi ne havas timon!” kriegis Alva ekster si mem. “Ne de vi! Ne de la diablo! Nenio, nenio povas timigi min!”

Mi vidis Viglius, kiu staris en la kuirejo, farante ekscititajn gestojn. Kiam mi iris al li, li diris mallaŭte kaj time:

“Mi devas urĝe paroli al la abato. Okazas strangaj aferoj en la monaĥejo.”

Li jam estis veninta en la laborĉambron, sed la abato kolere kriis al li:

“Ne!”

“Patro abato, mi prezentas al vi miajn ekskuzojn. Ankaŭ Via Duka Moŝto bonvolu ekskuzi min,” diris Viglius, “sed...”

“Ne nun!” diris la abato firmege.

“Sed urĝas. Estas ke...”

“Foriru! Foriru, magistro Viglius! Foriru!”

Sed Viglius plu staris tie kaj daŭrigis:

“La granda pordego estas malfermita. Homoj eniras. En la angulo de la korto apud la staloj oni batalas.”

Alva returnis sin kun stranga rigardo, sed li ne ektimis.

“Ĉu homoj?”

“Jes, Via Duka Moŝto.”

“Kiaj homoj?”

“Mi ne scias, sed ili enkuris tra la pordego.”

Tiam mi vidis pluraj aliajn monaĥojn eniri la kuirejon kaj kolektiĝi ĉe la pordo de la laborĉambro de la abato.

Alva rigardis la abaton kaj diris:

“Mi neniam aŭdis, ke meze de la nokto ŝtelistbandoj povas enpenetri fortikigitan monaĥejon. Fadrique! Kie estas Fadrique?”

## DEK-UNUA ĈAPITRO

Alva sendis min eksteren serĉi Fadrique, sed mi jam renkontis lin en la koridoro, kondukanta al la interna korto. Senspira li enkuregis kaj rapide diris al sia patro:

“Oni atakas la abatejon.”

“Kiu do?” malbonhumore sed trankvile demandis Alva.

“Soldatoj! Ili envenas tra la pordego. Mi ne komprenas, kiel ili malfermis ĝin. Ili surprizatakis la gvardion.”

“Nian gvardion?” demandis Alva, sulketigante la frunton.

“Jes. Unuj gvardistoj ankoraŭ rezistas, sed tio daŭros ne plu tre longe.”

Alva rigardis lin kun miro. Li montris en la direkto de la interna korto kaj demandis nekredante:

“Ĉu venis ĉi tien viroj, kiuj surprizatakis kaj venkis nian gvardion?”

“Jes. Tion mi jam diris al vi.”

“Kiu estas ili?”

“Mi ne scias.”

“Tiam ekzamenu tion!”

“Ne estas tempo por ekzameni! Ni devas tuj foriri!”

“Ni foriri? Fuĝi? Antaŭ ĉifonuloj serĉantaj monon?”

“Ne estas ĉifonuloj! Skutojn kaj kaskojn ili portas. Lancojn kaj glavojn ili havas. Soldatoj ili estas!”

“Ne tiel ekscitiĝu. En tiu ĉi lando ne estas soldatoj krom la miaj.”

“En la nomo de la ĉielo, rapidu do!” diris Fadrique nerveze.

Tiam li turnis sin al la abato :

“Vi ja havas subteran galerion, ĉu ne? Vi devas havi unu. Ĉiuj tiuspecaj monaĥejoj havas unu. Konduku nin al ĝi. Ni devas foriri de ĉi tie.”

Nekredante Alva diris:

“Ĉu vi serioze asertas, ke tiuj viroj ne celas la abatejon, sed min?”

“Tion mi opinias, jes. Mi ne scias pli pri tiu afero, ol vi, sed mi ne povas ekspliki ĝin alimaniere.”

“Ĉu tio estas atako direktita kontraŭ min? Kontraŭ min? Fadrique, diru al mi, ke la maŭroj staras antaŭ la pordego, aŭ ke François de Guise alvenas kun siaj rajdistoj kaj kanonoj. Tiuj estas kontraŭuloj kiuj gravas! Se ne la viroj de tiu ĉi lando! Tiujn mi ja tiel timigis, nur venante ĉi tien, ke ili, nun preskaŭ jaron poste, ankoraŭ ĉiam aspektas grizaj.”

“Sed ili estas ĉi tie, patro! Tre proksime! Ili venkis nian gvardion. La monaĥoj kuregas tien kaj reen. Rigardu tien, vidu, kiel ili amasiĝas!”

Alva turnis sin al la abato, kiu estis parolanta al iuj monaĥoj, kaj demandis:

“Kio okazas ĉi tie? Vi havas taglaboristojn kaj servistojn por defendi la abatejon, kiam estiĝas tumulto. Kie ili estas?”

Tiam eniris la senjoro de Maarlo. Ĉiam vestita en froko, kaj sekvata de kelkaj soldatoj. Li montris Alva kaj diris:

“Estas tiu. Ligu al li la manojn sur la dorso.”

Tiam li montris Fadrique.

“Kaj ankaŭ al tiu.”

Li turnis sin al Viglius kaj diris:

“Kontraŭ vi ni ne havas plendmotivojn, sinjoro, krom ke vi ĉiam estas tro singarde-ma, sed ne ĉiam tre kuraĝa. Tamen mi devas igi gardi vin kelkan tempon. Pardonu min, mi petas.”

La vizaĝo de Alva rigidiĝis. Konsternita, li rigardis Maarlo. Kiam la soldatoj ekkaptis lin kaj ligis al li la manojn sur la dorso, li lasis ilin fari tion, klare ne kapabla kredi, ke ili povas fari ion tian al li.

Tiam li subite fortege ekbaraktis por liberigi sin.

“Lasu min!” li ekkriis. “Kiu estas tiel aŭda-ca tuŝi min? Lasu min!”

Li luktis kaj piedfrapis per ĉiuj siaj fortoj kaj ekkriis:

“Senhontaj kruduloj! Mi hakos vin en pecoj kaj ĵetos vin antaŭ la hundojn! Lasu min, mi diras al vi!”

Sed la soldatoj ridaĉis, superfortis lin kaj firme ligis lin. Samtempe aliaj soldatoj superfortis ankaŭ Fadrique.

Konscia, ke ĉiu rezisto estas vana, Alva trankviliĝis kaj rigardis ĉirkaŭ si. Atente li ekzamenis la vizaĝojn de la soldatoj kaj demandis:

“Kiu vi estas?”

Kiam Maarlo venis por kontroli, ĉu la ŝnuroj estas firme ligitaj, Alva demandis lin, mirigita:

“Ĉu monaĥo?”

Suspekteme li turnis sin al la abato kaj demandis:

“Ĉu vi estis informita pri tio ĉi?”

Maarlo deĵetis la frokon kaj diris:

“Nenio estas pli facile ol kaŝi sin en froko. Oni devas nur eniri ĉi tien kiel gasto, misuzi la konfidon kaj traserĉi kelkajn kofrojn.”

“Kiu vi estas?” demandis Alva.

“Mi estas la senjoro de Maarlo.”

Alva rigardis lin atente.

“Ĉu vi iam venis al mia pordo, por peti aŭdiencon por Egmont?”

“Unufoje mi havis la plezuron vidi vian dorson. Poste mi vidis nur la pordon.”

“Ĉu vi, maltaŭgulo, kamparano, kiu nomas vin senjoro, ĉu vi kuraĝas ribeli kontraŭ mi?”

Ankoraŭfoje li provis liberigi sin el la kaptio de la soldatoj, sed li ne sukcesis.

Maarlo donis signon al la soldatoj kaj diris:

“Ek! Ni ne havas multan tempon.”

Kolere Alva rigardis ĉirkaŭ si.

“Kio okazas ĉi tie?” li demandis. “Kiu komencis tiun frenezecon?”

Li turnis sin al Maarlo.

“Kial vi faras tion? Kion vi volas de mi?”

Maarlo ekstaris, antaŭ ol li respondis:

“La vivo de grafo de Egmont.”

Alva plu rigardis lin kun atento kaj vidis, ke Maarlo parolas tre serioze.”

“Ĉu interŝanĝe de la mia?”

Maarlo kapjesis :

“Tio estas la celo.”

La grafino de Egmont enkuris.

“Maarlo!” ŝi diris, konsternita. “Kion vi faras ĉi tie?”

Tiam ŝi vidis Alva kaj Fadrique starantajn kun kunligitaj manoj inter la soldatoj.

Forte timigite ŝi demandis:

“Kio estas tio? Estis tumulto kaj kurado sur la interna korto. Ĉiuj diras ion, sed neniu ŝajnas scii, kio okazas.”

Maarlo fleksis la genuon antaŭ ŝi kaj fervore kisis ŝian manon. Tiam li diris, rigardante ŝin:

“Se Dio volas, la senjoro de Egmont estos denove libera post nelonge.”

Grafino Sabina fikse rigardis lin kaj preskaŭ nevidate nee skuis la kapon. Sed tiam subite larmoj eliĝis el ŝiaj okuloj.

“Ho Dio! Ĉu tio estas ebla?”

Maarlo restariĝis kaj diris:

“Restu en la abatejo. La urbo estas malsekura. Poste mi diros al vi, kie vi povos reunuigi vin kun la grafo.”

La grafino tiel fortege ekploris, ke ŝi ne povis respondi momenton. Tiam ŝi diris:

“Tiu feliĉeco estas tro granda.”

Ankaŭ Mansfeld eniris. Li vidis Alva kaj Fadrique starantajn inter la soldatoj.

“Kio okazas ĉi tie?” Mansfeld demandis, timigita. Li rigardis la soldatojn.

“Kiu vi estas? Kion vi volas?” li demandis.

Maarlo antaŭeniris kaj diris:

“Vi povas gardi vian spadon, grafo de Mansfeld. “Ni scias, ke vi estas ĉi tie por pledi por Egmont. Ni estas ĉi tie por la sama kialo, sed ni procedas alimaniere.”

“Kiamaniere?” Mansfeld demandis, maltrankvila, sed li ne ricevis respondon. Tiam li tretis ĝis antaŭ Alva kaj diris:

“Vi estas ligita!”

Li rigardis Fadrique kaj diris:

“Kaj ankaŭ vi... Kio signifas ĉio ĉi?”

Maarlo respondis:

“Se nia plano sukcesos, la grafo de Egmont eliros la malliberejon post nelonge.”

“Pri tio mi komprenas nenion.”

“Ni gardos Alva kiel ostaĝon, ĝis kiam Egmont estos liberigita.”

“Kara ĉielo!” murmuris Mansfeld.

“Ĉu vi bonvolas konduki la senjorinon de Egmont al sekura loko en la abatejo?” demandis lin Maarlo. “Vi baldaŭ aŭdos, kiel la afero finiĝos.”

Li kondukis ilin ĝis la pordo kaj fermis ĝin malantaŭ ili.

## DEK-DUA ĈAPITRO

“Vi frenezas,” diris Alva. “Kio certigas vin, ke vi iam sukcesos? Estas ekskludite, ke mi iam liberigos Egmont.”

Maarlo donis signon al la soldatoj, ke ili devas proksimiĝi, kaj diris:

“Iru rigardi, ĉu ĉio estas sekura malsupre. Tie, tiu pordo.”



“Ĉu la koridoro troviĝas tie?”  
 “Jes, malantaŭ la vin-kelo, maldekstren. Estas blanka plata ŝtono en la angulo. Sur ĝi staras granda vinbarelo. Vi translokigu la barelon kaj levu la ŝtonon helpe de la ferstango, kiu troviĝas en la barelo. Iru.”  
 La soldatoj iris tra la pordeto, kiu kondukis al la kelo. Alva sekvis ilin per la rigardo.  
 “Ĉu koridoro?” li diris. “Pri kia koridoro vi parolas? Kien vi volas konduki nin?”  
 “Provizore nenien,” repondis Maarlo. “Restu trankvila.”  
 La abato venis al Maarlo kaj demandis, mirigita:  
 “Kiel vi scias tion pri la koridoro?”  
 “Ni posedas ĉiujn konstruajn planojn de la abatejo,” Maarlo trankvile respondis.  
 Alva koleriĝis.  
 “Ĉu vi frenezas? Kiom da soldatoj vi havas? Mi havas pli da rotoj ol vi da soldatoj!”  
 “Vi tute pravas, sed ili sufiĉas por garantii, ke al vi okazos, kio okazos al Egmont. Kiam Egmont estos liberigita, vi ankaŭ estos liberigita. Se Egmont estos senkapigita, ankaŭ vi.”  
 “Se vi mortigos min sen juĝista kondamno, tio estos murdo.”  
 Maarlo kapjesis.  
 “Estas tiel, kiel vi diras. Se Egmont estos murdita, vi ankaŭ estos murdita.”  
 “Ne parolu tiamaniere,” diris Alva, indigna. “Ni ne murdos Egmont. Mi esplordemandis lin, kaj mi...”  
 Sed Maarlo interrompis lin:  
 “Mi volas vian skapularion.”  
 “Mian skapularion?”  
 “Jes,” diris Maarlo. “Sub viaj vestaĵoj vi portas skapularion, brunan, kun via blazono kaj ĉirkaŭ ĝi ruĝa dornokrono.”  
 Alva rigardis lin, ekzamenante.  
 “Kiu diris tion al vi?”  
 “Ĉu vi portas skapularion?”  
 “Jes. De kiu vi scias tion?”  
 Sed Maarlo ignoris la demandon.  
 “En la palaco oni konas la skapularion. Ne ĉiuj, sed estas kelkaj, kiuj konas ĝin.”  
 “Jes, estas kelkaj.”  
 “Iuj el ili scias, ke vi neniam demetas ĝin.”  
 “Tio estas ebla.”  
 “Albornoz, ekzemple.”  
 “Mi kredas, ke jes.”  
 Maarlo, kontenta, kapjesis.  
 “Tio estas bona,” li diris. “Albornoz estas via sekretario. Li estos vokita por rigardi vian skapularion. Li rekonos ĝin kaj tiel ĉiuj scios, ke ni vere havas vin en niaj manoj.”

Maarlo antaŭeniris, malfermis la vestaĵojn de Alva kaj forprenis la skapularion de lia kolo. Post tio li diris al la soldatoj:  
 “Ligu lin al tiu kolono.”  
 Li helpis la soldatojn.  
 Kiam Alva kaj Fadrique estis ligitaj kun la dorso kontraŭ la kolono, Alva, videble imponita per la trankvila decidemo de Maarlo, demandis:  
 “Kiel vi procedos?”  
 “Tio dependas de vi,” respondis Maarlo.  
 Post mallonga paŭzo, Alva, pripensinte la respondon de Maarlo, denove demandis:  
 “Ĉu vi petos, ke oni konduku Egmont ĉi tien?”  
 Maarlo, kaŝanta la skapularion en linan saketon, ridetis.  
 “Tiel naivaj ni ne estas.”  
 “Kial naivaj?”  
 Amuzita Maarlo rigardis lin kaj demandis:  
 “Resti ĉi tie en la abatejo kaj atendi, ĝis Vargas falos sur nin kun la tuta garnizono? Tion vi certe volus.”  
 “Kion do vi faros?” demandis Alva, incitita.  
 Kiam la skapulario estis enpakita, Alva demandis:  
 “Al kiu vi sendos ĝin? Al Vargas?”  
 “Ĉu vi preferus iun alian?” li demandis.  
 “El ĉiuj viaj kunlaborantoj Vargas staras plej proksime al vi. Sed eble estas tio, kio maltrankviligas vin.”  
 La abato antaŭeniris kaj diris:  
 “Ekzistas la ebleco, ke Vargas forlasos vin kaj skribos al la reĝo en Hispanio, ke vi estis surprizatakita kaj mortigita de la malamiko.”  
 “Tiu ebleco ne maltrankviligas min,” ekkriis Alva.  
 La abato demandis:  
 “Kial vi ne volas, ke oni portu la skapularion al Vargas?”  
 Alva denove ekkoleriĝis.  
 “Kiu diras al vi, ke mi ne volas tion? Mi nur demandis tion. Estas ĉio.”  
 Maarlo donis la saketon kun la skapulario al soldato kaj mallonge parolis al li. Tiam du aliaj soldatoj eniris kaj diris ion al Maarlo. Maarlo aŭskultis ilin, kapjesis, kaj la du soldatoj reeliris kun la alia, al kiu Maarlo donis la skapularion kaj leteron.  
 “Ne estu priridinda kaj tuj revoku tiun soldaton!” ekkriis Alva kolere.  
 La abato intervenis:  
 “Vi povus fari proponon.”  
 “Kian proponon.”  
 “Eble vi povus akordiĝi kun tiuj ĉi viroj.”  
 “Komerco?” ekkriis Alva. “Komerco kun tiaj friponoj? Neniam!”  
 “Oni diras, ke Vargas revas fariĝi ĝenerala guberniestro de la Malaltaj Landoj,”

diris la abato. "Li povus trovi tion eksterordinara bonŝanco, se okazus akcidenteto al vi. Vi povas preventi tion ne lasante tiujn virojn intertrakti kun Vargas, sed intertraktante vi mem kun ili. Nun, antaŭ ol la soldato foriros al la palaco kun la skapulario Sed tiam vi devas rapidi."

"Pri kio vi pensas, kiam vi parolas pri intertraktado?"

"Pri prokrasto de la ekzekuto por komenci. Vi povus promesi prokrasti la ekzekuton. Ekzemple, dum unu semajno. Kaj tiam ekzameni cer-tajn novajn elementojn en la proceso de Egmont."

La okuloj de Alva arde brulante rigardis la abaton. Tiam li denove rigardis Maarlo kaj ree la abaton.

"Kio estas inter vi?" li demandis en ordona tono.

Li ricevis nenian respondon.

"Ĉu tiu konspiro estis preparita? Aŭ ĉu vi profitas de la cirkonstancoj?"

Fadrique, kiu estis defendinta sin ankoraŭ pli fortege ol Alva kontraŭ la soldatoj kaj kriinta la plej brutalajn insultvortojn al ili, turnis sin al sia patro kaj diris:

"Ni povus fari, kion diris la abato."

Sed Alva kriis al li:

"Ni ne intertraktos kun tiu friponaro! Mi ne liberigos Egmont, kaj estas indiferece al mi, kio okazos al vi aŭ al mi poste."

Sed estis klare, ke Fadrique estis maltrankviligita. Ni aŭdis, kiel li mallaŭte diris ion al Alva. Ni ne povis kompreni, kion li diris, sed temis pri Vargas. Tiam Alva turnis la kapon al Maarlo kaj demandis:

"Ĉu vi povas retenigi la soldaton ankoraŭ iom da tempo?"

"Li ankoraŭ ne foriris de tie ĉi," Maarlo diris indiferece.

Fadrique diris al Alva:

"Vi povas devontigi vin al prokrasto de la ekzekuto."

Flustre li daŭrigis sian pledon, kaj tiam li diris laŭte kaj urĝe:

"Permesu la prokraston."

"Mi ne povas konsideri tion."

"Ĉu vi bone konscias, kion vi faras, se vi lasas agi tiun viron? Vargas povus forlasi nin."

"Tiaspeca intrigado ne interesas min."

Tiam Fadrique turnis sin al Maarlo:

"Kie estas la soldato kun la skapulario?"

"Apud la pordego de la abatejo."

"Kiam li ekiros al la palaco?"

"Post nelonge. Antaŭe patrolo devas eniri la arbaron kaj trovi la kadavrojn."

Fadrique paliĝis.

"La kadavrojn? Kiajn kadavrojn?"

"Tiujn de la soldatoj de via gardio."

"Ili estas ĉi tie en la abatejo."

"Sed ne plu tre longe."

"Ĉu vi portos ilin al la arbaro?"

"Oni estas faranta tion."

"Ĉu vi volas ŝajnigi, ke ni estis atakitaj tie?"

"Sendube."

"Atakitaj kaj forportitaj aliloken."

"Vi divenis ĝuste."

"Intertraktu kun ili, patro," petegis Fadrique kun insisto "Intertraktu kun ili! Liberigu Egmont! Per kio Egmont gravas por ni? Vi kondamnis jam milojn da ili. Unu pli aŭ malpli, kian diferencon tio faros? Li povus esti eskapinta! Se li estus nur iom pli ruza, li estus eskapinta al ni. Same kiel Oranje. Kial ni ne povas agi, kvazaŭ li estus eskapinta? Neniu maltrankviligos pri tio. Lasu min fari tion! Mi malfermos la malliberejon kaj liberigos la ulon! Poste ni povus ĵeti la kulpon sur min, se la afero konatiĝus."

Li turnis sin al Maarlo kaj diris:

"Retenu la soldaton. Ne lasu lin foriri. Ni volas interparoli kun vi."

Maarlo turnis sin al Alva:

"Se vi volus konsideri la eblecon fari, kion proponas Fadrique, vi povus eviti multajn problemojn al vi kaj al ni."

"Vi ne povos eviti tiujn problemojn al vi, senjoro," diris Alva.

Tiam Fadrique diris mallaŭte:

"Se Vargas forlasos nin kaj ne faros, kion volas tiuj viroj, ili povos nur mortigi vin. Oni ne povas kapti Alva kaj poste liberigi lin..."

Maarlo diris:

"Ni aŭdis, ke senjoro Vargas..."

Sed Alva kolere ekkriis:

"Mi ne volas scii, kion vi aŭdis pri senjoro Vargas! Estas tute indiferece al mi! Vi povas sendi dek soldatojn kun skapularioj al la palaco. Mi ne liberigos Egmont!"

Mi vidis brilon en la okuloj de la abato.

"Kiel malsamaj ili estas, la patro abato kaj Alva," mi pensis, kortuŝita, "sed ankaŭ, kiom da aferoj ili havas komunaj. Kiel grandaj ili estas, ĉiu en sia maniero."

## DEK-TRIA ĈAPITRO

Mansfeld envenis kaj diris maltrankvile:

"Apud la pordego oni metis mortigitajn soldatojn sur ĉaron, kaj nun oni estas veturiganta ilin eksteren."

Dum Maarlo eksplikis al li, al kio tio servas, Fadrique vikle parolis al sia patro.

"Kiel vi ekscios, ke la patrolo trovis la mortigitajn soldatojn en la arbaro?" demandis Mansfeld.

“Selmo, la gurdisto, pasos preter la abatejon. Ni aŭdos lin ludi melodion.”

“Ĉu la soldato iros do al la palaco?”

“Ne, ne la soldato. Li donos la paketon kun la skapulario al Selmo, kiu portos ĝin al la palaco. Li kutimas porti mesaĝojn por ĉiuj. Li estas malsprita kaj neniam scias, kiujn mesaĝojn li portas. Oni donas al li leteron aŭ paketon kaj diras al li, kien li devas porti ĝin. Neniu ĝenas lin. Nun li staras ĉe la rando de la arbaro. Li scias nenion de kio okazas ĉi tie. Li scias nur, ke li devas atendi, ĝis la patrolo, kiu eniros la arbaron, denove elgalopos ĝin, kaj ke tiam li devas veni ludi melodion ĉi tie ekstere. Tuj kiam li estos farinta tion, la soldato donos al li la paketon kaj diros al li, ke li devas trans-doni ĝin al la gvardio de la palaco.”

“Naiva revulo!” diris Alva. “Kio okazos, se la soldatoj ne rajdos al la urbo, sed al la abatejo por ĵeti rigardon?”

“Tion ili certe farus, se ni montris al ili la kadavrojn,” diris Maarlo memfide. “Sed ni lasos ilin mem trovi la kadavrojn.”

“Kaj se ili venos malgraŭ tio?”

“Tiam ili trovos apud la pordego unu el miaj viroj, maskovestita kiel monaĥo. Tiu diros al ili, ke Alva kaj lia sekvantaro ankoraŭ ne alvenis. Se la soldatoj insistos, ni kaŝos vin en la subtera koridoro.”

Mansfeld diris:

“Vi ne povos peti konduki Egmont ĉi tien.”

“Tio estas ankaŭ ne nia plano,” diris Maarlo. “La komisiono estos, ke ni konduku lin al iu loko en la arbarego Zonio.”

“Kion vi faros, se oni kondukos Egmont tien eskortata de militistaro?”

“Se ili iros al la arbarego Zonio kun militistaro, ili trovos tie tiel grandan armeon, ke ili fuĝos senprokraste al Bruselo.”

“Ĉu armeon?” demandis Mansfeld.

“Certe ja.”

Hezite Mansfeld rigardis Alva. Fadrique diris al Maarlo:

“Ne lasu foriri la ĉaron kun la mortigitaj soldatoj. Ni devas povi solvi tion ĉi.”

Alva demandis al Maarlo:

“Ĉu vi estas protestanto?”

“Ne.”

“Parolu kun li,” insistis Fadrique. “Egmont ne valoras tiun grandan mizeron. Demandu lin gardi la ĉaron ĉi tie. “Mallaŭte li aldiris: “Patro, mi certigas vin, ke ili mortigos vin! Eble ne min, sed certe vin. Se Vargas forlasos nin, ili mortigos nin ambaŭ. Viro kiu entreprenas tian aferon, ne povas reiri. La sola afero kiun Vargas devas fari, estas skribi al la reĝo, ke vi eliris la urbon kun tro

malgranda eskorto iunokte kaj ke la ribeluloj atakis kaj murdis vin.”

Alva kaŝobservis Maarlo.

“Ĉu vi faras tion, tial ke vi konsideras Egmont kiel heroon?”

“Ne gravas por mi, ĉu li estas heroo aŭ ne,” respondis Maarlo, “sed jes ĉu li estas libera aŭ ne. Egmont instruis al mi vivi kiel libera viro.”

“Ne kiel libera viro!” diris Alva kolere. “Sed kiel sklavo de malordo, mallumo kaj ribelo, kiuj estas nenio alia ol malhumileco. Dion oni devas honoru, Dion kaj la reĝon, kiu regas en la nomo de Dio. Honoru Dion!”

“Tion mi faras,” diris Maarlo.

“Kaj ĉu vi honoras la reĝon?”

“Antaŭ ol Maarlo povis respondi, la abato diris:

“La reĝo estas nia senjoro, sed la Konsilantaro de la Tumulto estas kontraŭjura institucio kaj horora turmentilo. Se vi uzas ĝin, ĉar vi kredas, ke vi devas fari ion por la reĝo, vi nocas la reĝon. Sed se vi uzas ĝin, ĉar vi opinias ĝin bona, vi estas malbona viro.”

“Estas malordo en tiu ĉi lando. Ĝi estas plena je herezuloj, rabistoj kaj ribeluloj! Ili detruas la preĝejojn de Dio, kiel oni neniam faris tion antaŭe. Al tiu ĉi malordo oni devas meti finon.”

“Mi tute ne aprobas la bildodetruadon,” diris la abato. “Neniu el ni aprobas ĝin. Kaj la ordo jam estis bone restaŭrita antaŭ via alveno.”

“Kiel vi povas diri ion tian?”

Alva bruske turnis la kapon al Mansfeld.

“Ĉu Margareta de Parma restaŭris la ordon en tiu ĉi lando antaŭ mia alveno?”

“Estas malfacile por mi diri ion pri tio, Via Duka Moŝto,” respondis Mansfeld.

“Sed vi estas implicita en la aferon. Ĉu Margareta de Parma, kun via helpo, restaŭris la ordon en tiu ĉi lando antaŭ mia alveno?”

“Ne plene,” respondis Mansfeld, “sed...”

“Ĉu ŝi punis la bildodetruantojn?”

“Parton da ili.”

“Kion ŝi faris per la ribelantaj urboj?”

“Dornikon ni rekonkeris,” diris Mansfeld. “Valencianon...”

Sed Alva interrompis lin.

“Tio okazis plurajn monatojn, post kiam mi ricevis mian komisionon.”

“Jes, fakte jes.”

“Vi sciis, ke mi ricevis tiun komision! Vi sciis, ke mi venos!”

“Jes, sed se ni ne estus sciintaj tion, ni estus procedintaj ankoraŭ pli forte kontraŭ la tumultantoj. La guberniestrino estis

timigita. Ŝi estis tre konfuzita. Sed tio ne daŭris longe.”

“Kion ŝi faris per Oranje? Per Egmont? Per Hoorn? Per Brederode? Per tiuj kiuj konspiris kaj intrigis kontraŭ la reĝo aŭ maliligente neglektis korekti la intrigantojn?”

“Estis malfacile,” diris Mansfeld.

“Nenion ŝi faris kontraŭ ili!” konkludis Alva. “Ŝi lasis ilin trankvilaj, ĉar ŝi timis ilin.”

Mansfeld singarde protestis:

“Estas tamen ĉie sciata, ke la guberniestrino arestis la fremdajn predikistojn.”

“Ne!” replikis Alva. “La fuĝo de la protestantaj predikistoj komenciĝis, kiam ili aŭdis, ke mi enŝipiĝis kun mia armeo en Kartageno. Per tutaj bandoj ili forkuregis el la lando, kiam mi enŝipiĝis en Ĝenovo, kaj ili formis tutan procesion, kiam mi, transirinte la Alpoj, tramigris Burgundion en la direkto de Bruselo. Tiu puseca armeo forfuĝis nur tiam, ne pli frue.”

Mansfeld klinis la kapon kaj diris.

“Mi ja koncedas, ke...”

“Vi devas ja! Vi devas koncedi, ke sub la regado de Margareta la predikistoj ĉie daŭrigadis sian laboron, eĉ en la urboj; ke la herezuloj kunvenis sur lokoj, kie ĉiuj povis vidi ilin; ke la biblioj kaj broŝuretoj ne provizitaj per la *imprimatur*<sup>10</sup>, estis libere disvastigataj kaj publike voĉlegataj; kaj ke Alva prompte faris finon al tio ĉi. Ĉu estas vere aŭ ne?”

Tiam li turnis sin al Viglius, kiu staris oblikve malantaŭ Mansfeld.

“Vi, kiu estas juristo, parolu. Ĉu estas vere, kion mi diris, aŭ ne?”

Hezite Viglius faris kelkajn paŝojn antaŭen kaj diris:

“Mi preferus, ke miaj servoj ne estu necesaj en tiu ĉi afero, sed se vi insistas, mi opinias, memkompreneble sen engaĝi mian propran personon – kaj mi devas diri, ke tiurilate ne ĉiam estas disponeblaj klaraj kaj kompletaj dokumentoj –, ke mi devas konfesi, ke la kontraŭrimedoj aranĝitaj de Margareta de Parma estis iel nesufiĉaj, kaj ke ili ne donis en praktiko la rezultojn, kiujn oni povis atendi en teorio, pri kio evidente ne vere kulpas la guberniestrino.”

“Ĉu vi volas aserti, ke vi ne estas tro severa?” demandis Maarlo al Alva. “La tuta mondo parolas pri vi kun abomeno. Via severeco havas nenian rilaton kun la okazintaĵoj en la Nederlandoj.”

“Kun kio do?”

“Kun via malhumileco. Vi sentis vin ofendita, ĉar oni aŭdacis kritiki la regadon de la lando kaj prezenti petskribojn.”

“En Hispanio, Germanio, Romo kaj ĉi tie mi legis kaj pritraktis centojn da petskribojn sen iam ajn ĉifi unu haron sur la kapo de tiuj kiuj skribis aŭ alportis ilin. Vi vidis min pritrakti petskribojn, Mansfeld. Diru al mi, kiel mi pritraktis ilin.”

“Estas, kiel vi diris,” respondis Mansfeld.

“Vi ne multe amas la nederlandajn nobelojn,” diris Viglius. “Vi iam diris, ke ili estas drinkaĉemuloj. Vi...”

“Ili drinkaĉas! Kiomfoje Oranje ne kuŝis ebriega sub tablo en la kavalira salono?”

“Vi plendas, ke ili ne havas la plej bonajn manierojn, kiam ili manĝas.”

“Ĉu ili havas tiujn? Serĉfosi per la manoj en la pladoj, ĝis kiam la graso gutas de ilia buŝo, kaj glutegi kvazaŭ ili ne estus vidintaj nutraĵon dum du semajnoj, ĉu ĉi tio estas bonaj manieroj? Ne ĉiuj estas tiaj, sed multaj. Sed tio ne estas ĉio, kion mi diris pri la nederlandaj nobeloj. Mi iam parolis pri ili kun Aerschof. Vi ĉeestis la konversacion, Mansfeld. Kion mi diris tiam?”

“Vi laŭdis ilian luksamon, ĉe multaj la artosenton kaj erudicion, kaj tiam vi diris, ke estas iuj el la nederlanda nobelaro, kiujn tiutempe vi...”

“... rigardis kiel miajn plej bonajn amikojn. Ĉu estas tio?”

La abato demandis:

“Kial vi tiel koleriĝis, kiam vi aŭdis en Hispanio pri la ribelo en nia lando? Vi estis tiel kolera, ke oni devis forkonduki vin.”

“Mi estis batonta iun el la korteganoj kiu, ĉe la novaĵo de la bildodetrudo, suprentiris la ŝultrojn. Ĉu vi aludas pri tio? Jes, tio vere okazis. Kaj mi denove faros tion, kiam iu suprentiros la ŝultrojn, aŭdante tian novaĵon.”

“Vi ĝojis en la tago, kiam vi foriris al la Nederlandoj,” diris Mansfeld. “Okulatestin-toj diras tion! Tio ne estis bona ĝojo. Kolero malofte estas justa, malica ĝojo neniam.”

“La preskaŭa batado de tiu kortegano havis nenian rilaton kun la ribelo, sed kun la bildodetrudo! Estas sakrilegio! Ke mi estis feliĉa, kiam la reĝo donis al mi kaj ne al iu alia la taskon puni la nederlandanojn, tio pledas nur por mia fideleco, mia devosento kaj mia pieco.”

“En la ĉirkaŭaĵo de la reĝo ne regis unanimeco pri tiu komisiono.”

“Vi volas diri, ke la reĝo donis al mi tiun taskon kontraŭ la konsilo de kelkaj el siaj konsilistoj?”

“Ne kontraŭ la konsilo de kelkaj konsilistoj, sed de multaj konsilistoj.”

<sup>10</sup> Eklezia permeso printi libron pri religio, per kiu ĝi aprobis la enhavon.

“Ne, ne de multaj, nur de kelkaj.”

Sed Mansfeld kontraŭstaris lin.

“La plimulto, mi kredas, demandis, ke oni alstrebu mildecon, kiel tion demandis jam plurajn jarojn antaŭe Margareta. La guberniestrino sciis, ke tro granda severeco faros pli da malbono ol da bono. Ĉu via kolero kaj via laŭdinda fervoro ne igis vin forgesi, ke viaj punoj estas ja ege duraj?”

“Kion naskis la mildeco de Margareta? Murdojn, incendiojn kaj sakrilegiojn.”

“Jes,” diris Viglius, “sed ni pensas, ke la reĝo sciis tion, ke li sciis tion jam la tutan tempon, sed li tamen hezitis. Multajn personojn vi provis konvinki, ke li devas aliri la problemon per feraj manoj, sed li ne volis fari tion. Kaj tiam, subite li ŝanĝis sian sintenon.”

Viglius rigardis Mansfeld.

“Mi pensas, ke vi volas diri tion.”

“Precize,” kapjesis Mansfeld.

Viglius plu rezonis.

“La demando povus do esti, ĉu vi esploris, kio subite kaŭzis tiun ŝanĝon ĉe la reĝo. Post pluraj jaroj de cedemo kaj hezitado subite tiu dura obstineco. Alidire: ankaŭ al la reĝoj venĝo estas malpermesita, kaj estas la tasko de la ministroj bremsi tiun inklinon kaj ne stimuli ĝin.”

Alva atente rigardis Viglius.

“Ĉu vi volas diri, ke mia influo instigis la reĝon serĉi venĝon?”

Singarde Viglius diris:

“Ne *mi* volas diri tion. Mi helpas nur vortigilan vidpunkton.”

Alva denove turnis sin al Mansfeld.

“Ĉu vi pensas, ke la reĝo volis *venĝi* sin al la Nederlando?”

“Fojfoje mi timas, ke jes,” respondis Mansfeld.

“Venĝo ĉiam estas stulta, malmorala kaj neutila,” diris Alva. “La reĝo estas prudenta, pia kaj ruza.”

“Ni demandas nin,” diris Viglius, “ĉu la ieĝo kaj vi ne trovas la nederlandan popolon aroganta, kaj ĉu vi ne uzas la okazon de la bilodetruado por fari el la Nederlando hispanan distrikton, ian konkeritan landon, kie oni povas ordoni laŭ kordeziro kaj rabi...”

“Ne diru tiajn sensencaĵojn!” laŭte ekkriis Alva. “Ĉu ne estas fakto, ke ĉiam pli da homoj komprenas, ke viaj tiel nomataj privilegioj ne plu havas sencon? Ili havis sencon antaŭ tricent jaroj, sed ekde tiam la urboj, dukejoj kaj grafejoj kunkreskis al unu landon. Kiu kontraŭstaras tiun kreskon en la nomo de lokaj interesoj aŭ privilegioj estas malmoderna. La tempo, kiam nobelo regas provincon, kiel oni administras personan

propraĵon, estas pasinta, eĉ se la viro provas esti patro por siaj regatoj. Vi faras tion, senjoro de Mansfeld, laŭ tio, kion mi aŭdas. Tio estas bela, sed jam ne de nia tempo.”

“Permesu al mi diri al vi, ke mi ne konsentas pri tio,” trankvile diris Mansfeld. “Cetere ŝajnas al mi, ke via vidpunkto estas plie, ke tiu kiu plenumas majestatencon, perdas ĉiujn siajn rajtojn kaj, kiel vi diris al mi ĉe via alveno en Bruselo, ke ĉevaloj kiuj inklinas ekforkuregi, prefere havas mallongajn bridojn, kio estas ĝusta el la vidpunkto de ĉevalrajdisto.”

“Ĉu tio ne estas ĝusta el ĉiu vidpunkto, se oni scias, ke la reĝo estas la direktanto?” diris Alva. “Reĝo akceptita de la popolo kaj konfirmata en sia povo de la Ŝtata Konsilantaro?”

“Sed ni ne estas ĉevaloj. La Konsilantaro de la Tumulto tre malmulte prenis en konsideron niaj proprajn juĝajn tradiciojn.”

“La milita leĝo estas agnoskita ĉie kaj de ĉiu, kaj en kazo de ŝtatperfido la mortpuno estas ĉie aplikata, ankaŭ ĉe vi.”

Maarlo demandis:

“Sed ĉu la homoj devas akcepti ŝtatan aŭtoritaton sub ĉiuj kondiĉoj kaj plu akcepti ĝin, kion ajn faras tiu aŭtoritato?”

“Aŭtoritato estas parto de la natura leĝo, kaj la natura leĝo estas kreita de Dio mem. Dio volas, ke ekzistu aŭtoritato. Kio kontraŭstaras la reĝan aŭtoritaton, kontraŭstaras Dion.”

La abato diris:

“La tuta mondo estas plena je aŭtoritatoj, kiuj kaŝas sin malantaŭ Dio kaj misuzas sian aŭtoritaton en la plej abomeninda maniero. Vi misuzas la religion, emfazante la neceson de aŭtoritato, tute neglektante kompaton kaj pardonemon. Dio certe volas, ke estu aŭtoritato, sed Li ne volas, ke tiu aŭtoritato estu ekzercata de maljustuloj aŭ ekzekutistoj. La fakto, ke vi misuzas la religion por pravigi vian senkompatan politikon, estas la kaŭzo de la hodiaŭa situacio. Sed vi ja scias, kial vi implicas la religion. Ĉar vi bezonas ĝin por via politiko! Vi kaj la reĝo! Sen la katolika religio kiel gluo la regno disfalus en pecojn. Lasu do la religion ekster la afero!”

Kolera, Alva turnis sin al la abato.

“La religio estas io sankta! Dio revelaciis ĝin al ni! Ne mi mapurigas la religion! Ne mia reĝo! Aliaj faris tion. Vi ja scias kiuj. Sed mi ne povas kompreni, kial la religio ne rajtus kontribui al la unueco de la regno.”

“Vi misuzas la religion por viaj politikaj celoj!”

“La homoj kiujn mi kondamnis, estas tiuj kiuj perfidas nian religion! Ili estas perfiduloj!”, laŭte kriis Alva.

“Herezuloj, mi pensis,” diris la abato.

“Ŝtataj perfiduloj!” Ekkriis Alva.

“Kio faris el ili herezuloj?”

“Malobservo de la ordonoj proklamitaj de la reĝo, kiuj per tiu fakto estas laŭleĝaj kaj, krom tio, sanktaj per la graco de Dio, kiu laboras tra la kredantaj princoj.”

“Ne,” diris la abato.

“Kial ne?”

“Tial ke la graco de Dio neniam devigas iun senkapigi sian proksimulon.”

Nervoza, Alva skuis la kapon kaj diris:

“Tio estas jura diskuto!”

“Diru al mi”, daŭrigis la abato, “en kiu el la kvar evangelioj, al kiuj vi konstante apelacias, estas skribite, ke viro, ĉu reĝo, ĉu imperiestro, havas la rajton mortigi aliajn homojn por devigi siajn regatojn kredi je la evangelioj? Kie? Citu al mi la tekstoparton kaj mi sekvos vin.”

“Tiel ja parolas la protestantoj! Ili ĉiam citas tekstojn! Sed la tekstoj staras sub la magisterio de la Sankta Eklezio.”

“Ĉu vi neniam aŭdis la vorton ‘toleremo’?” demandis Mansfeld. “La grafo de Egmont estis tolerema. Sed vi ne scias, kio tio estas. Vi estas hispano. Via lando kuŝas apartigita de la mondo, ĉirkaŭita per maroj kaj montoj. La nederlandoj estas apertaj en ĉiuj flankoj. De ĉie tien ĉi veturas ŝipoj kun flagoj de la plej malproksimaj landoj. Ĉie oni vidas vendoplacoj, kie oni povas renkonti anglojn, germanojn, francojn, italojn kaj eĉ maŭrojn. Al ni ŝajnas, ke decas al gastiganto respekti la vizitantojn en iliaj pensoj kaj sentimentoj.”

“Ĉu ĉiuj gastigantoj?” demandis Alva. “Kontraŭ ĉiaspecaj vizitantoj? Kapjesi kiam oni pensas ne, klini sin antaŭ viraĉoj, kiujn oni alparolas kiel ‘estimataj sinjoroj’, kaj kiuj vi inter vi nomas idiotoj, kiam ili estas foririntaj? Tio certe estas tre utila. Por butikistoj kiuj deziras ekhavi ilian monon. Sed en la lando de kie mi venis, kaj ankaŭ en via lando, la guberniestroj devas esti honorplenaj viroj, ne ŝakristoj.”

Viglius levis la fingrojn kaj singarde rimarkis:

“Ankaŭ en Hispanio estas butikoj, mi pensas, sed malpli. Eble tio estas la kaŭzo, kial la reĝo skribas tiel ofte leterojn, kiam li deziras ekhavi monon.”

Alva koleriĝis.

“Vi ŝajnas ŝati malspritaĵajn ŝercojn, sinjoro.”

Viglius faris sindefendan geston kaj diris:

“Tio tute ne gravas. Mi volas nur diri, ke la grafo de Egmont ĉiam estis sufiĉe milda kontraŭ la eksterlandanoj, kiuj havas alian kredon ol ni. Sed se ni povas ĝenerale supozi – kaj ni efektive rajtas fari tion –, ke respekto de ĉies opinio estas bela, ke toleremo ne estas malvirto, sed virto, rekomendita de nia Savinto, kaj ke...”

Kolera, Alva interrompis lin.

“Ĉu iu povas ĵuri fidelecon al la reĝo, ĵuri ke li akurate respektigos la leĝon, kaj samtempe esti tolerema kontraŭ friponoj, kiuj distretas la leĝojn?”

“Mi prenas la liberecon demandi, ĉu tio estas tiel simpla, kiel vi diras.”

“Nenio estas tiel simpla ol fideleco.”

“Sed la vivo...” kontraŭargumentis Viglius.

“Ne la vivo estas malklara,” denove interrompis Alva, “sed perfido. La honoro estas klara kiel kristalo.”

Maarlo diris:

“Vi ne havas la rajton kondamni la grafon de Egmont. Vi eĉ ne rajtis aperigi lin antaŭ la Konsilantaro de la Tumulto.”

“Ĉar li estas kavaliro de la Ordeno de la Ora Lanfelo?” demandis Alva. “Ĉu vi volas diri tion?”

“Jes, certe. Ekzistas leĝo, kiu diras, ke kavaliroj de la Ora Lanfelo povas esti aperigataj nur antaŭ la tribunalo de la ordeno mem<sup>11</sup>. Nu, via Konsilantaro de la Tumulto certe ne estas la tribunalo de tiu ordeno.”

“Mi posedas subskribitan dokumenton, per kiu la reĝo donis al mi la plenpovon aperigi antaŭ mia tribunalo, en kazo de perfido, tiel la kavalirojn de la Ora Lanfelo, kiel ĉiujn aliajn. Tio sola jam donas validecon al la akcio, kiun mi entreprenis kontraŭ Egmont. Sed mi studis la statuton de la ordeno de la Ora Lanfelo. Kaj tiel mi malkovris, ke la tribunalo de la ordeno povas nur pritrakti honorajn aferojn. Tion oni povas legi en la ĉarto. Kiam li estis ankoraŭ tre juna, imperiestro Karlo iam etendis la juĝorajton de la ordeno al ĉiuj aliaj aferoj, sed poste, kiam li fariĝis pli saĝa, li petis, ke tiu artikolo estu denove forigita, kio okazis. Ĉu tio estas vera aŭ ne, senjoro Mansfeld.”

“Jes, tio estas vera,” diris Mansfeld. “Mi diskutis pri tiu afero kun la mastro de la ordeno. Sed ĉu ne estas eksterdubo, ke Egmont agis bonfide?”

“Kial vi defendas lin kun tiom da forto?” demandis Alva akratone. “Vi ne amas lin.”

---

<sup>11</sup> La ordeno havis 31 membrojn, kiuj povis esti juĝataj nur fare de la speciala tribunalo de la ordeno.

“Li estas bona kaj noblanima viro.”  
 “Kia li estas ankoraŭ?” demandis Alva.  
 Mansfeld hezitis.  
 “Kia li estas ankoraŭ?” insistis Alva.  
 “Iom nesingarda,” diris Mansfeld.  
 “Ĉu ne malserioza?”  
 “Eble, jes...”  
 “Impeta?”  
 “Jes.”  
 “Neprudenta, nefidinda, nerespondeca?”  
 “En iu senco.”  
 “En ia ajn senco.”  
 Sed Mansfeld ne rezignis.  
 “Koncerne kelkajn gravajn aferojn mia opinio diferencas de la lia, sed mi ne povas akuzi lin pri malbona fido.”  
 “Kion faris Egmont, kiam la reĝo foriris al Hispanio?”  
 “Kion vi volas diri?”  
 “Pri la hispanaj trupoj, kiu restis ĉi tie.”  
 Viglius volis paroli, sed Alva demandis:  
 “Ĉu Egmont sekrete provis atingi, ke la hispanaj trupoj estu retirataj el la lando, jes aŭ ne?”  
 Rapide Viglius intermetis.  
 “Marĝena rimarko ĉe tiu demando povus esti, ke la reĝo promesis retiri mem la trupojn el la lando.”  
 “Tio ne estas la demando,” diris Alva.  
 “Temas ĉi tie nur pri Egmont. Ĉu decidis al Egmont, ĵurinta funkciulo de la reĝo, intrigi kontraŭ la trupoj de la reĝo?”  
 “Eble ne...” diris Mansfeld, batita.  
 “Iumomente oni antaŭvidis problemojn kun la herezuloj,” Alva plu diris. “Ĉu vi memoras tion?”  
 “Jes,” respondis Mansfeld.  
 “La reĝo demandis agadon por preventi tiujn ribelojn.”  
 “Jes.”  
 “Kion tiam faris Egmont?”  
 “Ne multe, mi timas.”  
 “Kaj la malmulto kion li faris, estis malbona. Li intrigis kun la nobeloj por malhelpi, ke la agado petita de la reĝo estu plenumita.”  
 “Tion mi koncedas,” diris Mansfeld, “sed ne ke li estus farinta tion kun la celo...”  
 “Tio estas sengraveca!” diris Alva. “Ĉu li intrigis por preventi tiun agadon aŭ ne?”  
 “Jes, li faris tion.”  
 “Dum li havis la devon subteni ĝin?”  
 “Oni rajtas diri tion, jes.”  
 “Kune kun Oranje kaj la grafo de Hoorn Egmont iumomente forlasis sian postenon en la Ŝtata Konsilantaro por protesti, ĉu ne?”  
 “Mi timas, ke li...”  
 “Ĉu li obeis,”  
 “Ne.”

“Li krude diris: ne! Kaj ke li neniam plu metos piedon en la Ŝtatan Konsilantaron, tiel longe ke kardinalo Granvelle ne estos eksigita de sia honorofico. Ĉu tio estis korekta?”

“Lin ofendis,” diris Mansfeld, “ke Granvelle, kiu estas fremdulo, ricevis pli altan honoroficon ol li.”

“Kaj kiam la ribeluloj portis tiun faman peticion en groteska procesio al la guberniestrino<sup>12</sup> kaj poste triumfe bankedadis en la palaco de Kulemborg, ĉu Egmont ne festenis kun ili? Ĉu li ne kuntriumfis, pro tio ke ili puŝis la guberniestrion en angulon? Guberniestro de la reĝo ĉe la tablo de la geŭzoj, post kiam tiuj geŭzoj publike primokis la reĝon! Mi diskutis pri tio kun Egmont dum la juĝa kunsido. Neniam en mia vivo mi forgesos la infanece primokindan respondon kiun Egmont donis al mi. Ĉu vi scias, kion li respondis? Li diris: ‘Ne, mi ne vere partoprenis en la bankedo. Mi hazarde preterpasis, kaj Brederode absolute volis trinku glason kun mi. Mi akceptis, sed mi trinkis nur unu glason, unu malgrandan.’ Tion li diris.”

Kolere Alva tiam demandis:

“Ĉu iu iam aŭdis ion tian? Kion pensas tiu viro? Ke la honoro de viro estas mezurata laŭ la nombro de la glasetoj? Ke oni fariĝas perfidulo trinkante du glasetojn kun perfiduloj, sed ke oni restas honorata viro, se oni trinkas nur unu glason? Jam de multaj jaroj Egmont meritas estas punita, sed la reĝo ĉiam malgravigis lian konduton, esperante, ke temas nur pri kapricoj, kaj ke ĉio poste denove aranĝiĝos. Sed ĉu Egmont penadis por tio? Kiam la reĝo cedis kaj revokis Granvelle, ĉu Egmont klopodis malhelpi la disvastiĝon de la herezo? Ĉu li plenumis la tiurilatan leĝojn de la reĝo?”

“Ne, ne tute,” respondis Mansfeld.

“Duone?”

“Estas malfacile ĝuste mezuri tion.”

“Ĉu en sia provinco li permesis al la protestantaj predikistoj neĝenate elparoli siajn predikojn?” demandis Alva.

“Ŝajnas al mi, ke...”

“Jes aŭ ne?”

“Jes.”

“Ĉu li permesis la konstruon de protestantaj preĝejoj?”

“Iam estis tempo, kiam li estis iom malakurata en tiuj aferoj.”

“Ĉu per tio li ne impertinente malobservis la leĝojn?”

<sup>12</sup> Aludo al la peticio kiun donis al Margareta de Parma en 1566 la Ĵurinta Ligo de la Nederlandaj Nobeloj.

“La vorto ‘impertinente’ indikus malbonan volon,” rimarkis Mansfeld.

“Impertinente aŭ ne impertinente: ĉu li malobservis la leĝojn?”

“Jes,” diris Mansfeld.

“Kion li faris, kiam en Armentières minacis ribelo? Ĉu li faris ion por preventi la ribelon?”

“Ja ion, sed eble ne sufiĉe.”

“Kaj kiam eksplodis la ribelo, ĉu li persekutis la insurgentojn?”

“Ne.”

“Punis la iniciatintojn?”

“Ne.”

“Ĉu li provis trovi ilin?”

“Kun malmulte da konvinkiteco, tion mi devas koncedi. Sed...”

“Kiel vi nomas tian misfaron, sinjoro de Mansfeld? Kiel vi nomas en via lando la sintenon de guberniestro, kiu, la manon sur la evangelioj, ĵuras, ke li plenumos la leĝojn de la reĝo, kiu ankaŭ promesas fari tion je sia honoro de nobelo, kaj kiu poste rompas sian promeson, distretas sian honoron kaj plenumas falsan ĵuron antaŭ Dio?”

Nervoze Mansfeld balbutis:

“Mi... mi volus diri...”

“La vorton, senjoro!” ekkriis Alva.

“Por ĉiuj aliaj mi dirus...”

“Ŝtatperfido!” diris Alva.

Mansfeld ne respondis. Turnante sin al Viglius, Alva demandis:

“Sinjoro Viglius, ĉu oni povas supozi, ke la grafo de Egmont konis la leĝojn?”

“Tion, mi kredas, ni povas supozi.”

“Ĉu li sciis, kio estas permesita kaj kio ne estas?”

“Sendube.”

“Ĉu li konis la punojn provizitajn en kazo de malobservo al la leĝoj?”

“Mi kredas, ke jes.”

“Vi nur kredas tion? Mallonge antaŭ mia alveno en la Nederlando, Egmont arestigis protestantajn predikistojn kaj ribelulojn. Tro malmultajn kaj tro malfrue, sed ĉu en Flandrio, kie li estis guberniestro, li arestigis protestantajn predikistojn kaj ribelulojn?”

Viglius rapide rigardis Mansfeld.

“Eh... jes, li arestigis predikistojn.”

“Pro tio ke ili plenumis majestofendon?”

“Jes.”

“Kion li faris per ili?”

Nek Viglius nek Mansfeld respondis ion.

“Ĉu li reliberigis ilin?” demandis Alva. “Ĉu li bonkore diris, ke ili ne povas esti suspektataj de malfideleco? Ĉu li pardonis ilin, kiam iliaj amikoj venis peti tion? Ne, karaj senjoroj, li pendigis ilin. La kaŭzo, kial li faris tion, estas probable, ke li deziris ankoraŭ rapide lavi sin blanka, antaŭ ol

estos tro malfrue. Sed nun ne temas pri tio. Kio gravas por mi, estas, ke li sciis, ke li devas puni la ribelulojn, kaj ke li faris tion. Tiam mi demandas al vi: se li povis kondamni al morto tiujn predikistojn kaj ribelulojn, kiuj eble estis nur kuntrenitaj de aliaj, kial do mi ne povus apliki la saman punon al li, kiu ne estis kuntrenita de pli grandaj ol li, ĉar li estis la plej granda?”

Mansfeld diris:

“Ĉu mi povas demandi ion al vi? De viro al viro?”

“Kion?”

“Tion, kion vi scias pri Egmont, vi scias jam de la pasinta jaro. Sed tamen vi ne kondamnis lin tiam. Vi hezitis, atendis. Kial? Mi petas, diru al mi kial!”

“Ĉar mi volas, ke ĉiu proceso, kiun mi kondukas, estu justa proceso. Mi ankoraŭ neniam prononcis juĝon pri iu kiu antaŭe ne ricevis la okazon pledi sin libera.”

“Ĉu tio estas la kaŭzo?” demandis Mansfeld.

“Certe ja.”

“Tamen la juĝo plej ofte rapide sekvas la akuzon. Unu horon, duonhoron poste, malofte pli longe. Sed Egmont sidis jam naŭ monatojn en malliberejo. Centojn kaj centojn da ribeluloj vin intertempe jam kondamnis kaj ekzekutigis. Kial ne Egmont?”

“Ĉar lia proceso estis granda kaj grava proceso. La dosieron havas la amplekson de tri libroj. Ĉiuj devis povi studi ĝin. Ili venis de fore. Tio postulas multan tempon.”

“Mi opinias...” diris Mansfeld.

Alva akre rigardis lin.

“Kion vi opinias?”

“Mi opinias, ke vi ne estus kondamninta Egmont, puninta jes, sed ne kondamninta al morto, se la nassaŭanoj en Germanio ne estus starigintaj armeon kaj aperte komencinta militon kontraŭ vi.”

“Ŝtata perdo ĉiam estas punata per morto,” diris Alva. “Ankaŭ ĉi tie. De vi. Tion vi ĵus koncedis. La invado fare de la nassaŭanoj havas nenian rilaton kun tio ĉi. Tio ĉi estas ribelo, al kiu ni metos finon en konvenaj tempo kaj maniero.”

Tiam ni aŭdis el la malproksimeco muzikon de gurdo. Fadrique rigardis Maarlo kaj demandis:

“Ĉu tio estas la signalo?”

“Jes,” diris Maarlo. “La patrolo trovis la kadavrojn en la arbaro. Nun ili estas rajdantaj al la urbo por anonci tion en la palaco.”

“Ne igu porti la skapularion al la palaco!” Fadrique ekkriis kolere. “Reenvoku tiun soldaton!”

Malbonhumore li diris al sia patro:



“Mi ne komprenas, kial vi estas tiel obstina. Kaj neprudenta. Per kio povas interesi nin tiu palaco de Gaasbeek?”

Alva ignoris la plendon de sia filo kaj denove turnis sin al Maarlo.

“Kial vi diras, ke Egmont instruis al vi vivi kiel libera viro?”

Maarlo respondis:

“La grafo de Egmont estas nobelo de la malnova tradicio, kiu estas ankoraŭ same tiel viva, kiel antaŭe: fideleco al la reĝo, sed samtempe alligiteco al niaj rajtoj kaj liberecoj, kiujn la reĝo devas respekti. La reĝo estas nia mastro, jes, sed ne senlime. Tial la grafo ankaŭ kredas, ke la homoj devas toleri unuj la aliajn malgraŭ la diferencoj. Oni ne mortigas iun ĉar li pensas alie ol ni. Egmont restos via amiko, eĉ se via opinio estas alia, ol la lia. Tio estas libereco. Sed tion, hispanoj, ne povas kompreni. Nia popolo ne nur multe amas sian liberecon, sed ĝi ankaŭ estas tre obstina. Ĝi preferas morti en batalo ol vivi en mallibereco.

“Vi pravas, ĉar vi, ribeluloj, scias, ke, se vi mortigos min aŭ ne, vi nepre devos venkian armeon aŭ esti pendigitaj. Ne estas alia ebleco por vi.”

Ni aŭdis, kiel la muziko de la gurdo pli kaj pli alproksimiĝis. Fadrique diris:

“Revoku la soldaton kun la skapulario! Ni donos al vi monon... Titolon kaj kastelon kun tero.”

Tiam li denove turnis sin al Alva.

“Se ni donos al ili Egmont, ili devos foriri kun li el la lando, transiri la landlimon. Do ni tiel perdos lin! For or mortigita, kie estas la diferenco?”

Alva rigardis momenton Maarlo. Tiam li diris per stranga voĉo.

“Vi estas kuraĝa.”

Tiam li aŭdis, kiel la muziko de la gurdo denove foriĝis de la abatejo. La gurdisto jam estis survoje al la palaco kun la paketo.

La abato tretis ĝis antaŭ la duko de Alva kaj diris:

“Post nelonge viaj viroj en la palaco ricevos la skapularion.”

Alva estis aŭskultanta la malfortiĝantan muzikon.

“Vi estas nekoruptebla kaj vi ne timas morton,” la abato plu diris. “Tio estas honorplena. Sed ĉu vi ankaŭ ne timas morti sola? Se vi liberigos Egmont, ne pro timo aŭ kalkulo, sed pro boneco, tiam vi ne plu estos sola. Memoru, ke oni atingos pli multe per faro de boneco ol per puno.”

Alva rigardis Maarlo, tiam la abaton.

“Mi ne timas morti sola,” li diris per rompita voĉo. “Lasu min trankvila.”

“Tiam Dio benu vin,” mallaŭte diris la abato kaj foriris.

## DEK-KVARA ĈAPITRO

Dum mi estis transiranta la internan korton en ĉiuj direktoj kaj pasanta inter la konstruaĵoj de la abatejo por vidi, kia estas la situacio, mi pripensis, en kiu stranga maniero la abato, la duko de Alva kaj la senjoro de Maarlo ĉiuj senlime kredas je tio, kion ili faras, kaj kiel simila estas ilia fervoro, kvankam la faroj kiujn ili plenumas, multe diferencas inter si.

Neniu en la abatejo dormis. Ni rigardis la soldatojn sur la interna korto. Kelkaj staris sur la parapeto antaŭ la murdentoj. Aliaj gardis la pordegon. La ceteraj sidis ĉirkaŭ fajro apud la staloj.

Ni atendis. Neniu sciis, kiel longe tio daŭros. Sufiĉe longe, iuj pensis, ĉar la ordo-no estis konduki Egmont al la arbarego Zonio. Sed aliaj diris, ke Vargas elsendos trupojn kaj kiel furiozulo traserĉos la ĉirkaŭaĵon por trovi Alva kaj liberigi lin. Ili diris, ke certe tiam ankaŭ la abatejo estos traserĉata, kaj ili atendis tion kun timo. Aliaj preparolis la eblecon, ke Vargas faros tute nenion, nek liberigi Egmont, nek sendi trupojn por liberigi Alva, kaj timeme deman-is sin, kion Maarlo finfine faros.

Estis kviete en la abatejo, dum pasis la nokto. Kelkajn fojojn mi grimpis sur la parapeton, sed la nokto estis tiel malluma, ke oni ne povis vidi ion ajn.

Kiam la abato vokigis min kaj demandis, ke mi alportu vinon, mi vidis, ke Alva kaj Fadrique estis ankoraŭ ĉiam alligitaj al la kolono. Kvar soldatoj gardis ilin. Mi vidis, ke Alva estas laca. La abato staris kun la dorso turnita al li apud la biblioteko. Estis klare, ke ili estis interparolintaj.

Mi elverŝis vinon en la glasojn, kaj la abato volis trinkigi Alva, sed tiu ĉi rifuzis. Fadrique kontraŭe trinkis avide. Kiam Maarlo eniris, Alva, incitita, demandis:

“Ĉu estas necese, ke ni daŭre staru ligitaj la tutan tempon?”

“Mi bedaŭras,” diris Maarlo, “sed tio estas necesa.”

“Vi pentos tion dum la resto de via vivo! Iru kien vi volos, mi ĉasos vin ĝis la alia flanko de la tero kaj pendigos vin kiel friponon!”

Sed Maarlo ne respondis, kaj Fadrique demandis lin:

“Kiam vi atendos novaĵon? Vi certe faris kalkulon.”

Mi vidis, ke Maarlo jam ne estas tiel trankvila. Ankaŭ al la demando de Fadrique li ne respondis, sed ree eliris. Post iom da tempo li revenis, sidiĝis sur seĝon kaj klopodis aspekti ne tiel malkvieta. Mi aŭdis, ke la abato diris al li:

“La mesaĝisto certe povis esti ĉi tie.”

“Estas malfacile diri,” respondis Maarlo nerveze. “Ĉu ili kondukis Egmont tuj al la indikita loko? Aŭ ĉu ili unue kunvokos aron da viroj por diskuti pri la afero? Ne estas eble ekscii tion ĉi tie.”

Tiam ni aŭdis bruon ekstere. Maarlo salte leviĝis.

“Kio estas tio?” rapide demandis Fadrique.

Li rigardis sian patron ke diris:

“Aŭskultu!”

Ni aŭdis mallaŭtan bruadon ekstere, kva-zaŭ farita de homamaso.

“Tio ne estas mesaĝisto,” diris Fadrique, “sed multe da viroj.”

Ni aŭdis pafojn kaj kriojn sur pluraj lokoj.

Mansfeld alkuris kriante:

“Kio okazas? Ĉie sur la herbejo ĉirkaŭ la abatejo estas viroj. Ili alproksimiĝas. Kiu estas ili?”

“Mi ne scias,” respondis Maarlo maltrankvila.

Al unu el la soldatoj gardantaj Alva kaj Fadrique li diris:

“Iru rigardi kaj raportu.”

La soldato kuris eksteren. Tiam ni aŭdis frapetadon el la direkto de la pordego.

“Oni enbategas la pordegon,” diris Mansfeld konsternita.

“Venigu plifortigon,” ordonis Maarlo al la soldato.

Tiu ĉi eliris, kaj momenton poste kvar aliaj soldatoj sekvis lin enen. Maarlo postenigis ilin ĉirkaŭ Alva kaj Fadrique. Mansfeld denove eliris. Alva, kiu estis aŭskultinta kun pli da atento, diris:

“Estas niaj trupoj.”

“Kiel do, niaj trupoj?” demandis Fadrique, nekredante.

“Aŭskultu do. Estas niaj muskedoj. Tiajn oni ankoraŭ ne havas ĉi tie.”

“Ĉu ili venas liberigi nin?” Fadrique jam ĝojis.

“Ili devas esti la niaj,” diris Alva. “Cetere, kial ribeluloj atakus tiun ĉi abatejon? Ili jam havas ĝin.”

Ĉiam pli da pafoj oni aŭdis, kaj la frapetado sur la pordegon kreskis. Tiam Viglius enkuris, kriante.

“Alarm! Alarm!”

Ankaŭ monaĥoj envenis kaj kolektiĝis ĉirkaŭ la abato.

“Oni enbategas la pordegon,” diris Viglius. “Sur pluraj lokoj jam staras eskaloj kontraŭ la muroj.”

“Kiu estas?” demandis Maarlo, malkvieta.

“Mi ne scias,” respondis Viglius.

“Ĉu soldatoj?”

“Jes, certe.”

“Ĉu hispanaj soldatoj?”

“Mi ne scias. Estas mallume ekstere. Mi vidis la pintojn de la eskaloj super la muroj kaj tie kaj tie ĉi figurojn grimpi sur la murojn, kaj tiam mi venis ĉi tien.”

“Kiaspecaj kaskoj estas?” demandis Alva.

“Tion ankaŭ mi ne scias kun certeco,” respondis Viglius.

“De tiaj kiuj estas en la garnizono?”

“Mi kredas, ke jes.”

Tiam Mansfeld haste reenvenis.

“La garnizono!” li kriis, ekscitita. “Estas la soldatoj de la garnizono!”

“Ĉu vi estas certa?” demandis Maarlo, paliĝinta.

“Jes, mi rekonis la uniformojn.”

“Hura!” ekkriis Fadrique.

Ĉiam pli da monaĥoj enkuris. Ankaŭ Viglius serĉis protekton apud la abato. Mansfeld demandis al Maarlo:

“Kion tio signifas, senjoro Maarlo?”

“Ni malsukcesis,” murmuris la juna nobelo, “ni malsukcesis.”

Timigita, li rigardis la abaton kaj demandis meditante:

“Kiun eraron ni faris?”

“Ili estas alvenintaj!” diris Fadrique. “Niaj trupoj estas alvenintaj!”

Li turnis sin al la fenestro, kiu eliras sur la internan korton kaj tutforte kriis:

“Ĉi tie estas ni! En la ĉambro de la abato!”

La grafino de Egmont alkuris.

“Kio okazas?” ŝi demandis. “Kion signifas tiu bruado?”

“La trupoj de Alva alvenis,” diris Maarlo. “Ĉio estas perdita. Iu perfidis nin.”

“Ĉu iu perfidis vin? Kiu do?” la grafino demandis kun timo.

“Dum monatoj ni planadis konsiderante ĉiujn eblecojn por garantii nian sukceson. Certe estas iu kiu ektimis aŭ por kiu mono aŭ tero estas pli grava ol honoro, kaj ĉio disfalas...”

Du el la soldatoj kiuj estis gardantaj Alva, subite forkuris.

“Ne, restu tie ĉi!” ekkriis Maarlo. “Eble estas ankoraŭ rimedo...”

Sed ankaŭ la aliaj soldatoj interŝanĝis rapidajn rigardojn kaj senorde elkuris la ĉambron.

Maarlo tiris sian spadon. Ektimigite Fadrique diris:

“Vi malgajnis. Kapitulacu.”

Maarlo staris antaŭ Alva, la spadon en la mano.

“Mi estas sola, sed mi ankoraŭ havas vin... Per unu frapo mi povos liberigi la landon de vi. Kiom da fojoj mi revis, ke mi tiel staras antaŭ vi. Nun mi staras ĉi tie.”

Ekvidinte, ke la abato estis proksimiĝinta al li, li turnis sin al li kaj dolore diris:

“La promeso estis: en kazo de neceso, nur en kazo de neceso... Sed ĉu tio ĉi ne etas kazo de neceso? La perdo de ĉiuj esperoj? Kion do faru viro kiu jam havas nenian esperon?”

Viglius, je sekura distanco inter la monaĥoj, konsilis lin:

“Kapitulacu, Maarlo, kapitulacu. Nun!”

Estis terura momento. Maarlo, senmova kaj pala, staris antaŭ la duko. Li rigardis la abaton kaj diris:

“Mi mortos ĉiaokaze. Kial mi ne rajtas...? La monstro devas morti!”

“Ne,” diris la abato. “Tiu estus murdo.”

La spado malsupreniris kaj Maarlo diris kun kropo en la gorĝo:

“Bone. Tiam mi faros tion sola. Estas ankoraŭ eble. Mi kondukos lin tra la subtera koridoro sub la murego el la abatejo kaj interŝanĝos lin kontraŭ Egmont.”

Li tranĉis la ŝnuron per kiu Alva kaj Fadrique estis ligitaj al la kolono.

“Al tiu pordo tie for,” li ordonis. “Malgrimpu la eskalon. Mi scias, kie estas la koridoro. Tiuj ekstere ne.”

Fadrique kriis al la fenestro:

“Al la keloj! Oni kondukas nin al la keloj! Estas koridoro!”

“Silentu!” ekkriis Maarlo.

Kiam Fadrique volis denove krei, Maarlo frapis lin per la plato de spado kontraŭ la orelojn.

“Malgrimpu la eskalon! En silento!”

Sed Fadrique denove ekkriis:

“Estas blanka ŝtono en la angulo de la...”

Maarlo frapis lin per piedo tra la kelo-pordon. Li kaptis Alva ĉe brako kaj tiris lin ankaŭ tra la pordo. Post tio li klakfermis la pordon, kaj ni aŭdis, ke li metis ion de interne kontraŭ ĝin.

Mansfeld kuris post li, kaj ŝajnis momenton, kvazaŭ li volus provi malfermi la kelpordon, sed li ne faris tion. Viglius hezite antaŭenpaŝis kaj lamentis:

“Kion do li faras? Li havas nenian ŝancon sukcesi.”

Mansfeld ankoraŭ ĉiam rigardis la pordon kun admiro.

“Aresti Alva...” li murmuris. “Kia kuraĝo! Kia aŭdaco!”

Li kunfaldis la manojn, rigardis supren kaj diris:

“Dio protektu vin!”

La grafino de Egmont, pala kaj sensprita, staris ĉe la tablo. La abato iris al ŝi.

“Nun ĉio estas perdita, ĉu ne?” ŝi ekploris. “Ĉio estas perdita.”

La abato forkondukis ŝin. Tiam hispanaj soldatoj enkuris la laborĉambron kaj eniris la najbarajn ĉambrojn. Subite ni denove aŭdis la voĉon de Fadrique:

“Al la vinkelo! Al la vinkelo!”

“Kelkaj soldatoj perforte forigis Mansfeld de antaŭ la pordo, dispecigis la pordon kaj malsupreniris la eskalon.

“Ili kaptos lin,” komentis Viglius sensprita. Nervoze li kunpremis la manojn.

“Tio estas terura situacio,” li diris. “Ĉu ne ŝajnos, kvazaŭ ni ambaŭ estus pli-malpli implicitaj en tio kio okazas nun ĉi tie?”

“Mi hontus pri tio!” respondis Mansfeld memfide.

“Kompreneble ne,” koncedis Viglius, “sed vidate praktike...”

Pripensante la situacion, Mansfeld ankoraŭ ĉiam staris apud la pordo.

“Kiuj estas la homoj kun kiuj li faras tion ĉi?” li demandis.

“Li ne volis diri tion al mi.”

En kiu kastelo tio komenciĝis? Mi ne fieras pri tio, ke oni prisilentis tion al mi.”

Viglius maltrankvile skuis la kapon.

“Estas tre delikate... Estas malfacile trovi firman bazon sur kiu, konsiderante ĉiujn premisojn, oni povus...”

“Aŭskultu!” diris Mansfeld.

En la kelo oni aŭdis obtuzan bruadon.

“Tie malsupre oni batalas,” diris Mansfeld. “Ho, Dio mia, li estas tute sola, li estas tute sola...”

Tiam ĉagrenite, li diris:

“Kial mi ne iras helpi lin? Kial mi ne iras?”

Subite li elingigis sian spadon kaj volis enkuri la kelon, sed Viglius kaptis lin per la brako.

“Ne, Mansfeld, lasu tion! Estas tro malfrue.”

Li retenis Mansfeld, tiris lin malantaŭen kaj refermis la pordon.

“Ne faru sensencaĵojn,” li aldiris. “Tio ĉi estas perdita batalo.”

Tiam li aŭdis bruojn sur la eskalo de la kelo. La pordo estis malfermita, kaj Alva kaj Fadrique reeniris, sekvataj de la hispanaj soldatoj. Unu el ili tranĉis la ŝnurojn. Alva insulte diris al li:

“Ne estu tia mallertulo. Tranĉu ĉi tie!”

Tiam li turnis sin al Fadrique.

“Eliru kaj vidu, kiel estas ekstere. Esploru, kiu aranĝis tiun ĉi aferon.”

“Jes,” diris Fadrique kun malmilda entuziasmo. “Lasu tion al mi. Mi instruos al ili lecionon.”

“Ne mortigu,” diris Alva, “sed esplordemandu ilin.”

“Kial?” demandis la filo, elrevigita.

“Mi volas ekscii la nomojn de ĉiuj kiuj kunlaboris en tio.”

“Kiel vi volas. Sed mi ankaŭ estas specialisto pri esplordemandado. Se mi kaptos unu el tiuj ribeluloj, li krios por *rajti* rakonti ĉion!”

Dum Fadrique elkuris, Mansfeld turnis sin al Alva.

“Kie estas la senjoro de Maarlo?”

“Tio ne estas lia laboro,” diris Alva, malkontenta. “Li estas junulo kiu ne bone pripensas. Lia tasko ĉi tie estas grava, sed koncernas nur parton de la tuta afero. Estas viroj kiuj atendas Egmont en la arbarego Zonio. Li parolis pri armeo. Mi ne kredas, ke li blufis. Granduloj estas implicitaj en tiu planon.”

Momenton li staris pripensante.

“Sed kiu?” li pli diris ol demandis. “Ĉu Jan de Hinckaert? Li koleris, kiam li ne ricevis aŭdiencon ĉe la reĝo. Li meditis pri venĝo, mi scias tion.”

La abato eniris. Hezite Viglius diris:

“Tio estas treege malagraba okazintaĵo.”

“Ĉu Maarlo ankoraŭ vivas?” demandis la abato.

“Ĉu tio estas la sola afero kiun vi volas ekscii?” demandis Alva, incitita. “Vi ĉiuj ja faras al vi multajn zorgojn pro li.”

“Kie li estis?” demandis la abato, neper-turbita.

Alva faris malklaran geston per la mano.

“Certe ie en la keloj.”

“Ĉu li ankoraŭ vivas?”

“Kiel mi povus scii tion?”

“Li ne atingis la subteran koridoron, ĉu ne?”

“Ne kun ni,” sarkasme respondis Alva.

“Ĉu li devis forlasi vin ambaŭ, kiam la soldatoj penetris en la kelon?”

“Jes.”

“Ĉu li unue provis mortigi vin?”

“Kial vi demandas tion?” akrate demandis Alva, kiun tedis tiu esplordemandado.

“Ĉar tio estus estinta murdo,” diris la abato.

Fadrique haste reeniris.

“Hinckaert,” li diris.

“Ĉu estas li kiu komencis ĉion?” demandis Alva.

“La transkurintoj suspektas lin.”

“Ili ne scias tion?”

“Ne kun certeco, sed ili kredas tion.”

“Kial ne? Ĉu oni arestis lin?”

“Ankoraŭ ne. Eble oni arestos lin post nelonge.”

“Rakontu.”

“Vi konas Philippe de Rocourt, ĉu ne?” demandis Fadrique.

“Ĉu la kapitano de la lancistoj el la brusela Lakenstraat?”

“Jes, estas li.”

“Kio estas pri li?”

“Antaŭ nelonge, en la daŭro de la vespero, soldato venis ĉe lin. Rocourt rekonis lin. Antaŭe la viro servis sub li. La soldato rakontis al li, ke oni oferis al li monon por konspiri kontraŭ vi, kune kun aliaj du mil...”

Alva rigardis supren.

“Ĉu du mil? Du mil konspirantoj? Tio estas neebla.”

“Sed li asertis tion.”

“Hm, rakontu plu.”

“La soldato do akceptis monon por, kune kun du mil aliaj – aŭ malpli se vi preferas –, konspiri kontraŭ vi. La intenco estis aresti vin en tiu ĉi abatejo. Unu el ili, Maarlo, devis eniri la abatejon kiel gasto kaj zorgi, ke la pordego estu malfermita. Tio akordas kun lia propra rakonto. Tiam trupo da soldatoj devis surprizataki nian gvardion kaj aresti nin.”

“Tion ni ja scias. Kaj tiam?”

“La soldato pri kiu mi parolis, diris al kapitano de Rocourt, ke li bedaŭras, kion li faris.”

“Kial do li transkuris?”

“Jes, aŭdinte, ke Rocourt estas en Bruselo, li ekbedaŭris sian faron, ĉar li ne povis toleri la penson, ke li eble devos batali kontraŭ sian eksan komandanton.”

“Ĉu la soldato menciis Hinckaert?”

“Ne Hinckaert, sed Ohain.”

“Hinckaert loĝas en Ohain.”

“Precize.”

“Kion li diris pri Ohain?”

“La grupo, de kiu li forfuĝis, troviĝas en la arbarego Zonio, sed ĝi ne estas la centro de la konspiro. Li diris, ke ĉiam venadis mesaĝistoj de Ohain.”

“Donu la ordonon encirkligi la kastelon de Ohain.”

“La trupoj jam estas survoje,” diris Fadrique. “Tuj kiam kapitano Rocourt aŭdis la rakonton de la soldato, li kuregis al la palaco. Tie ĉiuj kunvenis en urĝan kunvenon kaj decidis...”

“Kiu decidis?”

“Ej... Vargas,” diris Fadrique honteme. “Pardonu min. Mi suspektis lin maljuste. Sed ankaŭ vi ne estis certa. Vargas do decidis sendi unu parton de la garnizono al tiu ĉi abatejo, duan sekrete al la kastelo de Hinckaert kaj trian al la arbaro.”

“Kie estas nun Rocourt?”  
 “Kun la trupo kiu foriris al Ohain.”  
 “Mi volas akcepti lin morgaŭ en la palaco. Kie estas la viroj kiuj antaŭ nelonge penetris en la abatejon kun Maarlo?”  
 “Mortigitaj.”  
 “Ĉu ĉiuj?”  
 “Eble kelkaj el ili kaŝis sin ie.”  
 “Serĉu ilin kaj esplordemandu ilin.”  
 “Jes, jes!” Fadrique avide respondis, ĉar li volis foriri plenumi la ordonon.  
 “Tiam sendu spionojn,” diris Alva.  
 “Ĉu spionojn?”  
 “Mi volas spionojn. Sendu ilin al ĉiuj kasteloj en la ĉirkaŭaĵo. Mi volas scii, kiuj estis hejme ĉi-nokte kaj kiuj ne. Ankaŭ tiuj kiuj iris fari viziton kaj kien ili iris. Listojn mi volas havi. Kiam vi trovas ion suspektan, sed vi ne povas ekscii kion okazis, tiam rabu serviston aŭ servistinon kaj torturu ilin ĝis ili eldiras tion.”  
 “Bone, bone,” diris Fadrique. “Ankoraŭ io alia?”  
 “Jes, sendu mesaĝiston al Vargas. Ankoraŭ ĉi-nokte Vargas devas portigi al ĉiuj urboj pere de rapidaj rajdistoj mesaĝon kun la historio de tio kio okazis ĉi tie, kaj kun ordono mia, mia persone, ke kvin personoj, kvin en ĉiu urbo, kiuj estis kondamnitaj al karcerpuno far la Konsilantaro de la Tumulto, devas esti retiritaj el sia ĉelo kaj publike pendumitaj kiel signo de pentofarado.”  
 “Ne!” diris la abato fortege.  
 “Kiel oni elektu tiujn kvin personojn?” demandis Fadrique.  
 “Sendu la ekzekutiston en la ĉelon kaj lasu lin elekti.”  
 “Li ŝatos tion!” diris Fadrique entuziasme.  
 “Ne faru tion!” diris la abato kolere.  
 “Ĉu mi rajtas elekti ilin en Bruselo?” avide demandis Fadrique.  
 “Se vi volas,” respondis Alva, levante la ŝultrojn.  
 “Mi konas iujn kiujn mi plezurege eltiros el ilia angulo.”  
 “Ne!” denove kriis la abato. “Ne faru tion!”  
 Sed Fadrique kuris eksteren.  
 “Estas jam tiom da malamo,” diris Mansfeld, “kaj tio ankoraŭ pligrandigos ĝin.”  
 Hezite Viglius demandis:  
 “Ĉu ne estus pli bone – kaj mi diras tion al vi, nur por ke vi konsideru tiun ĉi eblecon, petante vin preni ĝin tian aŭ lasi ĝin...”  
 Sed la duko eliris sen lasi lin finparoli.

## DEK-KVINA ĈAPITRO

La abatejo estis fariĝinta nura svarmado de tien kaj reen kuregantaj soldatoj. Ĉie infanterianoj estis saltintaj trans la muregon. Tiam la pordego estis malfermita kaj rajdistoj sturmis enen.

Nur kun granda peno la abato sukcesis malhelpi, ke la abatejo estu prirabata. Li kuregis tien kaj reen por revenigi soldatojn kiuj forkuris kun pentraĵoj kaj vazaro. Soldatoj ekbruligis fajrojn kaj rostis kokinojn kaj porkidojn. Unu venis el la kelo kun korbo plena je vinboteloj. Mi vidis, kiel la abato kaj Alva ekscitite parolis kaj gestis apud la preĝejo. La vangoj de Alva estis puncaj, kaj ankaŭ tiuj de la abato. En iu momento Alva foriris, sed la abato sekvis lin kaj perforte retenis lin ĉe la brako. Mi vidis lin fari violentajn gestojn per sia libera brako.

Mi iris al la kuirejo preparigi manĝon, kiun la duko kaj la abato venis preni en la laborĉambro. Kiam mi servis la manĝaĵojn, ili sidis unu kontraŭ la alia ĉe la tablo, silentaj kaj forte ekscititaj.

Mansfeld kaj Viglius eniris.

“Mi volus, ke vi akceptu unufoje mian konsilon,” diris Mansfeld.

“Kio estas?” demandis Alva, malkontenta.

“Ne konatigu ĉie, kio okazis ĉi tie tiun ĉi nokton. Sufoku la okazintaĵon. Silentu pri ĝi kaj silentigu ankaŭ la aliajn pri ĝi. Tie kaj tie ĉi ĝi jam konatiĝis, sed ne ĉie. Tio estus pli bona por vi, por ni, por ĉiuj.”

Viglius singarde paŝis de malantaŭ Mansfeld kaj diris:

“Estas ĝuste tio kion mi antaŭ nelonge volis proponi al Via Duka Moŝto.”

“Sufoki?” ekkriis Alva, iritita. “Sufoki ŝtatan perfidon subtenatan per armiloj? Ĉu vi frenezas?”

“Estu milda,” petegis Mansfeld. “Jam tre longe oni parolas pri amnestio en tiu ĉi lando. La reĝo parolas pri ĝi. Vi ankaŭ. Apliku ĝin nun. Vi punis, vi timigis. Nun vi devas repacigi.”

Viglius aldonis:

“Mallumo neniam naskas lumon.”

“Proklamu amnestion!” insistis Mansfeld. “Nun!”

“Ĉu la cirkonstancoj ne estas tre strangaj por demandi al mi ion tian?” demandis Alva.

“Iufoje estas tre praktike simple transiri al tiu flanko, kie oni fakte devas esti,” diris Viglius.

“Mi insistas,” diris Mansfeld pasie. “Vi scias, ke mi estas fidela servisto de la reĝo. Donacu la vivon al Egmont!”

“Ni parolas pri konspirintoj, kiuj intencis murdi min, ne pri Egmont!” kolere kriis Alva.

“Komencu per Egmont. Pardonu lin!”

“Egmont ricevos la punon kiun ne mi, sed la leĝoj tre juste surmetis al li.”

La abato, sidanta kontraŭ la duko, miksis sin en la debaton.

“La leĝoj, jes,” li moke rimarkis. “Vi estas forta en leĝoj.”

“Kio estas malbona pri tio?”

“Leĝoj devas esti kiel flagoj flirtantaj ĉe la kapo de procesio, ne malnovaj ĉifonoj per kiuj timulo volvas sin por timigi aliajn kvazaŭ birdotimigilo.”

Koleriĝinta, Alva levis sin de la tablo.

“Ĉu vi diris ‘birdotimigilo’?”

Mansfeld haste intervenis.

“Ni ne atribuu troan gravecon al vortoj. Ni ĉiuj estas lacaj kaj ekscititaj.”

Sed Alva denove kriis:

“Birdotimigilo? Ĉu vi nomas min birdotimigilo?”

“Jes,” respondis la abato, ekscitita. “Antaŭ nelonge mi kredis, ke mi malkovris homon en vi, sed ne! Estas jam nenio homeca en vi! Timegigi la homojn! Frakasi la landon sub teroro! Vi ne kapablas fari ion alian! Jam de monatoj mi serĉas la ĝustan vorton. Nun mi havas ĝin: birdotimigilo.”

Tiam Alva eksplodis. La tranĉilon kiun li tenis en la mano, li lanĉis trans la tablon en la kontraŭan murpanelon.

“Arestu tiun impertinentan pastron!” li ekkriis ekster si pro kolero.

Du soldatoj, kiuj staris apud la pordo, alproksimiĝis.

“Ligu lin al tiu kolono.”

Dum la soldatoj iel timide plenumis la ordonon, Alva malfermis fenestron kaj kriis eksteren:

“Vi tie, sendu al mi don Fadrique!”

Li refermis la fenestron, sidiĝis ĉe la skrib-tablon de la abato, prenis folion de papero kaj skribaĉis kelkajn vortojn sur ĝi. Inter-tempe Fadrique envenis kaj demandis:

“Kio estas?”

Alva ekstaris kaj demandis:

“Ĉu la mesaĝisto jam foriris?”

“Jes,” diris Fadrique.

“Tiam dua devas rajdi post li kun tiu ĉi letero.”

“Ankaŭ por Vargas?”

“Jes.”

Fadrique komencis laŭte legi la leteron.

“La grafo de Egmont.”

“Ne!” ekkriis Mansfeld, forte timigita. “Ne tio!”

Fadrique plu legis kaj, mirigita, rigardis sian patron.

“Ĉu senkapigi la grafon de Egmont ĉe la sunleviĝo?” li demandis.

“Ho ne, mi petegas vin!” timeme ekkriis Viglius.

“Ne faru tion!” petegis Mansfeld.

Fadrique strange rigardis la leteron.

“Kion signifas tio?” li demandis.

Viglius antaŭeniris kelkajn paŝojn kaj diris kun insisto:

“Ankoraŭ estas tempo, Via Duka Moŝto.”

“Ne estas necese doni tiun ordonon,” diris Fadrique. “La juĝo tekstis: senkapigi ĉe la sunleviĝo.”

Sed Alva ignoris lian rimarkon per manĝesto.

“Sendu la mesaĝiston.”

Ankaŭ Fadrique ignoris la ordonon de sia patro kaj insistis:

“Ĉu vi ne diris, ke la juĝo *ne* estas plenumenda, escepte se vi sendas mesaĝon? Ĉu ne vere?”

“Ne parolaĉu!” Alva ekkriis, furioza.

“Ĉu vi ankoraŭ dubis, post kiam vi prononcis la juĝon?” nekredante demandis Fadrique.

“Silentu! Vi estas ĉi tie por plenumi kion mi ordonas. Sendu la mesaĝiston!”

“Estas nekredeble!” diris Fadrique, konsternita.

“Ĉu vi sendos la mesaĝiston aŭ ne?” furiozis Alva.

“Ne faru tion!” petegis Mansfeld.

Viglius poksimiĝis al Alva.

“Ĉu Via Duka Moŝto volus rekonsideri la aferon ankoraŭ unu fojon?” li demandis.

Punca pro kolero, Alva turnis sin al Fadrique, kvazaŭ li volus frapi lin.

“Ĉu vi sendos la mesaĝiston, jes aŭ ne?” li denove furiozis.

“Atendu ankoraŭ iom!” diris Mansfeld.

“Decidojn kiujn ni faras en kolero, ni ofte bedaŭras poste,” diris Viglius.

“Kiel tio estas ebla,” grumbliis Fadrique kaj ekkuris el la ĉambro. Mansfeld provis reteni lin, sed Fadrique puŝis lin flanken kaj kuris eksteren.

“Mizera decido,” diris Viglius, sombra.

“Ĉu decido?” malŝate demandis la abato.

“Ĉu vi nomas tion decido?” La manojn kunligitajn, li staris per la dorso kontraŭ la kolono, kie antaŭ nelonge staris Alva kaj Fadrique. Malestime li rigardis Alva.

“Vi do ne havis la kuraĝon decidi en trankvileco kaj lasas nun tion al via furiozeco... Tio estas facila vojo! Agmaniero propra al dubantoj kaj timemuloj.”

“Tute ne, Via Abato Moŝto!” diris Alva, videble klopodante regi per ĉiuj fortaj sian grandan ekscititecon. “Mi tre trankvile aperigis Egmont antaŭ la tribunalon, mi trankvile esplordemandis lin monaton post monato, mi trankvile prononcis la juĝon pri li kaj mi faras nun la solan aferon kiu ankoraŭ restas: doni la signalon al la ekzekutisto.”

“Sed vi ne estis certa, ĉu vi faros tion aŭ ne, ĉu estas bone fari tion aŭ ne! Nun, en furiozeco vi subite estas certa. Tio estas fuĝi la konsciencon.”

Tiam du el niaj monaĥoj venis el la kelo kun la korpo de Maarlo. Unu portis lin ĉe la aksejoj, la alia ĉe la kruoj. Liaj brakoj pendis senfortaj al la grundo.

“La junulo...” diris Viglius, konfuzita.

“Ĉu la senjoro de Maarlo?” demandis Mansfeld, timigita. “Ĉu li...?”

Alva intervenis.

“Mi ne permesas, ke iu kiu atencis la leĝan senditon de la reĝo, estu nomata senjoro!”

“Sed li estas senviva...” murmuris Viglius, timigita.

Ŝokita Mansfeld rigardis la kadavron.

“Rigardu tiujn vundojn,” li rimarkis mal-laŭte. “Li havas vundojn sur la tuta korpo. Li batalis per siaj tutaj fortoj ĝis la fino.”

Subite li ŝanĝis la tonon.

“Vidu! Sur la vango... Tio ne estas sango. Tio estas larmoj! Li ploris.”

“Kio ĝuste igis lin partopreni en tiu sovaĝa plano?” demandis Viglius pensante.

Alva kriis:

“Stulta, malkonvena kaj blindiga fideleco al viro kiu ne meritas tion!”

La abato kapjesis.

“Fideleco sen ia dubo estis en li,” li diris, kaj lia voĉo sonis maljune kaj lacege. Sed tiam ĝi fariĝis viveca kaj pli ĝoja. “Fideleco estas... kiel la steloj. Oni ne vidas ilin dumtage. Sed dumnokte, kiam estas mallume kaj malvarme, ili brilas kaj estas vidataj de ĉiuj. Mi estas feliĉa pro tio kion tiu junulo faris. Tio kuraĝigas maljunulojn. Estas kiel printempo, kiu revivigas la naturon.”

“Portu la kadavron eksteren!” komandis Alva, malpacienca.

“Camillus!” diris la abato.

“Jes, patro?” mi demandis, alproksimiĝante.

“Benu la mortinton. Li estis fidela.”

Mi benis la korpon de la junulo.

“Donu al li kison.”

“Ne!” kriis Alva perforte.

“Donu al li kison, Camillus,” diris la abato.

Mi premis kison sur la frunton de Maarlo. Ĝi estis pala kaj malvarma.

“Kial vi ordonas ion tian?” Alva, iritita, demandis al la abato. “Tion ne estas rita ago kiun sacerdoto devas fari sur kadavro.”

Sed la abato ne aŭskultis lin kaj plu ordonis:

“Dissternu blankan tukon sur la korpon.”

Mi prenis blankan tukon el kofro, sed Alva forkaptis ĝin en miaj manoj.

“Kial vi faras tion?” li kriis. “Por kio tio estas necesa?”

Li ĵetis la tukon sur la grundon, envokis du soldatojn kaj ordonis, montrante la korpon de Maarlo:

“Pendiĝu ĝin al la pordego.”

Mansfeld rapide metis sin inter la korpon kaj la soldatojn.

“Vi ne povas fari tion,” li diris en rezoluta tono.

Kiam Alva volis interrompi lin, li kontraŭdiris lin:

“Li estas nobelo. Vi ne rajtas!”

Alva koleriĝis.

“Tio li ne estas! Li estis nobelo, antaŭ ol li partoprenis en tiu plano. Perfiduloj perdas siajn rajtojn.”

Sed Mansfeld insistis:

“Vi devas enterigi lin!”

“Se tio igas vin feliĉa, mi konsentas,” diris Alva. Li turnis sin al la soldatoj kaj ordonis:

“Forĵetu tiun kadavron en la fosaĵon ekster la muregoj.”

“Camillus,” diris la abato.

“Jes, patro?” mi demandis.

“Unu el niaj gastoj mortis.”

Li rigardis Maarlo kaj diris:

“Tiu ĉi. Tio ne estas la afero de tiuj soldatoj, nek de tiu krianta viro.”

Alva volis interveni, sed la abato koleriĝis.

“Tiu junulo estis mia gasto. Ankaŭ vi, kiu tiel bone konas la leĝojn, estas mia gasto. En tiu ĉi abatejo vi ne havas nenian jurisdikcion. Estas mi kiu ordonas ĉi tie.”

Mi vidis, kiel Alva hezitis. Tiam la abato denove turnis sin al mi.

“Sternu tiun tukon sur lin kaj igu porti lin al la gastoĉambro.”

Mi venigis du monaĥojn kun brankardo. Singarde ili metis la malfeliĉan junan nobelon sur ĝin. Dum mi sternis la tukon sur lin, mia koro bategis, kvazaŭ ĝi volus eksplodi. Mi timis kolereksplodon de la duko. Tiam mi vidis, ke Alva de turnis sin kun bruska movo kaj eliris la ĉambron kun levita kapo. En la pordo li turnis sin al la soldatoj kiujn li venigis, kaj montris la abaton.

“Gardu lin. Li restos kie li estas.”

Post tio li malaperis.

Al la du monaĥoj kiuj elportis la kadavron de Maarlo, la abato diris.

“Lavu liajn vundojn kaj tiam reportu lin ĉi tien, metu lin sur tiun ĉi tablon kaj petu ĉiujn monaĥojn veni ĉi tien. Kune ni kantu *In Paradisum* por li.

## DEK-SESA ĈAPITRO

Kiam ni estis lavintaj la korpon de Maarlo, ni reportis ĝin en la laborĉambron de la patro abato, metis ĝin sur la tablon kaj lokis brulantajn kandelojn ĉe ambaŭ flankojn. Tiam envenis ĉiuj monaĥoj, kaj ni kantis kune: *In Paradisum deducant te Angeli* (En la Paradizon konduku vin la anĝeloj).

La okuloj de la abato estis ruĝaj, kaj mi vidis, ke li kantas kun pinĉfermita gorĝo. Ĉu pro la malfeliĉa Maarlo, kiun li amis kiel filon de amiko, kaj kies kuraĝon kaj fidelecon li admiris? Aŭ ĉu pro la duko, kiun li amis kiel maljunan amikon kaj admiris, pro tio ke li ne timas la morton nek eblan perfidon de Vargas, sed kies dureco kaj krueleco plenigis lin per abomeno?

Dum ni ĉiuj restis apud la korpo de la junulo, preĝante por lia animo ĝis la mateno, Alva reeniris. Li nervoze rigardis nin, kaj ŝajnis, kvazaŭ li hezitis, ĉu li liberigus la abaton aŭ ne.

Viglius, kiu estis reenirinta la laborĉambron de la abato por saluti la kadavron de Maarlo kaj preĝi momenton, faris kelkajn paŝojn en la direkto de Alva, ĝentile tusetis kaj mallaŭte diris:

“Mi pensas, ke estus bone, se ni revenus ankoraŭfoje al tio kion ni estis dirantaj antaŭ nelonge.”

Tiam Fadrique ekscitita enkuris la ĉambron kun leteroj en la mano kaj laŭte diris al sia patro, tiel ĝenante la tutan kompanion:

“Mi havas bonan novaĵon!”

“Kio do estas?” demandis Alva nevole.

“Oranje!”

“Kio estas pri Oranje?”

“Li estas fuĝanta! Kun sia tuta armeo! Dudek kvin mil viroj, disbatitaj kiel polveroj! For! Malaperintaj.”

Alva apenaŭ reagis.

“Sen batalo?” li demandis;

“Sen batalo!” triumfe diris Fadrique.

“Kiel antaŭvidite,” komentis Alva preskaŭ indifere. “Li igis sin kaptligi kiel kuniklon. Li ne povas kompreni, ke vi ne volas batali kontraŭ lin.”

“Mi neniam batalas kontraŭ malbone pagataj armeoj,” diris Alva.

“Kompreneble ne! Mi lernis tion de vi! Malsato, soifo, ribelo kaj dizerto faras tiun laboron de neniigo.”

“Oranje bone komprenas politikon, sed de strategio li eĉ ne konas la abocon.”

Fadrique diris:

“Ŝajnas, ke ĝis la lasta momento li esperis ricevi helpon de la hugenotoj<sup>13</sup>, sed al tiuj ĉi estas ankoraŭ pli malbone ol al li.”

“Kie li estas nun?”

“En Pikardio.”

“Kiu estas kun li?”

“Neniu.”

Momenton Alva meditis.

“Sed li revenos,” li diris.

“Ne tiel baldaŭ.”

“Jes, sufiĉe baldaŭ.”

“Ĉu vi ne kredas, ke li komprenis la lecionon?”

“Li estas pacienca kaj ruza. Li ne rompiĝos. Willem estas kiel ŝtala arbalesto, kiu povas stari streĉita en angulo dum jaroj kaj tiam, subite, pafas kaj mortigas...”

Tiam li aldonis:

“Mi multe ŝatas lin. Ni povus esti amikoj.”

“Ĉu vi volas legi la leteron nun?”

“Poste,” diris Alva.

Li indikis la aliajn paperojn en la mano de Fadrique.

“Kio estas tio?” li demandis.

“Letero el Hispanio,” diris Fadrique.

“Ĉu de la reĝo?”

“Jes, li gratulas vin. Li skribas, ke estis bona ideo bruligi la kastelo de Kulemborg.”

“Kion alian li skribas?”

“Li urĝe petas, ke vi plu laboru super la afero Egmont. Li volas, ke vi faru finon al la proceso. Oni parolas tro multe, li diras. Morgaŭ ni devas tuj komuniki al li, ke ĉio estas aranĝita.”

Li montris alian leteron kaj diris:

“Tiu ĉi venas de Romo.”

Alva prenis ĝin el lia mano.

“Ĉu de la papo?” li demandis.

“Jes.”

“Kion li volas?”

“Mi ne malfermis la leteron. Vi ne volas, ke mi malfermu la leterojn kiuj venas de Romo.”

Alva legis la leteron.

“Ĉu io grava?” demandis Fadrique.

Alva ne respondis.

“Ĉu ankaŭ li volas, ke vi lasu Egmont vivi, kiel la aliaj?”

Alva nee skuis la kapon.

“Kontraŭe, li volas, ke mi ekzekutigu Egmont, kiel eble plej baldaŭ.”

“Brave por Lia Papa Moŝto!” ekkriis Fadrique, ridetante.

Alva rigardis la leteron kun pala, tordita vizaĝo.

“Li skribas, ke li aŭdis, ke mi igis ekzekuti Egmont. Li sendas al mi sian benon kaj igos transdoni al mi post nelonge fare de unu el siaj senditoj la honoran sabron.”

Fadrique rigardis lin mirigita.

“Ĉu la papo donos al vi la honoran sabron?”

“Jes.”

“Tiun ricevas nur reĝoj kaj imperiestroj.”

<sup>13</sup> Francaj protestantoj.



Alva diris:

“Kaj la duko de Alva, se li mortigos la grafon de Egmont.”

“Se vi mortigos la grafon de Egmont? Sed li kredas, ke vi jam mortigis lin.”

“Ne, tion li ne kredas. Tiu letero bezonis plurajn semajnojn por alveni ĝis ĉe ni. Li scias tiel bone, kiel mi aŭ vi, ke Egmont ankoraŭ vivas. Li ne povas skribi: ‘Mortigu lin’. Do li skribas: ‘Se oni bone konsideras ĉion, vi faris bonan decidon.’ Estas lia maniero diri: ‘Prenu tiun decidon.’ Li ŝatas malpurajn laborojn, sed tiamaniere, ke li mem tenas la manojn puraj.”

Mirigita, Fadrique diris:

“Diru, kio estas al vi. Vi ŝajnas ja ĉagrenita, ĉar vi ricevos la honoran sabron. Vi mem diris al mi, ke la korteganoj de Madrido deziras vian pereon, kaj ke iu honorigo bone servus vin. Jen vi ricevos ĝin. Kaj el la manoj de la papo.”

Sed ĉiam ankoraŭ rigardante la leteron, Alva, iritita, diris:

“Ĉu li ne povas okupi sin per siaj propraj aferoj?”

“Jam mateniĝas,” tiam intervenis Mansfeld. “Mi petas vin, lasu min rajdi al la palaco kun mesaĝo via, ke Egmont ne devas esti ekzekutita. Mi povas alveni ankoraŭ ĝustatempe. Skribu la leteron, kaj lasu min porti ĝin al la palaco.”

Hezite Alva demandis:

“Kie estas la grafino de Egmont?”

“En la preĝejo.”

“Mi petos la reĝon zorgi pri ŝi kaj la infanoj.”

“Pro kio do vi rompas al vi la kapon?” mokis Fadrique.

“Mi ne atendas la respondon de la reĝo,” plu diris Alva, “sed jam morgaŭ mi donos antaŭpagon al la grafino, se ŝi deziras tion.”

“Ĉu Egmont zorgus pri ni?” Fadrique kolere demandis.

“Mi preferus, ke la bienoj de Egmont ne estu konfiskitaj, sed tion ordonas la leĝo. Mi povas ŝanĝi nenion al tio.”

“Mi petas vin,” diris Mansfeld, “skribu tiun leteron kaj lasu min rajdi al la urbo.”

Alva rigardis lin momenton, kaj subite venis super lin la sama timo kiun li havis, kiam li prononcis sian publikan konfesion.”

“Mi devas ekzekutigi Egmont, sinjoro Mansfeld. Ĉu vi ankoraŭ ĉiam ne komprenis tion? Mi ne povas elekti. Mi devas,” li diris.

En lia voĉo oni aŭdis malesperon.

“Mi donis al vi centon da argumentoj,” li plu diris, “sed vi ne povis refuti unu solan.”

Li denove rigardis nin kaj poste Mansfeld kaj Viglius.

“Vi ne povas vere deziri, ke mi liberigu lin, ĉar vi ne povas doni al mi leĝan kialon.”

“Prokrastu la ekzekuton,” proponis tiam Viglius. “La momento estas malfavora. La animoj estas ekscititaj. Estas en via povo prokrasti la ekzekuton de la juĝo.”

“Tio estus neutila kaj konfuzema.”

Subite li venis al ni kaj diris, kiel iu kiu estas en danĝero.”

“Vi, la monaĥoj de tiu ĉi abatejo, vi estas sacerdotoj de Dio. Diru al mi ĉu mi rajtis kondamni Egmont al morto aŭ ne!”

“Kio okazas al vi?” demandis Fadrique. “Kial vi demandas tion al ili?”

Alva staris antaŭ ni kun pala kaj timema vizaĝo.

“Diru tion al mi!” li ripetis. “Ĉu mi rajtis kondamni la grafon de Egmont al morto? Ĉu mi havis tiun rajton aŭ ne?”

Kelkajn momentojn regis premanta silento. Tiam la abato diris tre laŭte:

“Mi unue volus aŭdi, kion vi mem pensas pri tio.”

Alva turnis sin al la abato.

“Kaj vi diras tion? Ĉu vi ne fidas viajn proprajn monaĥojn? Ĉu vi timas ilian respondon?”

“Decida en tiu afero estas ne tio kion ili diros, sed kion vi mem kredas. Tial mi volas unue aŭskulti, kion diros vi.”

Alva iris al la abato kaj diris pasie:

“Mi servas la leĝojn de mia reĝo kaj de la unika vera Dio.”

“Sendube estas tio, kion vi volas. Sed la leĝoj de Hispanio estas maljunaj kaj senkompataj pecoj da papero. La homo kontraŭe estas juna, viva kaj sentema. Vi timas detruji junan homon, kiu skuas la ĉenojn, per kiuj li estas ligit. Vi rifuĝas al la maljuna leĝo kaj pos-tulas de aliaj, ke ili diru, ke tiu malnobleco estas via devo. Se estus tiel, vi ne timus.”

“Mi scias, kion ordonas al mi la leĝoj de Dio!”

“La leĝoj de Dio estas ŝajne knedebraj kiel argilo. Oni jam knedis el ili la plej strangajn kaj timegajn monstraĵojn.”

“Sed kiu povus oponi la leĝojn de Dio?”

“Lasu la leĝojn de Dio. Vi ne komprenas ilin. Ili predikas amon. Mi parolas nur pri viro kiu fuĝas antaŭ sia konscienco.”

“Estas la leĝoj de Dio kaj de la reĝo, kiuj ambaŭ kondamnis la grafon de Egmont.”

“Kaj kion diras la leĝoj de Alva?”

“Alva estas nur servisto, kiu plenumas.”

“Alva estas homo kun konscienco kaj libera volo, kaj do respondeca pri siaj agoj.”

“Ne, Alva estas nur servisto.”

“Ankaŭ servisto estas homo kiu vidas, aŭdas, sentas kaj povas juĝi! Sed vi kaŝas

vin antaŭ tiu juĝo. Ekzistas bestoj kiuj kaŝas la kapon en la sablo, kiam ili havas timon. Ili estas vere konvinkitaj, ke tiel ili fariĝas nevideblaj. Ankaŭ vi provas fari tion. Sed vi estas homo: vi ne povas fari tion. Via konscienco avertas vin pro tio, sed anstataŭ prilumi vin, ĝia forta lumo timigas vin kaj igas vin retroiri, ree al la sekura mallumo por kaŝi vin.”

“Vi komparas la leĝojn de Dio kun mallumo.”

Alva montris Mansfeld kaj Viglius kaj diris: “Li kaj li kaj ankoraŭ aliaj klare diris...”

Sed la abato impete interrompis lin:

“Mi ne volas aŭskulti ilin nek la aliajn ĉeestantojn. Antaŭ nelonge vi petis min indiki la vojon al homo. Al tiu ĉi viro. Vi surgenuiĝis kun la kapo kontraŭ la tero. Tiun homon mi volas auskulti. Kion diras la leĝoj de tiu homo? Pri tio ni estus devintaj paroli hieraŭ vespere kaj ĉi-nokte.”

Sentante sin malpli forta ol la abato, Alva koleriĝis.

“Ĉu vi estas luterano?” li ekkriis.

“Tute ne! Tio neniel koncernas la luteranojn.”

“Kial do vi parolas tiel multe pri la leĝoj de la homo?”

“Tial ke vi sentas ilin en vi. Estas la leĝoj de Dio kiuj laboras en vi. Sed vi fuĝas antaŭ ili.”

Ekestis nova paŭzo, dum kiu la duko, enpensigita, faris la rondon de la ĉambro. Pasante antaŭ Mansfeld, tiu ĉi denove turnis sin al li.

“Lasu min rajdi al la urbo, Via Duka Moŝto. Mi petas vin: skribu tiun leteron kaj sendu min al la palaco.”

Intertempe Alva denove proksimiĝis al ni kaj demandis:

“Ĉu mi rajtis aŭ ne kondamni Egmont?”

“Estas via konscienco kiun mi volas aŭdi!” diris la abato. “Kun Jesuo kiel ekzemplo.”

Alva denove turnis sin al la abato.

“Jesuo estas la Filo de Dio!”

“Jes, kaj Li venis al ni por montri, kiel ni devas vivi kaj agi en ĉiuj cirkonstancoj.”

“Sed ĉu mi rajtis kondamni Egmont?”

Tiam la abato turnis sin al ni.

“Kunfratoj,” li diris, “ĉu la homo kiu staras antaŭ vi, rajtas, jes aŭ ne, fari ion kion profunde en sia konscienco li konsideras malbona?”

Konsternita Fadrique rigardis sian patron.

“Kion do arogas al si tiu pastro?” li demandis kolere.

Sed Alva, ne aŭskultante lin, diris al la abato:

“La homo kiu staras antaŭ vi, faras nur kion preskribas al li la leĝoj, do tion kio estas justa.”

Fadrique prenis Alva ĉe la brako.

“Diru, patro, kian ludon vi estas ludanta ĉi tie? Al kio tio servas?”

“Kial do vi venis ĉi tien?” demandis la abato. “Kial vi ne estas en via palaco, se ĉio estas tiel certa? Tie vi povas doni ordonojn kiel granda kaj potenca viro. Kial do vi forkuris el via palaco kaj serĉis la kaŝitecon de tiu ĉi abatejo? Kial do alie, ol tial ke vi ne estas tiel certa pri ĉio? Vi volas forgesi vian ordonon aŭ aŭdi konfirmon de ordono je kiu vi kredas.”

Alva levis la manojn kun gesto de mal-espero.

“Kion do mi devas fari por komprenigi al vi kion mi...”

La abato interrompis lin.

“O, kiom mi amis vin, kiam vi staris kontraŭ tiu ĉi kolono. Vi staris rekte. Vi ne timis morti, kaj la penso, ke Vargas povus forlasi vin, okupis vin sufiĉe longe por forĵeti ĝin de vi kun malestimo. Tio estis bela, kaj ne tiel malfacila. Vi devis nur decidi, ĉu vi estu malkuraĝa aŭ kuraĝa, fidela aŭ malfidela al la reĝo. La elekto estis simpla. Sed antaŭ ol vi forrajdis el la urbo, vi donis la ordonon: ‘Ne mortigu Egmont, antaŭ ol mi sendos mesaĝiston.’ Tio estas la tuta afero. Tie ĉi la elekto ne estas tiel facila. Temas pri tio, ke vi devas determini, ĉu la leĝo de la reĝo certe akordas kun tiu de Dio; ĉu kion diras la reĝo estas tute kaj aŭtomate konfirmata de Dio; ĉu estas permesite al vi, jes aŭ ne, pensi pri tio vi mem. Vi pensis pri tio kaj decidis favore al akordo inter ambaŭ leĝoj. Konsekvence vi kondamnis Egmont. Tiu malbono estas farita. Vi estas preta fari, kion Dio deziras de vi, sed nun vi jam ne scias tiel certe *kion* Li deziras de vi. Kaj vi timas plej multe, ke estas vi kiu devas trovi la respondon.”

“Mi tre klare scias, kiu estas mia devo, kaj vi ne povas konvinki min, ke mi devu fari la kontraŭon!” respondis Alva.

“Tio estas via problemo, ne la nia! Estas vi kiu devas respondi pri viaj agoj, ne ni. Sed vi estas kristano. Tio estas: adepto de Nia Sinjoro Jesuo Kristo. Jesuo estis milda viro, kiu resanigis la malsanulojn kaj benis la homojn, kiuj certe ne estis pli bonaj ol tiuj de nia tempo. Vi kontraŭe senkompete senkapigas ilin.”

“Tiu komparo estas neadekvata, kaj vi scias tion.”

“Sed vi certe vidas tiun ĉi monstran evoluon: la nuntempa kristanismo igas sin protekta de ekzekutistoj, kaj vi demandas vin,

ĉu la ekzekutistoj ne devas esti nomataj murdistoj. Vi volas, ke la monaĥoj respondu tiun demandon en via loko kaj trankviligu vin. Sed ili ne povas trankviligi vin. Vi devas plu vivi kun viaj agoj.”

Kolere Fadrique intervenis.

“Mi ne komprenas, kial vi ne enkarcerigas lin. Se mi povus agi nur unu fojon laŭ mia plaĉo...”

Subite io en Alva rompiĝis. Senmove li staris antaŭ la abato.

“Patro, kio estas la senco de ĉio ĉi, kiam... kiam...”

“Kiam kio okazas?” demandis la abato.

“Kiam la leĝo jam ne donas firman tenon? Kion devas fari homo, kiam tiu subteno forfalas? Kien li devas iri, kiam... Kiam...”

La abato finis la demandon.

“...kiam li devas konduki sian vivon mem? Kiam li jam ne povas ŝovi la respondecon sur la ŝultrojn de la reĝo? Kiam li estas devigata pensi por si mem?”

Alva aspektis konfuzita.

“Ne,” li diris hezite, “tio ne estas kion mi volis diri.”

“Vi volas diri al mi, ke vi naskiĝis tro malfrue. Vi sopiras al la tempo, ne tiel longe pasinta, kiam la volboj de la katedralo estas ankaŭ tiu de la universo: ‘Dio super ni, la infero sub ni, kaj inter la du la Romkatolika Eklezio’. Tiam ĉio estis pli facila. Sed tiu tempo forpasis kaj ne plu revenos. Tiu sistemo jam ne funkcias. Ĉu vi scias kial? Mankas justeco, mankas amo al la proksimumo. Estas tiu malbona sistemo kiu naskis protestantismon. Se parto de la popolo en nia landoj kaj en aliaj landoj ribelas kontraŭ la reĝo kaj la Eklezio, tio estas tiel, ĉar ĝi ne volas toleri pli longe ilian tiranecon. Jes, tiranecon! Mi bedaŭras, ke estas tiel, sed estas tiel. Dio kreis la homon kiel liberan estulon, kaj ne intencis, ke li fariĝu senrajta sklavo. Jesuo mem diris: ‘Se iu el vi volas esti la unua inter vi, li devas esti via servisto.’ La aŭtoritato koruptiĝis: tio estas la kaŭzo de la ribelo. Kaj nun vi laciĝis de la konstanta mortigado de homoj, ĉar vi vidas, ke perforto ne solvas la problemon. Vi demandas vin nun, ĉu ne estus pli bone esti bona por ili anstataŭ mortigi ilin. Tio estas, kion vi volas demandi ĉi tie. Ĉu ne estas tiel? Rigardu tra la fenestro: jam lumas en la oriento. Se vi estus pardoninta la viron kiu nun estas paŝanta al la eŝafodo, tio eble estus signifinta vian savon. Sed vi ne faris tion. Vi preterlasis la ŝancon. La pordo definitive fermiĝis post vi, kaj nun vi frapas per ambaŭ pugnoj sur ĝin. Vi volas, ke ĝi remalfermiĝu, sed estas tro malfrue. Vi ne povas reiri al tiu sekura tempo, kiam

vi ne devis pensi, sed nur obei. Tiu pordo jam fermiĝis por vi. Jam ne estas tia pordo. Vi frapas en la aero.”

Fortege spirante la abato, kvazaŭ venkita per la insistado de la duko, turnis sin al ni kaj tiel preparis al si la plej grandan seniluziigon kiun mi povas imagi. Antaŭ ol li diris ion, mi jam sciis, ke li estis metonta decidan demandon. Mia koro bategis tiel sovaĝe, ke miaj tempioj doloris. Tiam ni aŭdis la voĉon de la abato, fortan, sed samtempe time esperantan la liberigantan respondon:

“Tiu kiuj kredas, ke tiu viro bone agis, kondamnante Egmont, kaj ke li devas plu plenumi tion, kion li nomas sian devon, levu la manon.”

Mi vidis la senmovecon de la monaĥoj antaŭ kaj post mi, kaj tiam la manojn, ĉiujn manojn, kiuj leviĝis. Mi ankaŭ levis la manon.

Konsternita, la abato rigardis nin. Regis profunda silento en la granda ĉambro. Tiam ni aŭdis murmuri lian voĉon:

“Ho, Dio mia...”

La vizaĝo de Alva estis tordita en kramfo. Nekredante li rigardis unu monaĥon post la alia, kvazaŭ li volis esti certa, ke ĉiuj levis la manon. Tiam liaj okuloj ekbrilis.

“Ili aprobas min!” li laŭte jubilis. “Ili levas la manojn!”

Li kaptis Fadrique per la manoj kaj ĝojege diris:

“Fadrique, vidu! Ili aprobas min!”

Fadrique turnis sin al la abato.

“Mi ne povas kompreni la utilecon de tiu-specaj korpaj ekzercoj, sed mi komprenas, ke tio ne estas, kion vi atendis, ĉu ne?” li demandis triumfante.

Alva montris nin per etendita mano kaj ekkriis triumfante:

“Ne mi, sed vi sendis Egmont al la eŝafodo.”

Tiam li turnis sin al la abato kaj demandis:

“Kion vi diras nun, kara patro abato?”

“Miaj kunfratoj ne povas anstataŭi vian konsciencon. Nenio ŝanĝiĝis por vi.”

Ni vidis, kiel Mansfeld iris al la fenestro.

“La suno,” li diris, forte emociita. “Jen, la suno leviĝas!”

Viglius levis la manojn kaj diris per tremanta voĉo:

“Ĉe la sunleviĝo, tiel tekstas la ordono, la ekzekuto devas esti plenumita.”

Dum li mallevis la manojn, ni konsciis, ke Egmont staras sur la eŝafodo kun la pastro, la soldatoj ĉirkaŭ li, la tamburistoj kaj la homamaso sur la vendoplaco.

Mansfeld ankoraŭ ĉiam troviĝis ĉe la fenestro kaj diris:

“La lumo malantaŭ la linio de la montetoj kreskas... Ankoraŭ kelkajn momentojn.”

Mi fermis la okulojn kaj imagis la muregojn de la urbo, ankoraŭ mallume desegnitajn kontraŭ la aŭroro, kaj supre, jam pli helajn, la turojn de la preĝejoj kaj la tegmentojn de la altaj domoj. En mia imago mi vidis la ekzekutiston atendantan kun granda hakilo, kaj ie sur la turo, eble sur tiu de la urbodomo, soldaton kiu blovos la klarionon ĉe la leviĝo de la suno.

Revante Mansfeld diris:

“Mi povas vidi lin rekte starantan sur la eŝafodo.”

Alva staris meze de la ĉambro kaj nervozigis. Mansfeld plu diris:

“Li vidas la belegajn konstruaĵojn, kiu ĉirkaŭas lin, la homamason, kiu, timema sed respektoplena, rigardas lin, kaj ĉirkaŭ la urbo, de horizonto al horizonto, la landon, kiu amas lin kaj kiun li amas...”

La suno estis tute aperinta super la orienta horizonto, kaj Mansfeld subite troviĝis en ĝia brilanta heleco. La lumo kiu ekfluis sur lia vizaĝo estis tiel forta, ke li devis fermi la okulojn. Senmove li staris en la heleco kaj murmuris:

“Nun li surgenuiĝas. La ekzekutisto levas la hakilon...”

Estis kvazaŭ ni sentis la aeron tremeti en la foreco sekve de la fortega frapo. Viglius falis sur la genuoj kaj metis la manojn antaŭ la vizaĝon.

“Dio, en viajn manojn mi rekomendas lian animon,” li preĝis.

Kun rompita voĉo kaj larmoj en la okuloj la abato ekkriis:

“Mi, Albertus, abato de la abatejo de Ter Kameren, deklaras, ke la viro kiu prononcis tiun juĝon estas murdisto.”

Alva estis tiel pala, ke li ŝajnis malsana. Tiam ni aŭdis en la malproksimeco, kie troviĝas la urbo, la sonojn de sonorilo. Viglius rigardis supren.

“Kio estas tio?” li demandis.

Mansfeld malfermis la okulojn kaj atendre aŭskultis.

“Tio sendube estas la sonorilo de la preĝejo Sankta-Gudula,” li diris, mirigita, “la funebra sonorilo de la preĝejo Sankta-Gudula.”

Impresita Alva aŭskultis la profundajn sonojn. Suspekteme Fadrique turnis sin al sia patro.

“Kial ili sonoras?” li demandis. “Alie oni neniam sonorigas tiel frue en la mateno. Kion tio signifas?”

Alva deturnis sin de sia filo. Tiam alia sonorilo eksonoris en la malproksimeco.

“Ankoraŭ unu ...,” murmuris magistro Viglius, stariĝante.

“La funebra sonorilo de la preĝejo de Kapelle,” diris Mansfeld.

Tiam tria sonorilo komencis sonori.

“Tio estas la preĝejo de Zavel!” diris Mansfeld. Liaj okuloj brilis, kiam li diris:

“Ĉiuj sonoriloj de Bruselo sonoras.”

Kaj efektive, ĉiam pli multaj sonoriloj eksonoris, ankaŭ ekster la urbo. Ĉie, de ĉiuj flankoj ni aŭdis la sonoradon.

“Estas malprudente,” komentis Viglius.

Sed Mansfeld ne aŭskultis lin. Kun brilaj okuloj li plu diris:

“Aŭdu, kiel la sonorado disvastiĝas! De vilaĝo al vilaĝo. La turoj transdonas la signalon unuj al la aliaj. La funebraj sonoriloj de la tuta lando.”

Alva iris ĝis antaŭ la abato.

“Egmont mortis. Nun estas tro malfrue, jam estas nemalfareble,” li diris gestante. Tiam li iris al la preĝoseĝo sub la krucifikso sur la muro, sinkis sur ĝin kaj kaŝis la vizaĝon en la manoj.

Larmoj fluis sur la vangoj de la abato.

“La sonoriloj estas sonorigataj. Ĉu honore al la viro kiu mortis? Ne, ne tial. La mortinta jam ripozas. Ili havigas eliron al la kolerego kaj neŝancebleco de la vivantoj.”

Li rigardis la dukon, kiu, profunde kliniĝinta, sidis sur la seĝo kaj kriis al li:

“Aŭskultu do! Estas la voĉoj de la kolerego kaj neŝancebleco de nia popolo, kiujn vi ekde nun devos alfronti.”

Sed la duko ne moviĝis. Tiam la abato rigardis nin.

“Ankaŭ ni havas sonorilon en la preĝejo, kaj tie en la angulo de la plafono pendas la ŝnurego de la alarmsonorilo.”

Ĉio en mi pelis min antaŭen al la ŝnurego, kiu pendis de la plafono. Mi estis certa, ke, se mi ne estus tuj irinta, alia monaĥo estus. Mi kuris do al la ŝnurego, kaptis ĝin kaj tiris per ĉiuj miaj fortoj, ĝis sur la tegmento la sonorilo komencis sonori klare kaj laŭte. Mi ne povis vidi la abaton, sed mi aŭdis lin, tre feliĉan, diri:

“Bone, Camillus, tio estas bona...”

“Ĉesigu tion!” Fadrique ordonis.

“Sonorigu, Camillus, nur sonorigu!” la abato kuraĝigis min.

“Mi diras, ke vi ĉesigu!” kriegis Fadrique, kaj mi vidis, kiel li tiras sian spadon. Sed tiam ĉiuj aliaj monaĥoj venis al mi kaj formis kvaroncirklon antaŭ mi. Tiuj kiuj povis, kaptis la ŝnuregon kaj helpis min tiri je ĝi.

“Sonorigu, miaj infanoj!” kriis la abato, emociita. “Vi respektas la leĝon, sed timo naskiĝis en vi. Sonorigu la alarmsonorilon, sonorigu!”

Konsternita, Fadrique staris antaŭ ni.  
 “Tio estas ribelo!” li diris.  
 Li kuris al Alva kaj diris:  
 “Vi ne povas permesi tion! Kion ni faros?”  
 Alva ĉiam estis sidanta sur la seĝo kun la kapo en la manoj, ripetante:  
 “Ho, Dio mia! Ho, Dio mia!”  
 Fadrique rigardis lin.  
 “Kara ĉielo, kio okazas nun? Vi ploras!” li ekkriis, nekredante. “Vi ploras kiel infano.”  
 Alva levis sin de la preĝoseĝo, turnis al ni sian larmokovritan vizaĝon kaj diris:  
 “Mi faris mia devon. Dio kaj la homoj estas miaj atenstantoj, ke mi faris mian devon.”  
 “Camillus!” kriis la abato.  
 Mi liberigis min el la amaso de miaj kunfratoj kaj venis al la abato.  
 “Konduku nun la dukon al lia ĉelo,” li diris.  
 “Li volis preĝi kaj demandi al Dio, kion li devos fari. Nun li rakontu al Dio, kion li faris.”  
 Fadrique ordonis al la abato, ke li silentu, sed la abato ripetis:  
 “Al la ĉelo, Camillus!”  
 “Vi ne rajtas doni komandojn al ni!” ekkriis Fadrique. “Ne vi kaj neni!”  
 Pli mallaŭte la abato diris al mi:  
 “Donu al li mian ĉelon. Por tio ĉi ĝi bone taŭgas. La muroj kutimiĝis al timo.”  
 “Ĉesigu!” Alva intervenis.  
 “Lasu lin sola,” la abato plu diris, “sed sorgu, ke li ne sentu sin tro soleca.”  
 “Ne faru tion!” insistis Alva.  
 Sed la abato ne aŭskultis lin.  
 “Restu ekstere en la koridoro,” li plu eksplikis al mi, “tuj apud la pordo, kiel vi jam faris por mi, kiam la punkto estis tro mal-luma.”  
 Mi ne povis fari ion alian, ol indiki al Alva, kie estas la pordo de la ĉelkoridoro. Sed li ne venis. Li staris antaŭ la abato kaj diris:  
 “Pardonu min, ke mi igis vin ligi. Mi ne rajtis fari tion al vi, abato Albertus.”  
 Amare la abato respondis:  
 “Ne estu tiel zorgema pri abato Albertus. Li ne estas tiel pura perlo. Li povas esti enkatengita de tempo al tempo kaj ekspoziciata kontraŭ fosto.”  
 Alva mem malligis la ŝnuron per kiu la abato estis ligita al la kolono.  
 “Mi volus paroli kun vi,” li diris timeme.  
 “Nun, se estas eble.”  
 Sed la abato turnis al li la dorson kaj ordonis:  
 “Konduku lin al mia ĉelo, Camillus. Kaj kiam en la koridoro vi aŭdas klaki liajn dentojn, tiam laŭte preĝu la rozarion.”  
 Sed Alva ne venis kun mi. Li iris eksteren. Sufiĉe longan tempon, ni ne plu vidis lin.

Tiam ni vidis, ke la soldatoj pretigis sin por foriri, kaj iom poste la pordegisto venis kaj anoncis al ni, ke la duko foriris kun sia filo.

Kelkajn tagojn poste soldatoj venis por la abato. Ili forkondukis lin, kaj la tutan tagon ni aŭdis nenion pri li. La morgaŭon ni aŭdis la famon, ke li devos aperi antaŭ la inkvizicio. Mi ne sciis, ĉu tio estas vera, kaj mi ne povis kontroli la novaĵon, ĉar ankaŭ mi estis arestita la posttagmezon, eble ĉar mi sonorigis la unua la alarmsonorilon, sed oni ne diris tion al mi.

## POSTPAROLO

La tutan tempon, ke mi restis enfermita en karceron – tri semajnojn en Bruselo, kaj tiam, post longa vojaĝo, ankoraŭ monaton en Toledo –, mi povis ekscii nenion pri nia patro abato. La tagon, kiam mi estis kondukita al Hispanio, li ankoraŭ ne estis reveninta al nia abatejo. Patro Anselmus sciigis tion al mi. En Toledo oni ne permesis al mi skribi leterojn, kaj poste, kiam hispana patro venis serĉi min kaj kondukis min al eta abatejo en montara vilaĝeto en la ĉirkaŭaĵo de Toledo, mi rajtis skribi leterojn, sed oni legis ilin antaŭ ol forsendi ilin. Kiam mi skribis al Ter Kameren por demandi, kiel fartas nia patro abato, oni reportis al mi la leteron. Mi skribis ordinara leteron al kvar patroj, esperante, ke ili donos al mi novaĵojn pri la abato, sen ke mi petas ion de ili. De du mi ricevis leteron, sed neniam vorto pri la abato. Mi ne scias, ĉu la du aliaj skribis ion pri la abato, ĉar mi neniam ricevis ilian respondon. Eble ili tute ne respondis aŭ ne ricevis mian leteron.

Mi timis, ke mi devos aperi antaŭ tribunalo, sed tio ne okazis. Kelkajn fojojn oni aludis pri tio en mia ĉeesto. El la paroloj de miaj kompanoj mi kredis povi dedukti, ke oni intencis fari tion. Mi kredis, ke ili parolas pri mi kiel pri persono, kiu estus fariĝinta herezulo, se ili ne estus savintaj lin. Sed tio estas nura impresio, ĉar neniun el la hispanaj patroj kun kiuj mi vivis, iam parolis kun mi pri io alia ol la laboro kaj la servaranĝoj en la preĝejo. Estis klare, ke tio estis ordonita al ili. Sed la du aŭ tri fojoj, kiam ili parolis pri tribunalo, mi kredis povi kompreni, ke ial mi ne povas esti kondukita antaŭ hereztribunalon. Kun ĝojo mi alkroĉis min al tiu konstato, ĉar ĝi permesis min kredi, ke ankaŭ la abato estis traktata sammaniere kaj ke estas Alva, kiu volis tion tia. Estis timoplena kaj malespera ĝojo, sed ĝi subtenis mian vivon. Eble estis nur iluzio. Eble mi *volis* kompreni el la paroloj de la

hispanoj patroj, ke mi ne povas esti kondamnita, ĉar ankaŭ la abato ne povis esti kondamnita, kaj ke nur Alva povis esti decidinta tion.

Konstatinte, ke la metodoj de Alva ne kondukis al kontentigaj rezultoj, sed kontraŭe durigis la kontraŭstaron de la ribeluloj, la reĝo en 1573 revokis lin al Hispanio kaj anstataŭigis lin per don Ludoviko Requesens, viro kun milda pacama karaktero. Per gracaranĝoj li provis rekvietigi la landon: li proklamis preskaŭ ĝeneralan amnestion, abolis la Konsilantaro de la Tumulto kaj la premantajn impostojn de Alva. Tial, tre neatendate, post kvin jaroj da restado en hispana abatejo, mi ricevis la mesaĝon, ke mi povas reiri al mia hejmlando. Tiel mi reiris al mia kara abatejo Ter Kameren, kie mi retrovis preskaŭ ĉiujn miajn kunfratojn, ĉar intertempe kelkaj maljunuloj mortis kaj pluraj novaj monaĥoj aliĝis al ni. Sed de nia patro abato Albertus, nenia spuro. Neniu estis aŭdinta ion pri li ekde lia aresto. Kelkajn monatojn post mia reveno al la abatejo Ter Kameren ni ricevis oficialan leteron el Hispanio kun la mesaĝo, ke abato Albertus mortis en abatejo ie en Hispanio, en kiu li devige restadis.